



ARGENTINA NOVELARO

SAT - Broŝurservo
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut

ARGENTINA

NOVELARO

* <u>E. Gutiérrez</u> : La fritkukoj	... 3
* <u>L. Gudiño Kramer</u> : Ora Mezo	... 7
* <u>H. Quiroga</u> : Van Houten	...10
* <u>M. Booz</u> : La Inunduloj	...18
* <u>L. Gudiño Kramer</u> : La Verda Lando	...26
* <u>L. Lugones</u> : Repago	...31
Notoj pri la aŭtoroj	...40

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

* 1978 *



Gutiérrez, Eduardo :

(:gutjerres)

L A F R I T K U K O J

Elhispanigis : Elena Izarriaga (Bonaero*)

Sep jaroj pasis jam, kaj ĉiufoje kiam mi rememoras, miaj internaĵoj sin agitas same kiel pro la ipekakvano.

Kaj nigraĉaj kaj kiel kneditaj kun muelita vitro, ŝajnas al mi, ke la fritkukoj krakas inter miaj mueldentoj de subleŭtenanto. Ho, ve! Mi pensas, ke eĉ ne sinjoro Lelongo, post severa dieto, estus kuraĝinta alfronti ilin. Ni marŝis la tutan tagon sub bruliga suno kaj tra seka kardejo. Nia soifo estis terura kaj eĉ pli terura nia malsato. Kaj post mallonga ripozo ni devis senĉese daŭrigi nian marŝadon, ĝis renkonto al tiu malamiko pli atakema ol kreola batalkoko, ĉar la malamiko ne forkuris, sed sturmis, poste ĉesis kaj denove sturmis. Ni marŝis tiun tutan nokton kaj la tutan sekvan matenon, iluzie aŭskultante, kiel karan kaj malproksiman eĥon, la ĉarman voksonoradon de la buĉejo. Sed la sonorado ne alvenis; la korneto de la trumpetisto mallaboreme pendis sur lia dekstra femuro, kaj li, malvigle kaj metafizike, same kiel la bona Rocinanto (1), rigardis en la vakuo, kvazaŭ li rigardus en promesita tero, serĉante pecon da ŝafoviando.

Sed tiun tagon oni ne manĝis! Viando ne estis!

Kia malsato, Dio, kia malsato! Post kiam mi deseliĝis, kaj mense relegis la mirindajn listojn de Kafejo "Filipo", aŭ tiun de la montrofenestro de Konfitejo "Aglo", mi ekrevis pri karbonado (2) kun faboj kaj pri artiŝoka omleto.

- Kion vi volas manĝi, mia subleŭtenanto? - demandis al mi kun tiu sia trankvila kaj serena rideto la fidela Karriso (hisp.: Carrizo), mia servosoldato.

- Malnoblulo! - mi respondis, rigardante tiun kondamnindan helpanton, kiu igis eĉ pli terura la malsatsuferon de mia stomako -, alportu bifstekon kun dekduo da ovoj.

Karriso foriris ridante ĉiam, por reveni post iom da tempo kun maldolĉa mateo.

- Jen la bifsteko - li diris, alproksimigante al mi la mateujon -, sed rilate al la ovoj, mi forgesis la sukeron.

- Ha, fripono! - li estis gardinta nur malgrandan kvanton da duonkruda mateherbaĵo, kaj li venis por malavare partigi ĝin kun mi.

Mi trinkis tiun malbongustan mateon, kaj viktimo de mia grandega malsato, mi komencis iri tra la fajrujoj ekbruligitaj de la aliaj oficiroj por iluziigi, ke ili estas kuirontaj. Kiam miaj intestoj, kvazaŭ ili estus muzikilo, resonigis superakutan "do" (3), mi alproksimiĝis al la fajrujo de kolonelo Lagoso, kaj ekhaltis.

Fripono! Li sorbadis mateon, murdisto! Mi vidis kiel li sorbis du kaj li estis sorbonta la trian! Kaj li estis gaja, babilema, kaj ridegis kvazaŭ frenezulo! Ja, tiu senhontulo sorbadis mateon antaŭ la malsata rigardo de siaj helpantoj, kiuj rifuzis lian inviton fari la samon! Tiel multe mi alproksimiĝis al la fajrujo, kaj tiel multe mi rigardis, ke sendube la kolonelo sentis kortuŝon pro mi kaj ordonis doni al mi mateon, kiun mi ricevis sincere dankeme. Sed apenaŭ mi eksorbis, mi redonis ĝin al la helpanto, pensante ke la kolonelo primokas min. Sed ne estis tiel, mia amiko! La kolonelo sorbadis nur varman akvon, farante al si la iluzion, ke li sorbadas mateon, kaj por trompi iomete sian plendeman stomakon. Mi estis do pli feliĉa ol li, ĉar almenaŭ Karrisio partigis kun mi sian lastan plenmanon da matefolieroj. Mi jam malproksimiĝis, kiam mi ekflaris delikatan odoron. Mi tuj turniĝis kaj ekvidis la fajrujon de la nigrulino Karmeno, serĝentino Karmeno Ledesma, kiu estis ĉirkaŭita de oficiroj. La nigrulino Karmeno manfrapadis, kvazaŭ ŝi defendus ion, kion la aliaj volus forpreni.

- "Panjo" Karmeno kuiras ion bonan! - ekkriis mi en mia menso, kaj per tri eksaltoj mi atingis la gajan grupon. Tie estis "panjo" Karmeno antaŭ pato plena de fritkukoj, defendante ĝin kontraŭ la malsatego de miaj kunuloj.

- Fritkukoj! - ekkriis mi entuziasme - fritkukoj! Kaj mi ĵetis min antaŭ la paton, malgraŭ la "glavo" (4), kiu levigis super mia kapo. Sed subite terura naŭzo haltigis mian avidan manon. Tie, antaŭ "panjo" Karmeno kaj la ceteraĵo de la ankoraŭ nefrititaj kukoj mi ekvidis la selremburaĵon, kiun ŝi uzis kvazaŭ knedujon. Tio estis nepriskribebbla! Tiu malpura selremburaĵo, kiun "panjo" Karmeno uzis kvazaŭ linton, kiun ŝi metis sur la ulceraĵoj de sia rajdbesto kaj kiu taŭgis por haki ŝian nigran tabakon krudan, estis pur-

igita pere de tiu naŭza knedado. Kaj tie oni vidis la nefrititajn kukojn plenajn de ĉevalharoj, de ulcerkrustoj, de tabakpecoj kaj de lanugeroj de pluŝkovrilo! Kaj tiu estis la bankedo, kiun miaj kunuloj atendis, fritita per la graso de la piedkripla ĉevalo buĉita la pasintan vesperon!

- Tion mi ne manĝos! - ekkriis mi kun hororo, kaj mi trotpaŝe malproksimiĝis inter la rido de miaj kunuloj kaj ĉi tiu frazo de "panjo" Karmeno :

- Poste vi venos peti kelkajn, sed tiam ne estos plu.

Pensante pri tiaj kukoj aŭ fritajoj, mi sentis teruran naŭzon, kaj mi iris al mia fajrujo, kun la ideo forpasi pro malsato, kaj rakontis al mia helpanto Karrisio tion, kio okazis.

- Sed tio ne estas malbona - diris la nobla soldato -, ĝi estas tre pura faruno, kiun serĝentino Karmeno alportis en sia sino, por ke ĝi ne malpuriĝu en la sakoj. Imagu la sakojn!

- Silentu, aĉulo! - mi diris al li - aŭ mi kapablu pafi vin!

Sed la kukoj de "panjo" Karmeno eĉ momenton ne apartiĝis de miaj okuloj kaj de mia stomako.

La hororo kaj la naŭzo cedis je mia malsato, kiu komencis interkonsenti kun la ĉevalaj haroj, tiuj de la pluŝkovrilo kaj eĉ la krustoj de ulceraĵoj! Mi hezitis, fermis la okulojn, kaj antaŭeniris ĝis la fajrujo de "panjo" Karmeno. La kukfritado ankoraŭ daŭris kaj sur la selremburajo restis nur dekduo da ili. La oficiroj manĝadis ilin unu post la alia, petante pli kaj pli, kaj "panjo" Karmeno, protektante ĉiam sian paton, disdonadis fritkukojn kvazaŭ ili estus benita pano. Post momento tiu bankedo finiĝus kaj restus nur la tabakeroj, inter kiuj kuŝis tiuj kukoj.

Kapturniĝo de malsato trapikis min kvazaŭ glavo kaj kun blinduma manĝegemo mi etendis la manon, sur kiun "panjo" Karmeno metis kun donacema mieno du el tiuj fritkukoj.

Kvazaŭ kaŝante min antaŭ mi mem, kaj fermante la okulojn, mi turnis la vizaĝon kaj manĝis, manĝis, sentante inter miaj dentoj la harojn, la krustojn kaj la tabakerojn. Kaj mi petis pli, kaj avide formanĝis ses kun timiga glutemo. Kaj mi estus manĝinta la tutan vesperon!

Ekde tiam, mi havas ĉiam antaŭ mia rigardo la teruran

spektaklon de tiu timiga selremburajo, kaj mi sentas, ke en mia stomako sin agitas kvazaŭ vipuroj, la haroj, krustoj kaj tiu nekredeblaodoro. La plej granda naŭzo ekatakas min, kaj la ideo pri ipekakvano igas min porti la manojn al la stomako.

Ho! Jam pasis sep jaroj kaj ĉiufoje kiam mi memoras pri tio, miaj internaĵoj sin agitas. Mi ankoraŭ ne povis digesti la fritkukojn de "panjo" Karmeno!

*) Bonaero: Argentinaj esperantistoj uzas tiun formon, cetere tre oportunan kaj pli konforman al la etimologio, por la ĉefurbo de Arg-a Resp-o. PIV prezentas Buenos-Ajreso, absolute laŭ la originalo, sed tro peza, precipe por formi derivaĵojn.

- (1) Ĉevalo de Donkiĥoto.
- (2) Kreola plado : buljono kun viando, maizospikoj, kukurbo, terpomoj, rizo.
- (3) Unua muziknoto laŭ la hispansistema gamo (= C, PIV)
- (4) Metafore por la "damokla glavo".

Gudiño Kramer, Luizoz :

(:gudinjo)

O R A M E Z O

(en la originalo, latine :
"Aurea mediocritas")

Elhispanigis: Enio Hugo Garrote,
Kordobo.

Kvankam lia parolo estis paŭzoplena, ĝi ne estis laciga. Ni povus pasigi tutajn tagojn, aŭdante lin paroli per sia langvora entreria (1) akcento. En la nuna okazo, estis ri-markeble, ke li penadis doni literaturajn formojn al sia rakontado :

- Nu, vidu, sinjorino. La homoj ĉiam dankas pro tio, kion oni faras pro ili. Kaj se temas pri instruisto, eĉ pli.

Sed la virino insistis, dirante, ke en iuj kolonioj la terkulturistoj kaj vilaĝanoj estas tiel subpremitaj, tiel ekspluatitaj, ke eĉ la instruistojn oni vidas kiel malamikojn. Oni konsideras ilin privilegiitaj personoj, kvazaŭ riĉulojn, aŭ anojn el alia socia klaso. Krome, ilia laboro estas tiel diferenca...

- Sed mia kuzo Rollin, - li insistis - estis tiel bedaŭrata, nu, kiam li forlasis la lernejon... la tuta loĝantaro adiaŭis lin ĉe la fervojkajo, kaj li ploris je l'foriro.

- Nu, kial li foriris ?

- Aĥ! Tio estas alia historio...

La junulo klopodis ordigi sian rakonton, kaj post longa tempo da hezitado, li komencis rakonti ion tian :

- Ekde tre frua aĝo, mi pasigis ĉe li la feriojn. Mia kuzo estis alta, forta, bona rajdanto. En la lernejo, kiun li estris, li faris per brikoj mapon de la Respubliko. Li metis florojn el malsamaj koloroj en ĉiu provinco; akvon tie, kie fluas la riveroj kaj riveretoj; montojn kaj montetojn, kaj eĉ li metis "Tukumanan Dometon" (2), kie situas tiu provinco. La lernejnaboj estis ravitaj de la mapo. Mi kutimis promeni kun li en ĉasekskurso, kaj ni iris al najbara kolonio, proksime de Colón (: kolon') urbo en provinco Entrerio.

Rollin amis la virinojn, sed li estis timema. Kiel bona idealisto, li amis ĉe la virino ŝian belecon... li legis versojn... li konis la nomojn de la stelaroj... kaj li sukcesis esti amata de la infanoj.

Pro la insistado de sia familio, kiu admonis lin ĉar je la 35-jara aĝo li restis fraŭlo, dum libertempo li vojaĝis al Bonaero, kaj en la kvartalo Flores li enamigis al iu fraŭlino, kiu laboris kiel apoteka farmaciistino. Bone. La fianĉiĝo estis kiel ĉies, mi supozas. La familio donis konsilojn, sed li insistis, ke ili revenos al la kamparo, ĉar en la urbo ĉio estas prikalkulita kaj malvarma, kaj ŝi, - enamiginta, mi supozas - diris, ke jes, ke ŝi amas la kamparon. Kompreneble, ŝi ne havis eĉ ideeton pri tio, kio vere estas la kamparo, sed ĉar li parolis pri la tagiĝo, la kantoj de la birdoj, pri la roso, pri la lampiroj, la steloj, la nebuloj, kaj pri la lunaj noktoj, kristalklaraj, ŝi entuziasmiĝis.

Ili do geedziĝis kaj iris al la kamparo, kaj ili pasigis tiun unuan jaron pli-malpli bone, pli-malpli enue kaj lace; sed kiam la infano suferis sian unuan malvarmumon, kaj poste lakson kaj febron, kaj poste komencis plori dumnokte, kaj kiam oni devis veturi kaleŝe du-tri mejlojn por venigi la kuraciston, tiam la patrino ekrimarkis la moskitojn, kaj la polvon en ĉiuj anguloj, kaj la muŝojn, kaj la varmon kaj la malvarmon, kaj la solecon kaj la senŝirmecon. Ni aldonu al tiu senrimeda disreviĝo la senĉesan ploradon kaj la leterojn de la gepatroj, kiuj diris al ŝi, ke ili ne kreskigis kaj edukis fraŭlinon, por ke ŝi mortu sen kuracista flegado en la kamparo, meze de senkoraj personoj, ĉar se la edzo ne scias plenumi sian devon, ili ja konas siajn devojn de gepatroj... tiam li konsentis foriri, kaj iun tagon ili entrajniĝis kaj la tuta vilaĝo kaj la kolonio iris adiaŭi ilin.

Li ploris, ĉar li sentis, kvazaŭ oni elŝiras lian koron, sed li ekvidis ŝin tiel kontenta, rigardante lin per siaj okuloj fianĉinecaj, lumaj kaj esprimplena, ke li pensis, ke ree liaj feliĉaj tagoj regos.

En Bonaero ili laboris en apoteko apartenanta al parencoj de la edzino. Li tie ne sentis plezuron, kaj eĉ malpli, kiam li ekrimarkis ŝin ĉe la kontoro, babilante kaj flirtante kontente kun la aĉetantoj...

Ĉe tiu ĉi punkto de la rakontado, la medicina studento antaŭriskis hipotezon pri nervaj reagoj, pri la maniero kiel elĉenigas la angoro kaj aperas patologiaj ĵaluzoj, kiuj sia-vice kreas serion da refleksoj; kaj tiel post provo de klara prezentado de sia teorio, laŭ sia opinio, li daŭrigis, rakontante, ke Rollin tiel fortika kaj gaja komencis maljuniĝi, malgrasiĝi kaj fariĝi melankolia.

La infano estis jam tri-jara, kaj la avino elĉenigis la traŭmaton...

- Nu, manĝu la kaĉon, do. Kaj poste iru ludi. Mi ne volas vidi vin ĉe la anguloj, kiel via frenezeta paĉjo.

- Paĉjo?... ĉu vi estas freneza, paĉjo ?

- Kial, fileto ?

Li ricevis la ŝokon kaj klopodis teni sin serena.

- Avinjo, paĉjo...

Tiun nokton Rollin, kuŝanta, ekprenis la revolveron, kiun li estis kaŝinta sub la kapkuseno. Li pafis al la kapo de sia edzino, dormanta apud li, kaj li memmortigis sin. Li mortis ĉe la ago, kaj la virino saviĝis. La infano dormis en la sama ĉambro.

Bone, finis la knabo. Rollin estis instruisto, kiu sukcesis esti amata en la kamparo. Pasis kvin-ses jaroj ekde la afero, kaj ankoraŭ oni memoras lin. Li faris eraron, tutkompreneble, kaj pagis per sia vivo mem, malmultajn monatojn da feliĉo...

La virino, kiu atente aŭskultadis al li, ekdiris kvazaŭ senzorge : - Aŭ li ŝanĝis vivon longan kaj malluman, ĉiam pli kaj pli limigitan al la materio, kiel okazas en la kamparo al la sentivaj personoj, por kelkaj monatoj da vivo kaj pasio... kiu povus fari la bilancon ? Ŝi restis silenta dum tempeto, kvazaŭ revante, dum la knaboj obseditaj rigardis ŝin, kaj ŝi diris konklude :

- "Aurea mediocritas" (Ora mezo) aŭ incendio... ne estas alia eliro. El li restis la cindro de dankoplena memoro, kaj edzino kaj filo, kiuj ne povos forgesi lin, dum ili vivos... Ne estas tiel malbona sorto!...

(1) El provinco Entrerío (Entre-Ríos = inter riveroj)

(2) Miniaturado de la Domo, kie oni deklaris la Sendependiĝon de Arg-a Resp-o, la 9an de Julio 1816a en Tukumano, ĉefurbo de provinco Tukumano, situanta nordokcidente, je 1500 km. de urbo Bonaero.

Quiroga, Horacio :

(:kiroga)

V A N H O U T E N

(El la rakontokolekto: "La dezerto")

Elhispanigis: Enio H. Garrote, Kordobo.

Mi renkontis lin en fajra siesto, cent metrojn for de lia kabano, kalfatrantan kanoton, kiun li estis ĵus fininta.

- Jen vi vidas - li diris al mi, viŝante per la antaŭbrako ŝvitmalseka la vizaĝon eĉ pli malsekan -, ke mi faris la kanoton. El timboa (1) ligno konservita, kaj ĝi povas ŝarĝi milcent funtojn (2). Ne estas ĝi kiel la via, kiu apenaŭ subtenas vin. Nun mi volas amuziĝi.

- Kiam don-Luis (3) volas amuziĝi - asertis Paolo (4), ŝanĝante la pioĉon per la ŝovelilo - necesas lasi lin. La laboro tiam estas por mi; sed mi laboras popece, kaj mi elturniĝas sola...

Kaj li, nuda de koksoj ĝis kapo kiel sia kompaniano Van Houten, daŭrigis ŝoveli la gruzon de la ŝtonejo. Van Houten havis kiel kompanianon, Paolon, ulon kun ŝultroj kaj brakoj gorilecaj, kies nura zorgo estis antaŭe kaj daŭrigis esti, labori neniam sub la ordonoj de iu, kaj eĉ ne potage. Li enpezis tiom por ĉiu metro da slabo liverita, kaj tie finiĝis liaj devoj kaj privilegioj. En ĉiu okazo li flatis sin pro tio; tiel, ke ŝajne li alĝustigis la moralan normon de sia vivo al tiu sendependeco de sia laboro. Kiel apartan kutimon, li havis la emon fari laŭte siajn kalkulojn, laŭ la vojo, kiam li revenis el la vilaĝo sabatvespere, sola kaj piede kiel ĉiam.

Van Houten, lia kompaniano, estis belgo, flandradevena, kaj foje oni nomis lin : "Tio, de Van Houten, kio restas", ĉar mankis al li unu okulo, unu orelo, kaj tri fingroj el la dekstra mano. Li havis la tutan kavon de sia malplena okulo blue bruligita de la pulvo. Cetere li estis homo malalta kaj tre fortika, kun barbo ruĝa kaj hirta. La hararo, ankaŭ fajreruĝa, flirtis en senĉese ŝvitmalsekaj tufoj, laŭ la tre mallarĝa frunto. Li ŝanceliĝis de ŝultro al ŝultro dum la marŝado, kaj precipe li estis tre malbela, simile al

Verleno, kun kiu li preskaŭ partoprenis la patrion, ĉar Van Houten estis naskita en Charleroi (:ŝarlrua').

Lia flandra deveno estis konjektebla per lia flegmo por elteni kontraŭaĵojn. Li ŝultrotiris kaj kraĉis, kiel nura komento. Li estis krome la plej neglektema homo el la mondo; ne zorgante, ke oni redonu al li la pruntitan monon, aŭ ke subita inundo de Rivero Paranao (5) forportas liajn malmultajn bovinojn. Li kraĉis, jen ĉio. Li havis nur unu intiman amikon, kiun li renkontis nur ĉiusabate vespere, kiam ili ekrajdis kune en direkto al la vilaĝo. Dum kontinuaĵ 24 horoj ili vizitadis la drinkejojn unu post la alia, ebriaj kaj nedisigeblaj. Dimanĉvespere iliaj respektivaj ĉevaloj portis ilin pro la forta kutimo al iliaj domoj; kaj tie finiĝis la amikeco de la kompanianoj. Dum la resto de la semajno ili ne plu vidis unu la alian.

Mi estis ĉiam scivola koni el rekta fonto, kio okazis rilate la okulon kaj la fingrojn de Van Houten. Tiun sieston, gvidante lin inside al lia agadkampo per demandoj pri boriloj, ŝtonejoj kaj dinamito, mi trafis mian celon, kaj tio estas, kiel sekvas :

"Pri ĉio kulpis brazilano, kiu turnis mian kapon per sia pulvo. Mia frato ne fidis je tiu pulvo, kaj mi jes; tio kostis okulon al mi. Ankaŭ mi kredis, ke tio kostos neniom al mi, ĉar jam dufoje mi estis eskapinta viva.

La unuan fojon, tio estis en Posado (6). Mi estis ĵus alveninta, kaj mia frato estis tie de antaŭ kvin jaroj. Mi havis kamaradon, milananon fumeman, kun bastono kaj kaskedo. Li neniam forlasadis la bastonon; eĉ kiam li malsupreniris labori, li metis ĝin interne de la jako. Kiam li ne estis ebria, li estis homo hardita por la laboro.

Ni faris kontrakton pri iu puto, ne po tiom por ĉiu metro kiel oni kutimas nun, sed pri la kompleta puto, ĝis atingo de akvo. Ni devis fosi ĝis ni atingos ĝin. Ni estis la unuaj, kiuj uzis dinamiton en la laboroj. En Posado estas nur "viol-la" ŝtono. Skrapu kaj skrapu, tie kaj tie, je unu metro ekaperas la ŝtono. Tie ĉi ankaŭ estas sufiĉe da ĝi, fore de la ruinoj (7). Pli malmola ol la fero ĝi estas, kaj ĝi resaltigas la pioĉon ĝis onia nazo.

Ni estis atingintaj ok metrojn da profundeco en tiu puto, kiam iun vesperkrespuskon mia frato, post la finpreparado de iu mino en la fundo, ekfajrigis la meĉon kaj eliris el la puto. Mia frato estis laborinta sola dum tiu posttagmezo,

Ĉar la milanano promenis ebria kun sia kaskedo kaj sia bastono, kaj mi kuŝis sur la klaplito kun febro, kaj malvarme ŝvitanta.

Je la sunsubiro mi iris, mortanta pro malvarmo, vidi la laboron, kaj en tiu momento mia frato ekkriis al la milanano, kiu surgrimpis la barilon kaj estis tranĉinta al si per la vitreroj. Alproksimiĝante al la puto, mi stumblis je la rubamaso, kaj apenaŭ mi havis tempon kroĉi min ĉe la faŭko mem, sed la ŝuego el ledo, kiun mi portis - sen ŝtrumpoj kaj sen laĉoj - glitis el mia piedo kaj enfalis. Mia frato ne vidis min, kaj mi malsupreniris serĉi la ŝuegon. Ĉu vi scias, kiel oni malsupreniras?

Per la kruroj dissternitaj sur la du muroj de la puto, kaj subtenante sin per la manoj. Se estus pli hele, mi vidus la truon de la borilo kaj la ŝtonpulvoron apude. Sed mi vidis nenion, nur tie supre rondon helan kaj malsupre lumpunktojn sur la pinto de l'ŝtonamasoj. Vi povus trovi kion ajn ĉe la putfundo: gruzerojn, kiuj falas suben, kaj kiom ajn da malsekeco, sed aeron por spiri, nu, tion vi trovos neniam.

Bone, se mi ne estus havinta la nazon ŝtopita pro la febro, mi tre baldaŭ estus flarinta la odoron de la meĉo. Kaj kiam mi estis malsupre kaj flaris ĝin bone, nu, la haladzan odoron de la pulvo mi perceptis pli klare, ke meze de miaj kruroj kuŝas mino ŝargita kaj fajrigita. Tie supre ekaperis la kapo de mia frato, alkriante min.

Kaj ju pli li kriadis, des pli etiĝadis lia kapo, kaj la puto streĉiĝadis kaj streĉiĝadis ĝis kiam ĝi fariĝis punkto sur la ĉielo: ĉar mi tremis pro malvarma febro.

La mino estis krevonta de unu momento al la alia, kaj sur la mino, apud la ŝtono, staris mi, kiu ankaŭ devis flugi dispecigita ĝis la putfaŭko. Mia frato kriadis pli kaj pli laŭte, ĝis li ŝajnis virino. Sed mi ne havis la forton por supreniri rapide, kaj plata kiel lado, mi kuŝiĝis sur la grundo. Mia frato konjektis pri la afero, ĉar li ĉesis kii.

Nu, la kvin sekundojn dum mi atendis, ke la mino finfine krevos, ŝajnis al mi kvin aŭ ses jaroj, kun monatoj, semajnoj, tagoj kaj minutoj, ĉiuj vice unu post la alia. Ĉu timon? Ba! Troan taskon mi havis, sekvante per la penso la meĉon, kiu estis atingonta la ekstremon... Timon, ne. Estis nur afero de atendo; atendi ĉiumomente: nun... nun... Per tio mi havis je kio distriĝi.

Fine la mino eksplodis. La dinamito agas malsupren; eĉ la mensuoj (8) scias tion. Sed la dispecigita ŝtono saltas supren, kaj mi, post kolizio kontraŭ la muron kaj falo vizaŭalteren, kun lokomotiva fajfo en ĉiu orelo, mi aŭdis la ŝtonojn, kiuj ree falis sur la fundon. Nur unu iomete granda trafis min tie ĉi ĉe la kruro, sur la molaĵo. Kaj krome, la skuo flanken, la haladzaj gasoj de la mino kaj precipe la kapo ŝvelinta de knaloj kaj sibloj, ne lasis min multe senti la ŝtonfrapojn. Mi neniam vidis miraklon, kaj eĉ ne apud dinamita mino. Tamen, mi eliris viva. Mia frato malsupreniris tuj; mi sukcesis eliri kun la genuoj tremantaj kaj sekve ni iris ebriiĝi dum du tutaj tagoj.

Tiam mi eskapis por la unua fojo. La dua okazis ankaŭ en puto, kiun mi kontraktis sola. Mi estis sur la fundo, balante rubojn de mino, kiu eksplodis la pasintan vesperon. Tie supre, mia helpanto hisis kaj disŝutis la ŝtonerojn. Li estis paragvaja indiano, magra kaj flava kiel skeleto, kiu havis la okulblankon preskaŭ blua, kaj parolis preskaŭ neniam. Ĉiun trian tagon atakis lin la febro.

Kiam mi finis la balaadon, mi nodis la ŝnuron super la sitelo, la ŝovelilo kaj la pioĉo, kaj la knabo hisis la ilojn, kiuj estis subtenitaj, kiel mi jam diris, de falsa nodo. Oni ĉiam faras tiel, kaj ne estas danĝero, ke ili malligiĝu, kondiĉe ke la hisanto ne estu stultulo kiel mia helpanto. La afero estas, ke kiam la sitelo alvenis al la supro, anstataŭ preni la ŝnuron super la ilaro por eltiri ilin, la malsaĝulo ekprenis la sitelon. La nodo malligiĝis, kaj la knabo nur havis tempon por kapti la ŝovelilon.

Nu, aŭdu orelstreĉe la dimensiojn de la puto : en tiu momento dekkvar metrojn da profundeco, kaj nur unu metro aŭ metro kaj dudek da larĝo. Tiuspeca ŝtono ne permesas la ŝercon perdi la tempon kaj fosi truojn. Kaj ju pli mallarĝa estas la puto, des pli facile estas grimpi supren kaj malsupren laŭ la muroj. Estis do la puto kiel karabena tubo, kaj mi estis malsupre ĉe unu ekstremo rigardante supren, kiam mi ekvidis la pioĉon ekfali de la alia.

Ba! Iun fojon la milanano stumblis kaj faligis malsupren ŝtonon dudek-kilograman. Sed la puto ankoraŭ estis malprofunda, kaj mi vidis ĝin fali apike. La pioĉon ankaŭ mi vidis fali, sed ĝi falis turnigante, resaltante de muro al muro, kaj estis pli facile konsideri sin morta kun dekdu coloj da fero en la kapo ol diveni, kien ĝi falos.

Komence mi evitis ĝin, kun buŝo malfermita, fikse rigardante ĝin. Tuj poste mi rimarkis, ke estas senutile, kaj tiam mi algluiĝis al la muro, tute senmove kaj rigide kvazaŭ mortinto, dum la pioĉo falis freneze turniĝante, kaj la ŝtonoj torentis. Bone; ĝi frapis por la lasta fojo je unu colo de mia kapo kaj saltis flanken kontraŭ la alian muron; kaj tie profundigis ĉe angulo de la muro. Mi tiam supreniris, ne kolera al la malsaĝulo kiu, pli flava ol iam, estis veninta al la fundo tenante sian stomakon. Mi ne koleris al la knabo, ĉar mi kredis min sufiĉe feliĉa, elirante viva el la putokiel vermo, kun la kapo surkovrita de sablo. Tiun vesperon kaj la sekvintan matenon mi ne laboris, ĉar kun la milanano ni pasigis ilin ebrie.

Tiam mi eskapis el la morto por la dua fojo, kaj ankaŭ interne de la putokiel vermo. La tria fojo estis en plena aero en ŝtonejo de slaboj kiel tiu ĉi, kaj la sunbrulo fendis la teron.

Ĉi-foje mi ne estis tiel bonŝanca. Ba! Mi estas hardita. La brazilano - komence mi diris al vi, ke estis lia kulpo - neniam estis provinta sian pulvon. Tion mi vidis post la eksperimento. Sed li babiladis terure, kaj en la drinkejo li rakontadis al mi siajn fabelojn senhalte, dum mi gustumis la novan brandon. Li neniam trinkis. Li sciis multe da kemio kaj amason da aferoj; sed li estis ĉarlatano, kiu ebriliĝis per siaj konoj. Li mem inventis tiun novan pulvon; li nomis ĝin per iu litero, kaj sukcesis perturbi min per siaj paroladoj.

Mia frato diris al mi : "tiuj estas fabeloj. Kion li faros, tio estos ĉerpi el vi monon". Mi respondis : "Da mono li ĉerpis neniom al mi". "Do - aldonis mia frato - vi ambaŭ flugos aeren, se vi uzos tiun pulvon."

Tion li diris al mi, ĉar li tute kredis je tio, kaj eĉ ripetis ĝin, kiam li rigardis nin ŝargi la minon. La suno estis fajra, kaj la ŝtonejo bruligis la piedojn. Mia frato kaj aliaj scivoluloj kuŝis sub iu arbo, atendante la aferon, sed la brazilano kaj mi ne zorgis pri tio, ĉar ni ambaŭ estis konvinkitaj pri la afero. Kiam ni finis la minon, mi komencis frapi ĝin. Vi scias, ke tie ĉi ni preparas ĝin per tero de takuroj (9), kiu estas tre seka. Mi komencis do surgenuje martelegi dum la brazilano staranta apud mi viŝis sian ŝviton, kaj la aliaj atendis.

Bone, je la tria aŭ kvara frapo mi sentis ĉe la mano la resalton de la mino, kiu eksplodis, kaj nenion pli mi sentis, ĉar mi falis sveninta du metrojn for.

Kiam mi rekonsciiĝis, mi eĉ ne povis movi unu fingron, sed mi aŭdis bone. Kaj laŭ tio, kion oni diris, mi konsciis, ke mi ankoraŭ kuŝas apud la mino kaj ke sur la vizaĝo mi havas nur sangan kaj disŝiritan karnon. Kaj mi aŭdis iun, kiu diris: "Nu, pri tiu ĉi, li transiris al la alia flanko".

Ba! Mi estas hardita. Mi pasigis du monatojn je tio, ĉu mi perdos, ĉu ne perdos la okulon, kaj fine oni forigis ĝin al mi. Kaj mi restis bone, vi vidas. Neniun plu mi vidis ree la brazilanon, ĉar li transiris la riveron tiun saman nokton; li ricevis neniun vundon. Ĉio estis por mi; kaj kiu inventis la pulvon, tiu estis li.

Vi vidas - li fine konkludis ekstarante kaj viŝante sian ŝviton. Oni ne likvidas Van Houten iel-tiel. Nu, ba!... (kun lasta ŝultrotiro) ĉiukaze, malmulte perdita, se oni trafigas en la foson... (10). Kaj li kraĉis.

* *

En morna aŭtuna nokto sur mia kanoto mi navigis supren tra Paranao tiel elĉerpita, ke en la ŝanelo mem la akvo tute pura kaj senforta ŝajnis senmova por puriĝi eĉ pli. La bordoj interniĝis en la riverujo, kaj la randoj kutime el arbaroj refreŝigantaj en la akvo, nun konsistis el du larĝaj kaj paralelaj plaĝoj el argilo ŝtonoza kaj marĉa, kie apenaŭ oni povis trairi.

La profundaj sablobenroj, malkovritaj de la malhela koloro de la akvo, makulis la Paranaon per longaj konusoj el ombro, kies kulminoj akre penetris en la ŝanelon. Sablobenroj kaj nigraj insuletoj el bazalto estiĝis tie, kie unu monaton antaŭe, la kiloj sen iu risko tranĉis la profundan akvon. La kanotoj, kiuj navigis supren sur la rivero, nete adherantaj je la bordo, skrapis per la pagajoj la ŝtonozan fundon de la benko, unu kilometron interne de la rivero. Por kanoto la malkaŝaj rifoj prezentas neniun dangecon, eĉ dum la nokto. Kontraŭe povas prezenti ĝin la fundoj ŝajnigitaj en la ŝanelo mem, ĉar ili kutime estas pintoj de apikaj montoj, ĉirkaŭ kiuj la profundo de la akvo ne atingas fundon je 70 m. Se la kanoto grundas ĉe unu el tiuj fundaj suproj ne estas maniero elŝiri ĝin el tie, ĝi giros dum horoj ĉe la pruo aŭ la poupo, aŭ pli kutime ĉe sia centro mem.

Pro la ega malpezo de mia kanoto mi apenaŭ riskis tian akcidenton. Mi do trankvile suprennavigis laŭ la nigraj akvoj, kiam nekutima ekflagro de ventlanternoj en plaĝo Itahu' altiris mian atenton. Je tiu horo en malhelega nokto la Alta Paranao (11), ĝia arbaro kaj ĝia rivero estis kompleta inkmakulo (12), kie oni nenion vidas. La remisto orientiĝas laŭ la pulso de la fluo ĉe la pagajoj; laŭ la pli densa mallumo vidalvide de la bordoj; laŭ la temperaturŝanĝo de la medio; laŭ la kirloj kaj stagnoj de la fluo, nu, laŭ serio da indicoj preskaŭ nedifineblaj.

Mi do albordiĝis ĉe la Itahu'-plaĝo, kaj gvidata de la lanternlumoj mi direktiĝis al la kabano de Van Houten. Tie mi ekvidis lin mem, dorse kuŝanta sur la klaplito kun lia okulo pli malfermita kaj vitreca, ol oni povus esperi. Li estis morta. Liaj pantalono kaj ĉemizo gutantaj ankoraŭ kaj la ŝveliĝo de lia ventro, tute klare montris la kaŭzon de lia morto.

Pietro (13) rakontis la detalojn de la akcidento al ĉiuj najbaroj, laŭ ili eniris unu post alia. Li ne alligis la esprimojn nek la koncernajn gestojn, ĉiam turnante sin al la mortinto, kvazaŭ li prenis lin kiel atestanton.

- Ha, vi vidis -, li alparolis min je mia eniro - Kion mi ĉiam diradis al vi ? Ke li dronos kun sia kanoto. Jen li, rigida. Ekde ĉi-matene li estis rigida, kaj li eĉ volis kunpreni botelon da brando. Mi diris al li : "Laŭ mi - don-Luis - se vi kunportas brandon, vi grundos kapen ĉe la riverfundo". Li respondis al mi : "Alfundiĝi, nu, tion neniu vidis Van Houten fari... Kaj se mi alfundiĝos, ba! kio gravas?" Kaj li kraĉis. Vi scias, ke li ĉiam parolis tiel, kaj li foriris al la plaĝo. Sed mi neniun rilaton havis kun li, ĉar mi laboras popece. Tiel estas, ke mi diris al li : "Nu, ĝis morgaŭ, kaj lasu la brandon tie ĉi". Li respondis al mi : "Pri la brando, nu, ĝin mi ne lasos". Kaj ŝanceliĝante li supreniris la kanoton.

Tie li kuŝas, pli rigide ol hodiaŭ matene. Romualdo la Vasko kaj Josesinho (:ĵozezinjo) kunportis lin antaŭ nelonge kaj lasis lin sur la plaĝo, pli ŝvelintan ol barelo. Oni trovis lin sur la roko kontraŭ Puerto-ĉunjo. Tie estis la kanoto apud la insuleto, kaj lin oni fiŝkaptis en profundece de 17 metroj.

- Sed la akcidento, nu - mi interrompis lin - kiel ĝi okazis?
- Mi ne vidis ĝin. Josesinho ankaŭ ne vidis ĝin, sed li aŭdis don-Luis, kiu preterpasis kun Romualdo meti la fiŝkaptan ŝnu-

ron sur la alia flanko. Don-Luis kriadis, kantadis kaj streĉadis fortojn, ĉio santempe, kaj Josesinho ekrimarkis, ke ili estas grundintaj, kaj alkriis lin ne pagaji poupe, ĉar ĵus kiam la kanoto liberiĝos, li falos akven surdorse. Poste ili aŭdis la falon en la riveron. Kaj ili aŭdis, ke don-Luis parolas, kvazaŭ li englutus akvon. Nu, pri glutado de akvo... Vidu, li havas la rimenon (14) ĉe la ingveno malgraŭ tio, ke li nun malplenas. Sed kiam ni kuŝigis lin sur la plaĝo, li elvomis akvon kiel aligatoro. Mi tretis lian ventron. Ĉe ĉiu tretito, li eligis ŝprucon altan tra la buŝo.

Homo hardita je la ŝtono kaj kruda por la morto en la mino ja li estis. Li drinkadis tro, certe, kaj mi povas diri tion. Sed al li mi neniam diris ion, ĉar vi scias, ke mi laboris kun li popece...

Mi daŭrigis mian vojaĝon. De sur la rivero malluma mi ekvidis brili ankoraŭ longe la lumigitan fenestron, tiel malaltan, ke ĝi ŝajnis flagreti ĉe la akvo mem. Poste la distanco estingis ĝin. Sed pasis longa tempo antaŭ ol mi ĉesis vidi Van Houten sternitan sur la plaĝo, kaj iĝinta ŝprucejo, sub la piedoj de sia kompaniano, kiu tretis lian ventron.

- (1) el timboo, indiĝena nomo de fortika arbo sudamerika.
- (2) mezuro adaptita, ĉar la originalo uzas nomon antikvan, ne tradukeblan.
- (3) Hispanlingve = sinjoro Luizo, aŭ Ludoviko.
- (4) Paolo (:pa'olo) itala nomo, tiel en la originalo.
- (5) Riverego sudamerika, naskiĝas en Brazilo, kaj enfluas en la Plata-Riveron, longa je 4 500 km.
- (6) Ĉefurbo de provinco Misiono, Arg-a Resp-o.
- (7) Temas pri la ruinoj de la Jezuitaj Misiejoj.
- (8) Gvaranilingva nomo de la kamparaj taglaboristoj.
- (9) Gvaranilingva nomo de iuspecaj konusformaj formikejoj.
- (10) Argentinismo = se oni mortas.
- (11) Norda Paranao.
- (12) Per tiu esprimo oni aludas malhelecon.
- (13) Pietro (:pjetro), itala nomo, tiel en la originalo.
- (14) Temas pri pantalonrimeno.

Booz, Mateo :

L A I N U N D U L O J

(el la rakontokolekto : "Santafeo, mia lando")

Elhispanigis: E.H.Garrote, Kordobo.

Don-Dolorsito (1) Gajtan', kutime alnomita Don-Dolorsito, havis sian kabanon el tabuloj kaj ladoj en Tigra Buŝo (2), tereno malfermita ventumile ĉe la enirejo al la ŝosea ponto, kiu spanas super Rivero Salado (3), kaj ligas Santafeon (4) kun la vilaĝoj de la alia bordo.

Don-Dolorsito provizis la minimumajn bezonojn de sia familio (edzino kaj kvar infanoj) per manieroj diferencaj kaj intermitaj. Kelkfoje per la rezulto de la fiŝkupto, kiun li portis al iu budo en la bazaro; kelkfoje kontraŭ salajro, taglaborante je la ŝarĝado kaj malŝarĝado de ŝipoj; kaj pli ofte servante potage je tapiŝpurigado, vitroviŝado kaj plankovaksado en kelkaj domoj de pramalnovaj familioj, kie oni multe aprecis liajn kapablojn por tiuj taskoj, kaj konis lian emon klini buŝen la botelojn, se tiujn li trovis manatinge. Sed prefere al ĉiuj oficoj, li ŝatis tiun de prizorganto de iu politika partiejo, el kiu ajn koloro, kvankam prefere registarana, ĉar en ĉi-lasta ĉiam abundis pli la rimedoj, kaj eblis enspezi akurate la salajron. Domage, ke tiuj avantaĝoj aperis nur laŭ larĝaj intervaloj!

Donja-Op'tima (5), lia edzino, kunlaboris je la bonstato de la familio, dungigante, kiam li persistis tro pri la pigreco, kiel anstataŭa kuiristino en kelkaj konataj domoj. Ŝi vantis, ke ŝiaj mastrinoj aprecas ŝin, kaj eĉ babilas kun ŝi kvazaŭ kun vizitantino, sidantaj en la korto. Tie oni konsideras ŝin kiel malembarasistinon por la okazo, kiam la kuiristino regula strikis, kaj la tuta korporacio surdiĝis je la alvoko, kiun ili ĵetis per la rubriko "hejmservantoj" de la lokaj gazetoj.

Konkeris ŝi tiun specialan situacion, asertante al la sinjorinoj, ke por helpi al ili ŝi devis neglekti sian idaron kaj sian jugokunulon. Kaj vespere ŝi forlasis la domon kun dikaj pakaĵoj de manĝoj kaj frandaĵoj por festeni en la kabanano de TIGRA BUŜO, krome kun iu malnova kostumo de la mastro por don-Dolorsito kaj kelkaj vestoj forĵetindaj por la idoj.

La ekzempla paro laboris laŭ perfekta kadenco kun siaj bezonoj. Se tiuj bezonoj estis kontentigitaj, ambaŭ fordonis sin al sia prefera okupo : ŝi pinĉis zorge la haraĉojn de iu el siaj infanoj (6), ĉe la sojlo de la kabano, dum li, sternita plenaere sur la tolo de la klaplito, rigardis la ŝanĝojn de la flugformacio de la anasoj aŭ la grizan nubon, kiu sugestis al li la ideon pri tuko por vaksi tiun senfinan renversitan plankon.

Ni devas insisti, ke eĉ amante la molan vivon, ili cedis je la logoj de la mallaboremo, nur se ili havis la potojn plenprovizitajn kaj kelkajn ŝtofojn, por ke la idoj kovru minimumon el sia nudeco.

En iu okazo, la buboj kontribuis per sia grajneto je la komuna bonstato. Estis pasintjare, kiam ili transiris la ponton por kapti birdojn en Sankta-Tomeo (7) per dratkaptiloj. La patro tinkturis flave la kaptitojn kaj vendis ilin je kontentigaj prezoj al la maristoj de la transatlantikaj ŝipoj. Kaj poste dum la trairado de la oceano, la aĉetintoj rimarkis, ke la birdeto enkaĝigita ne estas precize kanario. Tiel profitigan industrion don-Dolorsito devis definitive forlasi. Tio okazis, kiam li revenis iun tagon el la dokoj kun du dentoj malpli kaj la vestoj pli taŭzitaj ol antaŭe, kutime.

Donja-Op'tima kaj don-Dolorsito konsistigis paron konkordan kaj iel feliĉan; kaj por forigi tiun limon al ilia feliĉo, estus necese, ke la hejmpostuloj neniam trudu al unu la devon porti sakojn kaj al alia barakti en alies kuirejoj.

II. La akvoj de la Rivero Salado komencis ŝveli kaj kuntreni grandegajn kamalotojn (8) kun venenaj bestaĉoj el la Nordo. La impeta fluo transbordiĝis kaj invadis la loĝejojn sidantajn sur la najbaraj terenoj. Kaj la altecoj svarmis je flugbestoj, kiuj fuĝis, ĉar ili trovis la insulojn kovritaj kaj iliajn kutimajn dormejojn superakvitaj. Ĉe la loĝantoj de la kadukaj kabanaroj de Tigrá Buŝo disvastiĝis alarmo. Vere la rivero devis eksterordinare suprenkreski, por atingi tiun lokon. Sed tiu eventualo apartenis al la probableco. Kaj estas nature, ke tie oni parolis nur pri la inundo kaj pri la akvorezisteco de la fervojpontoj. La pesimistoj antaŭdiris teruregajn katastrofojn. Iun frumatemon don-Dolorsito ekrimarkis, malfermante la okulojn, ke la piedoj de la klaplito dronas en la akvo. Tretante la koton de la ĉambro, li aliris la pordon kaj konstatis, ke TIGRA BUŜO ankaŭ estas plagita de la inundo.

- Nu, necesas transloĝiĝi - li haste ekpensis, dum li vekis sian edzinon kaj siajn idojn.

Donja-Op'tima konsentis.

- Jes, vi devas ekiri por serĉi al ni alian ŝirmejon, en sekura loko; pli bone, se ĝi situas proksime de Sankta-Francisko (9), ĉar tien la rivero neniam atingos, samkiel ĝi ne atingis eĉ dum la granda inundo. Don-Dolorsito ekmarŝis en direkto al la urbo. Je lia reveno la inundo lasis al la vido nur la tegmentojn de la kabanaj kaj la suprojn de la arboj en la plej malaltaj zonoj de TIGRA BUŜO. La ŝirmejo de familio Gajtan', konstruita sur altaĵeto de tereno havis en sia interno likvan tavolon da dek centimetroj. Jam kanotoj kaj ĉaroj transportis la mizerajn fatrasojn de la forkurantoj. Ĉi-foje don-Dolorsito navigis per kanoto. Li pli interesiĝis pri la hejma ilaro por ĉiu uzo naĝanta sur la kotaj akvoj, ol impresiĝis de la bildo ruina prezentiĝanta al liaj okuloj.

Donja-Op'tima akceptis lin, malkvieta kaj ĉirkaŭita de la infanoj.

- Kie vi trovis kabanon por ni ? demandis la virino.

- Kie?... Nenie. Mi traesploris la najbardomaĉojn kaj ne estas loko por ni.

- Nu, do ?... ĉu vi intencas lasi nin ĉiujn morti tie ĉi, dronintaj kiel lagostomoj (10) en la kavoj ?

Tion ŝajne pensis don-Dolorsito, en tragika rezigno je ĉia ideo pri savo, ĉar li sidiĝis, dum la akvo atingis liajn maleolojn, kaj li serene trakuris per la rigardo la solecan ĉirkaŭan pejzaĝon.

Je la instigoj kaj admonoj de donja-Op'tima li respondis per mallongaj frazoj plenaj de feliĉa fatalismo. Oni ne devas zorgi pri tio; plej konvene por ĉiuj estas resti trankvilaj.

Li havis la sperton pri la inundo de la jaro kvina (1905a). Kaj donja-Op'tima koncedis al si mem, ke ŝia edzo ĉiam kapablis solvi la malfacilaĵojn de la familio; ŝi esperis pri io bona meze de la aflikto. Kaj kiam la akvo jam transpasis iliajn genuojn, ili ekvidis alproksimiĝi kelkajn kanotojn kondukatajn de verve remantaj fajrobrigadaj soldatoj, kies kaskoj reflektis la sunflamojn. La vizaĝo de don-Dolorsito vigliĝis pro rideto.

- Ĉu mi ne diris tion ?... Oni ne devas stulti nek hasti... Aliaj zorgos eltiri nin el la kaĉo.

Provizitaj de taŭgaj savmaterialoj, la fajrobrigadistoj

rapide enŝipigis don-Dolorsiton kaj familion kaj poste la meblaron, kiu ornamis lian domon. Kaj minutojn poste luksa oficiala kamiono kondukis la familion de inundoj al ŝarĝovagono de la Centra Norda Fervojo. Dum la iro don-Dolorsito salutis per paradaj gestoj kelkajn konatojn. La piedirantoj de la pavimitaj stratoj sentis en sia koro ekgermon de kompataj sentoj je la preterpaso de tiuj malfeliĉaj senhejmuloj.

III. Kaj la malfeliĉaj senhejmuloj eksentiĝis treege large en la ŝarĝovagono, sendube sufiĉe pli komforte ol en la kabano de Tigra Buŝo. Krome ili plivastigis la rondon de amikoj per la loĝantoj de la najbaraj vagonoj, sidantaj sur morta relino, kontraŭ Avenuo A.

Donja-Op'tima admonis :

- Nu, ĉio estas tre bela; sed memoru, ke ni ne disponas eĉ pri cendo por plenigi la kuirpotojn. Vi tuj devas iri ien labori kaj ekkapti kelkajn pesojn (11).

- Ni estas inundoj! - replikis don-Dolorsito, levante la kapon kun hoka fiero.

Donja-Op'tima ne komprenis la abruptan respondon de sia edzo, ĝis alvenis iuj sinjoroj el la Popola Komisiono por Inundoj, antaŭitaj de kamionetoj kun varmaj vestoj kaj manĝoprovizoj. Ĉe la vagono de Gajtanoj ili malsarĝis amason da manĝaĵoj, dum don-Dolorsito postulis por li kaj familianoj ŝtrumpojn, subĉemizojn, pulverojn, kiuj ŝirmos ilin kontraŭ la malvarmo de pluraj vintroj.

Kaj por la familio komenciĝis unu el la plej kompletaj periodoj de abundo, kiun ĝi iam konis. En la ŝarĝovagono ne mankis provizoj nek varoj por certigi la bonstaton de la enloĝantoj. La publikaj instancoj kaj la grandkomercistaro, kortuŝitaj de tia malfeliĉo, klopodis montriĝi malavaraj al la kompatindaj inundoj. La ĵurnalistoj kunhelpis je la estiĝo de tiu ĝenerala animstato, diskursante pri la damaĝoj de la katastrofo, kaj pri la devoj koncerne la homan solidar-econ. Don-Dolorsito en najbara rondo, matetrinkante kaj mordetante biskvitojn, legis tiujn cerbumaĵojn, kiuj moligis kaj la leganton kaj la aŭdantojn, kaj konvinkis ilin pri ilia malfeliĉo kaj la neceso pri helpo.

Sed kio ĉefe interesis la povrulojn, tio estis la novaĵoj kaj prognozoj rilate la superakvon. Kaj ne kostis surprizi mienon de ĉagreneto en tiu rondo, se oni anoncis la malleviĝon de la akvoj ĉe Alta Paranao (12) kaj sekve la tujecon de tiuj fenomenoj en San tafeo mem.

En tiuj okazoj don-Dolorsito alportis iom da optimismo kaj trankvileco al la ĉagrenitaj animoj, opiniante, kvankam kun melankolia gesto, ke la plago plu daŭros, ĉar post tiu senprecedenca inundo, por pligravigi la situacion, trafos ilin la perioda inundo nomata "gada" (13).

IV. Malfermante la ŝoveblan pordon de la vagono, kaj forigante per membrestreĉado la restojn de la siesta dormemo, don-Dolorsito alfrontis iun komisionon de sinjoroj, kiuj alvenis proponi oficon al la povraj inunduloj. La vinĉoj estis pretigitaj por transporti ŝarĝon de trunkoj ĝis la holdoj de la ŝipoj, kaj en la kamparo oni petis laborfortojn por la agraj taskoj. Don-Dolorsito rifuzis la inviton per mieno aroganta kaj orgojla :

- Mi estas inundulo !

- Aldona motivo por ke vi laboru, diable! - replikis sinjoro kun semidaj trajtoj.

Don-Dolorsito ŝultrotiris kaj ne komplezis respondi.

La komisiono formarsiĝis poste, kaj facile oni povis konjekti ĝian fiaskon per la mienoj. Ĉiuj inunduloj argumentis motivojn por ne malkvietiĝi.

La sinjoro kun semidaj trajtoj, ĉagrenita, ekkriis, levante la brakojn :

- Vi estas bando de sentaŭguloj.

Ankaŭ donja-Op'tima juĝis oportune preteksti la hejmtaskojn por rifuzi la dungoproponojn de altrangaj sinjorinoj, almetitaj al la terura situacio prepari la manĝojn kaj aranĝi la litojn, ĉar la inundo estigis akran malabundon de domservantinoj.

Iun tagon oni avizis ilin, ke la porciojn ili devas ekhavi ĉe la domo de la Prezidanto de la Popola Komisiono.

- Tio estas trouzo - protestis don-Dolorsito devigita nun iri kun sia edzino kaj kelkaj korboj serĉi la proviantojn, kiuj antaŭe atingis ilin en la vagono.

Sed trouzo pli granda estis tiu de la Centra Norda Fervojo, kiu disponis, ke la inunduloj forlasu la vagonojn, necesajn por la transportado de la rikoltoj.

Ĉiuj, kun nura escepto de familio Gajtan', translokiĝis al la loĝejoj havigitaj de la Popola Komisiono.

- Ne estu obstina, don Dolorsito! - konsilis al li iu najbaro. Estas ankaŭ aliaj lokoj decaj. Mia edzino kaj mi, ni estas nun je nia plaĉo, kaj tre sendependaj.

- Kie ?

- En ĉelo de la polickomisarejo 2a.

- Se vi kontentiĝas per tio, des pli bone por vi. Mi konas mian rajton, kaj oni ne eltiros min tiel facile el la vagono, kie mi sentas min komforta.

Tiun rajton don-Dolorsito ekkonis pere de prokuroro Canudas (:kanudas). La leĝprofesiulo konsultis krustoplenan "Kolekton de Kutimaj Leĝoj", kaj montrante iujn artikolojn per la nigre malpura ungo, li demonstris al li, ke la Justico protektas lin, kaj kiel la Centra Norda devas entrepreni tedajn demarŝojn kaj atendi, ke longaj tempolimoj kaduku, antaŭ ol rajti la elloĝigon de la vagonloĝantoj.

Sed la fervojo ŝajnis forgesi siajn gastojn. Pasadis la tempo, kaj sub la zinkaj ondoladoj de la vagono restadis don-Dolorsito kaj familio. Lia antaŭzorgemo estis amasiginta tie, dank'al liaj senlaĉaj petoj al la Popola Komisiono, abundajn proviantojn por la familio.

V. Iun matenon je la vekiĝo, don-Dolorsito ekrimarkis, ke lia loĝejo skuigĝas kun stranga tremo. Kaj ekmalfermetante la pordon, li ekvidis novan kaj moviĝantan pejzaĝon. Ili iradis tra la kamparo, kaj rapide preterpasis la mejlofostoj.

La homo sentiĝis hezitema kaj premata de la respondeco. Nek li nek prokuroro Canudas iam konjektis tian eventualon. Kien pretendis la entrepreno ekzili la malfeliĉan familion de inundoj? Malnobla reprezalio kontraŭ tiuj, kiuj agis tiel nur metante sin sub la protekton de la leĝo!

Donja-Op'tima, malgluante la palpebrojn, sidiĝis ĉe la rando de la klaplito. Kaj eksciiginte pri tio, kio okazis, ŝi kritikis meze de oscedo :

- Jam mi diris al vi, ke ĉi ĉio alportos al ni malhelpojn!...

La filoj ne partoprenis la malkvieton de siaj pliaĝuloj. La novaĵo de la ruldomo donis al ili promesprenan perspektivon, kaj don-Dolorsito devis disdoni trafajn pugnofrapetojn inter siaj idoj, por forigi ilin el la danĝero fali ekster la veturilon. Kaj post tiu tago venis alia tago, kaj la vagono, kroĉita al vartrajno, ŝanĝis panoramon. Nun la ebenoj lasis lokon al la montetaroj. Ili trairis provincon Kordobo, kaj tiu spektaklo de raspaj ŝtonaroj, plenpuraj ĉieloj kaj malabundaj riveroj, interesis tuj kaj ravis poste la Gajtanojn, kiuj neniam estis malproksimiĝintaj unu mejlon for de sia urbo. Fine, la trajno haltis apud Koskino (14).

La stacidomestro ŝovis la pordon kaj surprizite demandis al ĝiaj neatenditaj okupantoj :

- Kiuj estas vi ?
- Inunduloj - informis don-Dolorsito.
- El kie vi venas ?
- El Santafeo.

La fervoja funkciulo malsereniĝis. Kion fari ? Tiu devis esti unu el tiuj vagonoj, kiuj forigitaj el la kontrolo de la trafikoficejoj, vagas kutime de unu loko al la alia de la reto, por resti foje forgesitaj ĉe iu morta relo. Kaj li avizis la ĉefdirektoraron. Ok tagojn postulis la alveno de la instrukcioj : ke li kuplu la perditan vagonon al la unue alvenonta trajno.

Kaj iun posttagmezon don-Dolorsito, promenanta en la ĉirkaŭoj, ekrimarkis time, ke lia vagono foriras. Li devis kuri je la maksimuma rapido de la kruroj, por esti finfine akceptita de la rondaj kaj amemaj brakoj de donja-Op'tima kaj la jubilkrioj de liaj idoj.

Don-Dolorsito esprimis proteston kontraŭ la plorinda organiziteco de la transportservoj de la lando; kaj tuj li fordonis sin je la rigardo al la pompaj pejzaĝoj, kiujn la naturo disvolvis je la flankoj de la reloj, dum la vojo al Montkapelo (15), por ĝuo de turistoj kaj komercaj vojaĝistoj.

En Montkapelo alia lokomotivo forportis al Sanhuano (16) la vagonon de la inunduloj, kaj de tie en direkto al Bolivio. El la finstacio oni petis ordonojn, kaj post la koncernaj demarŝoj, la vagono revenis al la deirloko.

VI. Post du monatoj, don-Dolorsito kaj familio eniris la stacidomon de Santafeo kun la spiritoj plenplenaj de la majestaj vidaĵoj de la ekskurso.

Dume, la akvoj, revenante al siaj fluejoj, estis retiriĝintaj el Tigra Buŝo, kaj ĉesis la helpoj al la kompatindaj familioj plagitaj de la katastrofo. Don-Dolorsito estis kaptita de spleno, kiun prokuroro Canudas kapablis mildigi per ĉi-paroloj konsolaj :

- Vi forlasos la vagonon, sed la fervojo devos kompensi al vi la perdojn kaŭzitajn de tiu postulo. Tio estas justa.

Kaj fakte la konsilistoj de la entrepreno decidis, por eviti proceson, submetiĝi je la demando, asignante al la inunduloj monsumon, el kiu prokuroro Canudas prenis por si, kompreneble, la leonan (17) porcion. Kaj la Gajtanoj, freŝaj kaj renoviĝintaj, iris returne al sia kabano de Tigra Buŝo post la travivado de la teruraj eventoj okazigitaj de

la publika plago, kiu tiel profunde kortuŝis la legantojn de la gazetoj.

Reveninte al sia ordinara ekzisto, Donja-Op'tima kaj don-Dolorsito sopiras je tiuj tagoj feecaj, kaj pripensas la eblon de alia kresko de la riverakvoj.

-
- (1) Argentina kutimo, la partiklo DOM metita antaŭ famili-nomoj kaj antaŭnomoj egalvaloras al sinjoro.
 - (2) Lokonomo, traduko.
 - (3) Rivernomo, hispanlingve = "sala".
 - (4) Santafeo: ĉefurbo de samnoma provinco argentina, ĉe la bordo de rivero Paranao.
 - (5) Partiklo DOMJA egalvaloras al sinjorino.
 - (6) por forigi parazitojn
 - (7) Suburbo de Santafeo (vd)
 - (8) Grandaj akvoplantoj flosantaj precipe sur Rivero Paranao.
 - (9) Nomo de monaĥejo, en suda parto de Urbo Santafeo.
 - (10) Vd. difinon en PIV.
 - (11) Argentina monumuo.
 - (12) Alta egalvaloras al NORDA.
 - (13) "gada" : argentina idiomaĵo, derivita el tiu fiŝnomo.
 - (14) Hispanlingve : "Cosquin", urbeto en provinco Kordobio 15 000 enloĝantoj, nuntempe.
 - (15) Hispanlingve : "Capilla del Monte", urbeto en provinco Kordobio.
 - (16) Ĉefurbo de samnoma arg-a provinco, ĉe la piedo de Andoj. Belega kaj moderna urbo nuntempe : 150 000 enloĝantoj.
 - (17) Argentinismo : la plej granda parto, alude al la forto de tiu besto.

Gudiño Kramer, Luizoz :

(:gudinjo)

L A V E R D A L A N D O

Elhispanigis : E.H.Garrote, Kordobo.

Antaù kelkaj jaroj Karlo Medina alvenis al tiu ĉi regiono en akompano de iu junulo el Santafeo (1). Li estis el Entrerío (2) kaj unuafoje li foriris labori en fremdaj bienoj. Liaj gepatroj havis kampeton, kiu reduktiĝis ĉiam pli kaj pli. La nura faro de la pli aĝaj fratoj estis dronigi en ŝuldoj la patron, kiu nun, preskaù invalida, adiaùas la plej junan filon kun larmoj en la okuloj. Karlo ridetas memorante la aflikton de la patro, kiam li estis forironta al la maizrikoltoj. Kaj nu, kial tia gringa (3) laboro ? Kial li prefere ne klopodus dungigi en la kompanio ?... Sed li emis ekkoni la mondon, kaj senpere foriris direkte al la sudaj lokoj.

Kvin jaroj pasis, kaj li ne revenis. Lia kunulo pluiris ĝis la Ĉefurbo (4), kaj antaù nelonge li ricevis novaĵojn, ke li laboras en fabriko. Li loĝas en suburbo de San Isidro (5), apud la ŝoseo, kaj tie li fondis familion kune kun alia laboristino.

Karlo finfine dungigi en la bieno "La Arbetoj", de la Dugan-oj. Estas multe da ŝafoj, kaj li havas bonan manon por la tondiloj. Nuntempe oni maŝintondas, sed ankaù oni devas esti lerta por ne ŝiri (6). Li estas konstanta laboristo, kvazaù respondeculo. Li formis bonan rajdilaron, posedas bonajn vestaĵojn, botojn, ponĉon, pordimanciĉan zonon ornamitan... "Tiel, oni povus diri, prospere", li skribas al la patro, kiu respondas al li pere de la spicisto. La patro skribas mallonge, aù eble la spicisto laciĝas kaj metas malmulte en la leteron... Kiu scius ?... Frue ĉi-dimanciĉe li selis sian ĉevalon kaj alproksimiĝis laù la ŝoseo, al la kooperativo. Ne estas pli deca loko, kaj tie li kutimas konversacii kun kelkaj junuloj, kaj ŝatas paroli kun Paùlo, tiel edukita kaj belparola, kiu laù la gestoj ŝajnas fraùlino; kaj bona gaùĉo li ja estas...

Li ne estas societano de la Kooperativo, kompreneble. Kiel li estus, kreolo malriĉa, dungita. Sed kiel personon

diligentan kaj laboreman la farmaj junuloj aprecas lin, kaj li eĉ foje dancis kun la fraŭlinoj, ĝentilaj kaj senpreten-
daj, kutimaj al la laborado, kvankam kompreneble ili aspiras,
tiel devas esti, ekrilati kun bonstataj junuloj, kun kiuj
povi establi hejmon.

Pri ĉiuj tiuj aferoj cerbumadas la junulo, dum li traku-
ras la distancojn laŭ la trotado de sia ĉevalo. Estas freŝa,
hela tago de monato majo. Se li trovos konatojn, kaj la di-
rektorito estos en bona agordo, eble ili povos ludi partion
je buloj (7). Aliaj distron disponeblan ili ne havas tie.

Kiam li atingas la magazenen, kiu situas ĉe la ŝoseo, kun
fronta benzinvendejo, la parto destirita al la kafejo estas
malfermita. Estas du-tri kaleŝoj de frue-alvenintoj. La suno
ĵus leviĝis. La fremdlandanoj, kiuj ŝajne kolektiĝis ĉirkaŭ
la bieno de la Dugan-oj, kaj kiuj komencis kiel koloniistoj
kaj nun la plimulto estas proprietuloj, homoj kutimaj je la
kamparlaboroj, bonaj rajdantoj, aprecas bonan bruton, sam-
kiel ili konas la valoron de planto. Nun ĉar ili havas la
Kooperativon, ili parolas pri ĝi kaj pri la komunaj aferoj,
kaj ŝajnas fratigitaj de religio.

Medina memoras pri tiuj knabegoj, kiujn li renkontis en
la stacidomo de Tandilo (8), kaj kiuj parolis pri la Fratar-
anoj. Komence li pensis, ke temas pri teamoj, kiuj laboras
en la stacio pri ŝarĝado kaj malŝarĝado, t.e. la portistoj.
Sed temis pri la membroj de la Frataro, la personaro de la
fervojoj lokomotivoj. La knabegoj parolis pri kongreso, kie
kunvenos la Frataranoj el Dorrego (9), kaj tiuj el Asulo (10).
"Ni, la Frataranoj..." "bonaj homoj ja la Frataranoj". "...
...nu, tial ke ni estas Frataranoj..." Nun li ekrimarkis,
ke tiuj sentoj aperas ĉe la junuloj kaj maljunuloj en la
Kooperativo. Ili estas fieraj pri sia magazeno, sia foiro,
siaj kunvenoj, siaj estroj.

Li sentiĝis iel margene, iel delokita el tiu socio :
"ili ne estas Frataranoj, nek Kooperativanoj...ili...nu, kiuj
estas ili..?"

- Hola, Medina! Kiel vi?

- Nu, jen mi celas pasigi la matenon ĉe la publiko...

Paŭlo eniris momente por saluti la homojn, sed li diris,
ke li devas pluiri, ĉar ili nun malhavas traktoriston, kaj
li devas helpi, ĉar kontraŭe malprogresos al ili la hordeo.
Li riparadis la traktoron, kiu jam ne eltenis tiel longajn
laboretapojn. Li iris tien serĉi la gazetojn, kiujn alportis

la omnibuso, ĉar lia patro jam ne kontentiĝas per la novaĵoj de la radio... Li volas vidi ilin per siaj propraj okuloj sur la gazetoj...

- Ĉu al vi plaĉas trinki ion?

- Ne, Medina; mi trinkos nenion.

- Mi, pro enuo, ĉu vi scias? foje mi emas eltrinki unu pokalon...

Li diris pro enuo, nu, senkonscie; sed ja tio okazas al li. Kiam alvenas dimanĉo aŭ iu festotago, li sentas enuon. Li eliras, ĉar ankaŭ ne decas, ke li pasigu sian vivon post la brutaro, aŭ turniĝante sur la litotukoj, sed li tuj ekenuas. Pri kio li konversacius? Per kio li distriĝus? Li komprenas, ke li havas nenion pri kio zorgi. Legi, apenaŭ kaj de temp' al tempo iun malnovan revuon. Li rigardas ĝiajn bildojn, kaj sufiĉe! La novaĵojn li ekkonas per konversacioj aŭ ĉar vespere oni aŭskultas la radion en la stalodormejo de la kamplaboristoj. Li scias pri futbalo kaj pri la dimanĉaj ĉevalkuroj en Palermo (11) aŭ San Isidro (12). Estis militoj; oni ĉiutage parolas pri la milito, sed li kaj liaj kamaradoj en la bieno malmulte scias pri la milito. Nenio komuná ekzistas inter ili; ligitaj ili ne estas kiel la Frataraĵoj, aŭ la Kooperativanoj. Kaj krome, kial ili kunligiĝus? Eble, kion li bezonas, tio estas edziĝi. Jes, ke oni donu al li establiĝojn kun kelkaj ŝafoj, kaj profitoj po trionoj, terpecon por prisemi, kaj eble li sukcesus kaj progresus. Li ne timas la kamplaborojn. Revene, ĉirkaŭ tagmezo, jam lia ĉevalo estis maltrankvila pro la hejmsopiro; atingante vojkruciĝon sub eŭkalipto, kiu staris ĉe la loko, kie antaŭe estis la stablo de Merengo, li ekvidis la vagabondon, kiu boligas akvon en ladaĵo. Al li subite ŝajnis rekoni Markon Viljagra, tiun parencon lian, ĉevaldresiston, kiu iam, antaŭ la lasta milito, laboris kun li en Maria-Izabela (13). Sed ĉi-vagabondo estis fremdlanda kaj maljuna. Kiel estas nun al Marko?... Foje, pelante bovidojn en direkto al Maria-Izabela, ili iris kune al La-Brava, vilaĝeto norde de Santafeo, kie estis funkcionta brutaraŭkcio.

La viroj el La-Brava estis famaj: ĉiuj ŝajnis krudaj kaj kutimaj batali kontraŭ la aŭtoritatuloj. En la drinkejo li kaj Marko estis atendantaj la finon de la aŭkcio, kiam eniris altkreska homo, tielnomata Correa (:Kor-rea). Bela viro, kun vepra barbo, ĉapelrubando, larĝa leda zono tegata de boliviaj moneroj, la tranĉilego malantaŭe elstaranta el

la jako el gabardino. Glason da brando li mendis, kaj invitis. Akceptis ĉiuj. Kiam post longa tempospaco li foriris, salutinte ĉiujn tre ĝentile, la drinkejmastro ekparolis...

- Nu, kia homo, Correa! Jen! Nun li estas polickomisaro en San-havjero (14). Li naskiĝis tie ĉi, sed de antaŭ multaj jaroj li vagadas tra provinco Entrerio. En Viljagvajo (15) li travivis kelkajn malfacilaĵojn kun la policestro, iu B. Ĉe la unua okazo li trafis lin per trabuko-pafo (16), kaj li estis enkarcerigita. Post kelkaj jaroj li estis liberigita kaj li rovenis al tiu ĉi loko. Li jam estis famkonata. Antaŭ kelkaj monatoj li estis tie ĉi, kaj mi demandis al li... Kiel estis tiu afero kun la tielnomata B. ?... Correa rigardis min trankvile, kaj diris al mi : "Nu, kiel povus esti, amiko ? La homo bezonis iun konsilon, kaj mi donis ĝin al li... Ĉiuj priridis la spritaĵon, kaj tiun nokton je la transiro de rivero Saladiljo, Marko kaj li memoris pri tiu viro, kiu nun estas aŭtoritatulo, kaj ja ne konsentus ricevi konsilojn tiajn.

- Nu, kia ulo, nome Correa !

Tiun vesperon, Medina sciigis pri la akcidento sur la ŝoseo. La aŭto de Paŭlo renversiĝis ĉe la vojkruciĝo, kaj li mortis frakasita. Al li tio ne ŝajnis vera. Tiel kontenta kaj sana li vidis lin antaŭ kelkaj momentoj. Tia estas la vivo de la homo, amiko! Kaj meze de tiuspecaj pripensoj, li preparas sin por ĉeesti la funebbron tiun vesperon, en la hejmo de liaj gepatroj.

Lau la paŝado de sia ĉevalo, tiun vesperon Medina revenas al la brutbieno. Lia menso estas konfuzita. La hufoj de lia ĉevalo tretas tiun teron humidan de la verda lando, de la pampo humida, kie li estas establonta sin por ĉiam. Pampo plenkovrita de maizkampoj, de bienoj, de kolonioj, de farmoj, de kooperativoj, kaj kie ankaŭ la fatalo kaŭras kaj juna homo mortas ĉe la laboro. Jes, amiko. Estas aferoj de la destino.

Kaj dum li malselas, Medina intencas peti la establenojn kaj serĉi virinon, ĉar virinoj ne mankas ĉirkaŭe, kaj bredi ŝafarojn kaj semadi kaj esti ankaŭ li, kooperativano, certa, ke nur tiam li estos bona ido de la lando.

- (1) Argentina provinco, kies konturo similas boton; ĝi etendiĝas norde-suden laŭlonge de la okcidenta bordo de rivero Paranao.
- (2) Argentina provinco; ĝi etendiĝas laŭlonge de la orienta bordo de la rivero Paranao.
- (3) Adj. "gringo" estas argentinismo por : ido de fremdlandanoj, precipe italoj. Komunuze oni aplikas tiun vorton al ĉiu persono kun helaj haroj kaj blanka haŭto, eĉ ne priatentante lian/ŝian devenon.
Rimarku en la novelo la kolizion de la du diferencaj mondoj de gaŭĉidoj kaj gringidoj.
- (4) Temas pri Bonaero, ĉefurbo de la lando, la ĈEFURBO antonomazie, en la popola lingvaĵo.
- (5) Urbo en la areo metropola de Bonaero.
- (6) Temas pri la felo de la ŝafo, kiu perdas valoron, se ĝi estas ŝirita de la laboristo dum la tondado.
- (7) Argentina ludo, temas pri globoj el ligno.
- (8)(9) Urboj en Bonaerio.
- (10) Urbo en Bonaerio. Argentinanoj ne povas prononci la hispanan z, do la hispanlingva nomo de tiu urbo : AZUL' ili prononcas: azul'; pro tio mi transskribis fonetike. La originalo signifas: blua.
- (11)(12) Ĉevalkurejoj en metropola areo de Bonaero.
- (13)(14) Nomoj de urbetoj en provinco Santafeo.
- (15) Urbo en provinco Entrerio.
- (16) Argentinismo. TRABUKO = pulvopafilo mallonga, el larĝa tubaperturo.

Lugones, Leopoldo :

R E P A G O

(El "La gaùca milito")

Elhispanigis : E.H.Garrote, Kordobo.

La loka pastro malbone kondukis al la patriotoj. Li konspiris kontraù ili, kaj lia nevo la licenciito helpis al li pri tio. Certe ne svarmis la ribelemaj pastroj. Se iuj ekkuraĝis, tiam la episkopoj ekskomunikis ilin kaj renegatiĝante ili insurekciis kun siaj "respubliketoj" (1) de landidoj, senĉese persekutataj de la Reĝaj trupoj.

Provianton kaj municion ili petis prunte ĉe la kabanaroj. Ili batalis; ili diskurse instigis dum la danĝero, kaj preĝadis pro la agoniantoj. Se ili trafis kaptitojn, ili malhonorigis kaj poste mortigis ilin. Sed ili eble ne transnombris la dekduon. La plimulto predikadis obeemon al la Reĝanoj (2), apostrofis minace per la infero. Ili insistadis admone kun kompleza ofteco - kontraù la Patrio, ne, ne, neniam! - sed kontraù la herezuloj! Tiel agis la pastro el tiu loko kaj lia nevo la licenciito.

Ĉi-lastata per sia dolĉeca religieco, siaj abstinencaj okuloj, sia stilzobirda mieno, kies kuntiriĝanta modesteco vindiĝis per iu kvazaŭ doktora sutano, ŝajne ĉian suspekton eliminis. La fervoro pendis de lia nazo, kiel la kresto ĉe la meleagro. Lia ĉasteco ripreĉadis per melankolia aŭdaco. Lia animo de maljuna fraŭlino kaŝiĝis ĉe lia verto tute libera je haroj. Sed malgraŭ tia aspekto, li superadis kiun ajn pri latina lingvo; kaj kiam li licenciigis antaŭ la solena profesora podio en Kordobo, eĉ ĉe unu punkto li ne fiaskis dum la ekzamenoj. Li spicadis la brilajn predikojn kaj la panegirojn energiajn. Li retranskis bone la plumojn (3) kaj fabrikis inkon el sulfido.

Pro la revoluciaj eventoj ili estis enfermitaj en tiu vilaĝo. Kiomfoje la armeo de l'Reĝanoj trairis ĝin, ili ambaŭ favoris ĝin, konsiderante sin ĝiaj spionoj, pretekste de konfeso kaj baptoj.

Sed tre baldaŭ la malamikeco ekŝieĝis. Ĉirkaŭpremitaj de fero (4), la trupoj retretis ĝis Urbo SALTA.

Ili malsatadis, ne ekhavis brutaron, ili disŝutiĝis serĉante ĝin; kaj eltrovinte nenian spuron de fendita hufo en la solcecaj lokoj, ili evakuadis ilin, kun la gerilanoj algluitaj al

ilia ariergardo, inter pafadoj kaj bruligoj.

Iun fojon, la nevo estis timigita de terura ŝerco. Sur glathara mulo li haste rajdis direkte al la paroĥo. Jam ek-noktiĝis, kaj la ĉirkaŭaj montoj bluiĝis. La pado mallarĝiĝis laŭ iuspeca koridoro lintelita de du arboj. Ĝus kiam li eniris tiun mallarĝecon, lia rajdbesto forglitis kvazaŭ akvo el liaj kruroj; kaj post kiam li reagis pro la stumblo, makabra vidaĵo prezentiĝis al li. Elstaris du homaj figuroj sidantaj sur la disbranĉiĝo de ambaŭ trunkoj. Iliaj misformitaj pozoj, la fetoro, kiun ili ellasis, malkovris bone du kadavrojn levitajn tie kvazaŭ pajlöhomojn, pro funebra ŝerco de la gerilanoj. Reliefigis du brilaj butonoj en la duonmallumo; sekiĝinta mano. La malluragulo timis pri la fantomoj; kaj devigita mallongigi la vojon, li erarvagis tra la plej malglata kaj atingis la paroĥon jam tre malfrue nokte, gratita de la dornoj, kaj kun piedo elartikigita. Lia malamo je la gerilanoj perfektigis pro lia timo, kiu fariĝis paniko. Plioftiĝis liaj ruzaĵoj kun la celo damaĝi ilin; kaj ĉe ĉiu sukceso li sentis kontenton preskaŭ fizikan, ekzalton kiel la infanoj, kiam ili mordas per la ĵus aperantaj dentetoj.

Intima malŝato unuiĝis al liaj ideoj pri ekstermado. Skurĝon al tiuj herezuloj, por humiligi ilin! Flamojn vastiĝemajn al ĉio, por ruini animojn kaj korpojn! La inojn kaj la idojn enfermi en brutkorto, sen nutraĵo, sen akvo. Orfoj erarvagantaj tra la arbegaroj, eligante bestecajn terurajn kriojn. Virinoj pelataj de la hundoj, unuj; aliaj, blasfemintaj, kun brulvarma ŝtono en la buŝo. Iu bubo kun seneĥa (5) ploro, kies buŝo plenas je vermoj, apud la patrino ligita. Kaj ili, la ribeluloj, elartikigitaj ĉe la turmentmaŝoj, aŭ tanitaj de pugvergado, aŭ svingdancante ĉe la pendumilo... Ah, eldistili tiujn vivojn, tranĉadante la koron kiel cepon, unu tavolon post la alia, kun torkvemada (6) plezuro!... Ruinigi la agrojn, la arbojn, la kabanarojn; kaj super la regiono tiel detruita de la kruelegeco aliancita al la anatemo, super la ruinoj sen plendoj, la fantomo de Lia Reĝa Moŝto.

Elstaris grandiozeco infera en tiuj meditadoj. La mastro emis ĉifi eĉ la ĥimieron pri potenco, kiu iluziigis lin; kaj ĉi-lastata ununura penso leviĝis super lia frunto kiel tufo. Sen amo, kiu varmigus lian vivon, primokita de ĉiuj trompoj de la destino kaj elstaranta pro malbeleco, tiu obskura bigoto revis pri povo tiel giganta, ke inkluzive li fariĝus tute polvo, pro kontrasto. Supre la Reĝo, nu! Alte, tiel alte, ke liaj piedoj jam estus montpinto; sed malsupre, tre malsupre, soli-

daran malgloron por la ceteraj; ke neniu posedu ion, krom la jugo!

Liaj projektoj ŝajne estis favorataj de la politikaj konjektoj, kiuj trakuris la sudon. Oni parolis pri iu reĝo por Ameriko, eble iu Inkao... Li ekvidis espereton pri tio, en-vortigante la ideon dum siaj konversacioj kun la lokaj gerilanoj. La Inkao-Reĝo signifis la savon. Tiel ili ĝuus la liberon, ordon kaj registaron el ilia sango. Kelkaj komplezis, kaj la trompo komencis prosperi; sed li forgesis la ĉefajon: la Lokestron, kiu tiam forestis. Se lin oni subaĉetus, ekfla-grus la fajro, miksante en la sama herezo la gerilojn kun la Konstitucia Asembleo, jam duone persvadita... Fine, kiam li revenis, la licenciito esploris lin, ne sen ĉirkaŭfrazoj; sed je la unua atako, la alia sufokis lin per la plej rulvolva neado.

- Ĉu Reĝojn?... Kortegojn?... Vortoj tute sensignifaj al li. Ĉu Indiana Reĝo ? Kvazaŭ azeno kun arĝenta rajdilaro! Nu, li devus ĉesi implikiĝi je tiuj bagateloj, kaj dediĉi sin al siaj latinaĵoj! Pri tiuj aferoj jam okupiĝos la personoj, kiuj devas.

* *

En konkubineco kun junulino el la najbareco tie proksime loĝis la Lokestro. Bela paro; li, bruna, kun hirtaj lipharoj kaj longa hararo netondita. Ŝi, tre gracia, en siaj dekokjaroj, preskaŭ tute blankhaŭta, okuloj plenaj de narkota mallumo, kaj la hararo nigra kaj nebuklita falis sur la frunto kvazaŭ flugiloj de laca hirundo. Pro ŝia subtila beleco, oni atribuis al ŝi nobelan devenon. Unuj atribuis ĉi-lastan al iu Inspektoro de la Reĝa Trezorujo, kiu trapasis tie; aliaj al iu ventkapa duanaskito, kondamita de la Inkvizicio, kiu multe da ametaĵoj akiris en la vilaĝo...

De antaŭ kelke da tempo la patrineco, transformante ŝin, dikigis ŝiajn lipojn kaj makulis ŝian haŭton per internaj fruktecaj maturaĵoj, en tuto de submetita animaleco kune kun angela plenecc. Elde la internaĵoj de la frukto, ŝia vizaĝo estis taŭzita de perturbo antaŭdiranta verŝajne la dolorojn de l'akuŝo; kaj ĉe la halucino pro la mistero latentaj en ŝi, ŝi disvolviĝis pli feliĉa, pli virineca kun beleco, kiun la vira kontakto eĉ pligrandigis, kun la maldikaj virginaj mamoj iĝintaj doloraj grapoloj, la acido iĝis nektaro; la limfo, sango.

La junulino kaj la Lokestro ĝuis sian nupton simile al la

birdoj, sen ia konsekro, krom la kisoj; kaj el tiu cirkonstanco tiam la licenciito ĉerpis rimedon. Kontraŭ la kutimo, iun matenon li iris viziti ilin; li aperis unu fojon kaj plurfoje; li admonis ilin pri la deco, kaj la kulpoj...

La gaŭĉo baldaŭ ĉagreniĝis. Naŭzis lin tiu Patronia-pregulo. Kaj iun tagon, ie ajn atakante lin, li malkonvinkis lin per du argumentoj; tiam rezignis la bigoto; kaj baldaŭ poste la junulo foriris ekspedicie.

Tuj poste, dum lia foresto hispana trupo enfermiĝis en la loko. La ĉefo ekloĝis en la paroĥo; kaj tie li kunvokis la virinojn por ke ili deklaru al ili. Kiel kutime : ili nenion sciis. Ili replikis subite, kun tia aŭdaco, ke la Reĝanoj ekmiris. La virino de la Lokestro ankaŭ prezentiĝis. Same : nenio kaj nenio. Memoris ŝi nur, ke iam la licenciito transdiris al ili kelkajn aferojn pri iu Inkao-Reĝo...

La oficiro ĝenis sin : nu, ŝia edzo, kion li opinias pri tio ?

- Fi! Ŝia edzo mokridas pri tiu stultaĵo. Lin oni ne trompus tiel; por regi ilin sufiĉas ja kun Komandanto Güemes(7), landido, respektata de ili, patro de la malriĉuloj. Nu, for reĝojn, diable! Fivortoj de la bonaeraj kleruloj! Tiel argumentadis ŝia edzo.

Sen ia delikateco ŝi elĵetis la diskurson, kiel iu fortranĉanta sian ulceron. Pro tio, oni malliberiĝis ŝin, kaj oni starigis gardiston ĉe ŝia pordo en la paroĥa domo, kiam la Reĝanoj retretis al sia kolono. La junulino, sesmonate graveda, malsaniĝis pro la perforto.

Du tagojn la eniro al la paroĥo restis barita kaj ĝiaj loĝantoj retiriĝis, ne lasis sin vidi. La antaŭan nokton la licenciito petis la servojn de la loka akuŝistino, kaj kondukis ŝin al la paroĥo, sed ĉiuj, paralizitaj de teruro, ne scivolis pri la kialo.

Tiel komenciĝis la sekva punkto, nubokovrita. Tra la pordo de la paroĥo oblikve vidiĝis kandelradio, regule tranĉita de la ombro de la marŝanta gardisto. La praarbarego, kiel parfumujo agitata de la vento, revigliĝis sian difuzan aromon, kiun de temp' al tempo sufokis la zefiro el la fojnejoj. Timo estis flegata en ĉiu kabano; kaj dume, en la ripozanta bivako de la gerilanoj, la ĉefo, metita samtempe en du lokoj far inkubsonĝo, kun la korbatoj refrapantaj ĉe lia gorgo, nete ekvidis la alvokon de la paroĥo.

Onklo kaj nevo dormetis sur siaj seĝoj; sur unu el la litoj kuŝis virino, kies trajtojn misformadis la flagro de

kandelo ĉe angulo sur la planko. Apud la alia lito estis rimarkebla fusilo, kaj ĉe la kontraŭa muro, krucifikso. La pastro portis sian bireton, la licenciito sian ĉapon. La virino sendube kuŝis morta... Ĉu virino mortinta? TIE! TIO ne estis komprenebla!... Virino mortinta!

Kaj subite, kvazaŭ tondro ruliĝus tra lia kranio, prezentigis la certeco. MORTINTA! TIE! MORTINTA!

Forte li enspiris la aeron, li vekigis vizaĝe al la nuboj, kun la sensoj malklaraj, kun singulto ĉenita ĉe sia gorgo, anhelante kvazaŭ li plorus interne. Ankoraŭ blindigis lin la lumo de tiu ĉambro. Kaj lin maldormigis lia konvinkiĝo, ankoraŭ supervenkanta la absurdon. Kontraŭ ĝi li luktis, la dormemon li provokis, centobligante sian energion. Estis ĉio neebla. Tiu vizio konstante senkonsciigis lin. Ĝi finfine tiel malkvietigis lin, ke trenante sin ĝis unu el la dormantaj homoj, li skue vekis lin mallate; flustre, li tuj ordonis. Li transdonis al li sian ĉefecon; poste li atingos ilin laŭ iliaj spuroj, se ili estus devigitaj retreti el la pozicio...

Sonoris grincado de hufferoj, tintado de spronoj, trotado meze de la arboj. Kaj jam malproksime, tute ĉirkaŭita de la nokto, la rajdanto ekspronis sian hufulon.

Galope, baldaŭ tutrapide, li nesingarde englutadis la mejlojn. De tempo al tempo kutima interjekcio skuis la bruton, kiu per: HOTO! strebadis pluen.

Ombroj, rokegoj, arbaroj; unue, vagaj hundobojoj pli proksimaj poste, eĉ pli... Hazarda ekkrio en la ombro:

- Haltu! ... Kiu vivas?...

Pafu... aj!...

Batmalfermiĝis la pordo de la paroĥo, kaj la gaŭĉo ekaperis barante ĝin per sia figuro. Estis ĉio tute samkiel antaŭdiris lia vizio, krom la fusilo, kiu mankis kaj la domanoj, kiuj akceptis lin surgenu. La vizaĝo de la nevo, kun aspekto malgrasa kaj malsanema, montris vaksan paŭton; tiu, de la alia, belpuga (8) en sia graseco, montris en eta elstaro la okulojn, nazon kaj buŝon similajn al tranĉetoj ĉe la konvekso de melono.

La gaŭĉo, post tre mallonga hezito, forprenis sian ĉapelon, kaj direktigante malrapide al la lito de la mortintino, li sidiĝis sur kofro, kiu subtenis la litkapon.

Fulme atakis la aliajn la penso forkuri, sed samrapide ĝi estingiĝis; ĉar la lukto, en kiu pereis la gardostaranto, lia

subita morto, el ununura aj!, entenis tiun konjekton. Ĉu eble iu gvatas ekstere? Se ne, kial ne singardas tiu homo? Kaj mirigitaj, ili ree senmoviĝis. La gaŭĉo meditado. Liaj okuloj plilarĝigitaj de la deliro profundiĝis en la ekstera mallumo. Kun potencaj anheloj la ĉevalo, ekstere, refortiĝis. Kaj en tiu soleco kun klara murmuro de akvotorento, en tiu alta horo dronis ĉiá alia bruo.

Eĉ ne palpebrumis la fatala vidvo. La kubutojn sur la genuoj, la dorson arkiĝintan, akre elstaris lia hararo, liaj palpebroj meditemaj, lia mentono surŝutita de lipharoj.

Kaj ĉar la kandelo lumigis lin elde la planko, lia ombro vastiĝis sur la muro kvazaŭ flago. La ombro tremis iomete; li, ne.

Ankaŭ ne dolorigis lin ĉagreno. Nur turmentis lin tre interna doloro, io akre malvarma, kvazaŭ turbo kun ŝira pinto traborus lian koron. La silento aŭguris katastrofojn. En la ĉielo sendube daŭrigis balanciĝi la nubegoj, laŭ amasoj el ombro kaj silento. La gaŭĉo enpensiĝis ĉiam pli kaj pli.

Pojfoje li malrapide glatigis la harojn de la mortintino, li aranĝis en erarvaga gesto ŝian kolĉenon el bidoj; kaj kvazaŭ ĝeme lulante ŝin, li elparoladis :

- KOMPATINDA! KOMPATINDA !...

Ĉe sia mezo la nokto kovriĝis de pli obskuraj nubegoj... Fine la pastro susuris :

- Filo?...

Senmoveco, silento.

- Filĉjo?... petegis la maljunulo; kaj komence balbute, poste per malespera elokvento, li ekskuzis sin.

"Li ne riproĉu al ili pri maljustaĵo. Ĉu bedaŭrition?... Neniu pli, ol ILI! Sed ŝi, kompatinda, multe ekkoleris kiam la oficiro, kiam ŝi parolis malrespekte, promesis al ŝi cent skurgobatojn. Eĉ ne per plumo oni frapis ŝin, ja neniam! Rimarkante, ke pro la kolero ŝi suferis mortoriskon, oni sanktoleis ŝin, por ke ŝi ne mortu peke".

Li ŝiradis siajn harojn, bedaŭrante la forpason; kaj lia gelatena karno preplatiĝis sur la seĝo kun aflikta sinteno. Kun olea rideto sur la lipoj, la nevo fuŝparolis argumenton; sed la pastro subpremis lin, tuj eligante la vortan pelmelon:

" - Sanktulino!...ŝi estis sanktulino! Abortis ŝi, certe, sed tio koncernis la akuŝistinon. Senutilaj

estis la medikamentoj. Ŝi pentis, bonŝance, kaj Jesu-Kristo pardonos ja al ŝi. Sankta, sankta! Nun ŝi en la ĉielo estas preĝanta pro li... Juĝoj de Dio! Ne kulpigu ilin pro la krimo de aliaj. Afliktoplenaj ili funebros al ŝi, kaj li, senpage, kantos al ŝi la mortopreĝojn..."

Animpremita ĉe la fundo de sia malfeliĉo, eĉ ne naŭzis lin tia propono. Kaj en ĉio superregis ideo traboranta lian kapon de tempio al tempio : MORTINTA !

La alia balbutadis :

"Multe, multe da sango. La akuŝistino eble elĉerpis ŝin. Elsangiĝis ŝi. Sed pri kio, pro Dio, pri kio ili krimis? Atestas la Sinjoro krucumita."

La nokto estis finiĝanta. Kvazaŭ dormanto ĝenata de anakronismaj babiloj, la viro susuris

- Ŝŝŝŝ!...

Ĉe tiu momento tie proksime kalandro ekpreludis sian kanton.

Unue estis trilo de malvarmema birdido; poste longa fajfo iom-post-iom ŝirata, poste molaj klukoj, glugloj de elokventa akvo en la gorgo; brila konfuzkriado parodianta la polifonion de la praarbaro; ree fajfoj, ree ĝemaj pepoj; hidraŭlikaj klavofrapoj kaj subite, simile al vigla konvolvulo, treege neta pepafo ŝvebanta per abundaj skaloj.

Al la firmamento, kiu blankiĝis mildiĝante siajn stelojn, trobadoris sian himnon la birdo. Ravita de lirika ekstazo, ĝia animo soris al la tagiĝo kiel flameto. Fieris ĝi pro la etera ebruiĝo de la altaĵoj, pro la deliro ŝvebi en la senfineco, kiam ruĝiĝas la horizonto pro malproksimaj helaĵoj, trans la tempo, trans la vivo...

Prikantis ĝi la idiliojn per la stoplo, la junan patrinecon per la arbusto, la malkvieton per la ovetoj, kiujn la flugilo ŝirmas kvazaŭ ĝia eta koro modulus ĉe la pinto de sia beko. Estis ĝi jubilkanto de la mondo al la tago; filo de la suno ĝi ŝvebis super la mallumo, por ekvidi ĝin unua, salutante la senfinecon en muzika ekstazo de senmezura alteco.

Esprimis ĝi la vekigon de la suproj, la malkvieton de la arbaroj, kiuj estos nuancitaj de la aŭroro, la heligon de la neĝoj, la efemeran ĉarmon de la nebuloj en lilak-koloraj vaporiĝoj kvazaŭ vespiroj korpiĝantaj; ĝojegis ĝi kun jubiloj

de fekundeco en la freŝa frumateno, kaj en ĝia ludado, tiel fleksebla kaj fajna ĝi estis, enestis ekde la roso, kiu irizas ĉe la gazono siajn mil kristalajn okuletojn ĝis la senmezura aromo de la montego. Kun renovigita verovo trilis la ŝtalstreĉita kordo de la kanto. Laŭ kontinueco de likva inspiro ondetiĝis ĝia torento, dum pli base ĝi harmoniigis mildajn kontaktojn de garnituroj. Laŭdadis ĝi la fortikajn taskojn : la semadojn kun iliaj voluptaj temperaturoj, la kuradojn tra la nuda dezerto, kie frostiĝas la karnoj kaj hardiĝas la fortoj, la militon mem kun ĝiaj vundoj, kiuj ŝutas en la spiritojn kvazaŭ braĝojn incenskovritajn...

La gaŭĉo aŭskultadis kaj kortuŝiĝis. Tie proksime de sia kabano ŝi havis neston de kalandroj, kies idojn ŝi intencis bredi... Kaj tiu kanto simila al diktamo (9) milde dolĉa, konsolis lian solecon, dum la animo de lia trezoro neniĝis en la pureco de l'tagiĝo.

Matenkrepusko. Kontraŭ la pordo, la ĉevalo paŝtis sin. Pli malproksime, ĉirkaŭante la pejzaĝon, monteto malrapide bluiĝis, kaj super la bluo ŝvebis la fuma peniko de iu fajro. Iu ĉakalako (10) kluĝis ĉe la rivereto, kaj ĝiaj blekoj ŝajnis tirataj pulioj. Interne eĉ vespiro ne perturbis la senmovecon.

La komparano rektiĝis kun tremeto, direktis sin al la pastro, kaj ŝovante lin puŝe :

- Pluiru!

Jam ekstere, li riglis la pordon, kaj la nevo restis sola kun la kadavro.

En la korto fariĝis konfuzbruo kvazaŭ singultoj, blasfemoj, io baraktanta kaj rezistanta... Poste nenio.

Ree malfermiĝis la pordo, aperis la ribelano :

- Pluiru!

La licenciito eĉ ne palpebrumis. Lia vizaĝo disfalis kiel stativo. Apenaŭ la oreloj konservis sian rigidecon. Tio, jam sen io homa, ŝajnis kompatinda marioneto kun la ŝnuroj rompitaĵ.

- Pluiru!

Kvankam la timo ŝtonigis lin, bone videblis, ke en lia interno kompleta tremado retroirigis lin.

- Pluiru! - ripetis la gaŭĉo, nun interne, manon ĉe la nuko de la kompatindulo.

Li obeis ŝanĉeliĝante, kun la genuoj tremantaj, la irmaniero robota.

Meze de la korto kuŝis pistujo malpura de freŝa sango,

kaj apude la korpo de la alia, surventre. Malhela makulo estis etendiĝanta ĝis liaj femuroj. La unua sunlumo briligis la ŝtalo-grizan koloron de lia hararo. Oni imagis pli proksime la kadavron de la gardostarinto, ĉe kavo de la herbejo. La gaŭĉo disponis :

- Ekkuŝu... Jen tie, por tratranĉi vian kolon.

Sterniĝis la nevo apud la pistujo, puŝata de lia ekzekutonto.

La klingo ektranĉis, eliĝis krio preskaŭ tuj raŭkigita de la gluglado de sango, kiu elfluis laŭ etaj ŝprucoj...

La Lokestro denove eniris la ĉambron. Li rigardadis la murojn, la Kriston en la fono, siajn manojn makulitajn de sakrilegio kaj morto. Dum unu horo li laŭlonge trapaŝis la ĉambron, senĉese ripetante, kun obtuza voĉo :

- Bone...Bone...Bone...Bone...

La ĉevalo subite ekmontris la kapon, kun tiuj okuloj siaj de infano kaj herbejo. Li vidis ĝin antaŭenigantan la muzejon, scivole, kvazaŭ kompreni; la doloro ekbaŭmis en lia brusto, kaj nur tiam, premante la kadavron sur sian vizaĝon, li eligis uraĝanon da plorĝemoj.

- (1) Geriloj en Alta Peruo, poste nomata Bolivio, originintaj el popolaj ekribeloj, kaj tiel nomata ĉar ili agis sendepende, kiel aŭtonomaj respublikoj.
- (2) Soldatoj fidelaj al la hispana reĝo, en opozicio al la patriotoj, kiuj batalis pro la sendependeco de la lando.
- (3) Plumoj el birdoj, uzataj kiel skribiloj.
- (4) Sinonimo de ARMILOJ (PIV).
- (5) Obtuza.
- (6) Laŭ la nomo de la plej kruela hispana inkvizitoro.
- (7) Argentina generalo, bienmastro, filo de alta funkciulo hispana. Li organizis kaj komandis armeon formitan de gaŭĉoj Saltaaj, kiuj atingis brilajn venkojn dum la kampanjo pro la Sendependeco, barante la eniron de la Reĝanoj tra la norda landlimo.
- (8) La pufaj vangoj similis pugojn. Belpuga estis kromnomo de Venera Afrodita.
- (9) Planto, labiaco kun purpuraj floroj.
- (10) Argentinismo = arbara meleagro.

Notoj pri la aŭtoroj

GUDIÑO KRAMER, Luis En sia naskiĝprovinco Santa-Fe (hisp.= Sankta Kredo) li skribis la plimulton el sia verkaro, kaj multaj el liaj libroj estas saturitaj de ĝiaj pejzaĝoj.

Li radikigiĝis al tiu tero, kie li starigis sian loĝejon meze de kamparanoj, kaj estis instruisto. Li konis la kampulon, la dimension kaj profundecon de liaj revoj, esperoj kaj fiaskoj. Li partoprenis lian manĝon, liajn morojn kaj kutimojn, liajn mitojn, fablojn kaj legendojn. Liaj roluloj agas en nia moderna epoko : gaŭĉidoj kaj gringidoj, fervojistoj, ĉevaloj, bienoj, kolonioj, sindikatoj, kooperativoj, traktoroj kaj kamionoj. Li kronikis fidele la vivon de la kamparanoj, kun ĝiaj trajtoj, ĝiaj anekdotoj, ĝiaj plezuroj kaj suferoj, ĉar lia rakontmaniero similas al kronikado, al metado de unu ago post la alia, unu dialogo post la alia, unu priskribo post la alia, serene, paŭzoplene, laŭ frazoj konci-zaj, sen bombasto, kiel parolas vera kamparano.

La penadon kaj oferojn de tiu homo unika, kiu en la kamparoj kaj vilaĝoj laboras kaj konstruas por la progreso de la lando, li rekonis kaj aprecis pere de memorindaj atestolibroj: "Kuracistoj kaj sorĉmedicinistoj" (Premio de la Nacia Kulturkomisiono, 1928a); "Ĉevaloj"; "Folkloro kaj koloniado"; "La belegaj infanoj"; "La superakvo" (antologio de rakontoj); "Alies lando"; "Signaloj en la vento"; "Korinklina soleco".

Energia verkisto, kun alta inspiro; elokventa rakontisto; vigla ĵurnalisto; konscia, respondeca, honesta en sia laboro, li meritis en 1971a premion de la "Asocio de Argentinaj Verkistoj".

Li forpasis en Kordobo, kie li vivis la kvin lastajn jarojn, en 1973a.

GUTIERREZ, Eduardo (1851-1889) Flanke de la tendencoj de la homoj el sia generacio, G. faris beletron konfuzan kaj senordan, kiu celis pli disvastiigi grandajn popolmitojn ol kontentigi la linigitan kleran publikon. Spronita de ĵurnalismo, li verkis en malmulte da jaroj tridekon da verkoj : kronikoj pri eventoj aŭ personoj historiaj, policaj raportoj el realaj faktoj, rakontoj ligitaj al la vivo de gaŭĉoj. La plimulto el liaj verkoj sukcesis atingi mirindan famon en tiu epoko, kaj kelkaj certigis

al si enviindan transvivon; la recenzistoj konsideras ilin fenomeno de pludaŭro kaj efikeco.

Johano Morejra, reala persono, inspiris al G. lian plej sukcesplenan verkon, aperintan kiel felietono en 1879, kaj poste adaptita al teatro ekde 1886; kun sinsekvaj modifoj ĝi estas ludata ĝis nun; kaj eĉ filmoj estis faritaj el ĝia verko.

Aliaj titoloj : "Nigra Formiko"; "Santos Vega"; "Johano Kuejo" ; "Armeaj kronikoj kaj konturoj". El ĉi-lasta kolekto estas la rakonto prezentita.

BOOZ, Mateo (1881-1943) Naskita en provinco Santafeo, li estas unu el la plej gravaj reprezentantoj de la tielnomata "REGIONA LITERATURO".

El liaj pluraj titoloj, la plej konata estas la novelkolleto : "Santafeo, mia lando" (aperis 1934).

Pri la "REGIONA LITERATURO" ni devas reliefigi, ke la Unuiĝintaj Provincoj de La-Plata Rivero, poste Argentina Respubliko, formiĝis sub historiaj cirkonstancoj, kiuj donis al ĝi lingvan unuecon kaj politikan centrismon, kaj sekve homogenan kulturon sen internaj breĉoj. Tamen la influo de geografiaj kondiĉoj kaj historiaj eventoj pri vilaĝoj kaj urboj relative proksimaj, kontribuis nepre formi regionajn karakterizojn nete diferencigitajn. Unu el la trajtoj plej reliefa estas sendube literaturo.

Tamen estas rimarkinda aparta fakto : oni ne uzas regionan dialekton kiel en la literaturo de aliaj landoj. Sen la uzado de specialaj dialektoj, oni devas fundamente konsideri literaturon laŭ la temaro, laŭ la klopodoj de la aŭtoroj reliefigi la pejzaĝon, la homojn kaj la apartajn morojn de ĉiu loĝloko.

QUIROGA, Horacio (1878-1937) Li naskiĝis en urbo Salto (Urugvajia Respubliko); lia patro estis argentino, posteulo de la prafamilioj de la lando, mastro de lignoseĝejo.

Lia vivo estis tiel hazardoplena, akcidenta, aventurriĉa, kun liaj alternantaj loĝadoj en Bonaero kaj provinco Misiono, ke fariĝas tre malfacile skizi kronologie-biografian tabelon.

La recenzistoj konsideras lin : la plej grava rakontisto el hispanlingva Ameriko. En liaj rakontoj miksiĝas strangeco, sinmortigoj, pulvo, morto, absurdaĵoj, profunda amo, transa mondo; kio jen signis lian vivon; jen estis kreita de lia

impresena imagpovo.

Li estis ĵurnalisto, funkciulo, konsulo urugvaja en arg-a provinco Misiono, metiisto, terkultivisto; dando, inventisto, barba mistika ermito de la misiona arbarego; temperamento de-lirema, senmezura, turmentita, psikopatia. Talentege, genia, li spicis siajn rakontojn, kiujn li majstre ĉizis, per spri-to, ironio, mucidaj agordoj, erotikeco, sensencon, solecon, frenezon.

Rimarkinda stampo de lia vivo estis 7 nenaturaj mortoj : lia patro sin mortigis dum ĉasekskurso; lia duonpatro, tute invalida, premas la ĉanon de pafilo per la halukso de la so-la sana piedo, kaj mortigas sin; je lia 24-jara aĝo, li akci-dente mortigis sian grandan amikon Ferrando per pafado en la buŝon, provante armilon; Ana-Maria, lia unua edzino, englutis porcion de sublimato kaj pereis post 8-taga agonio; li mem, malsana je kancero, englutis cianatan acidon; poste, Egle kaj Dario, liaj du gefiloj el la unua edzino, ankaŭ sin mortigis.

Longa listo konsistigas lian kompletan verkaron :

"Rakontoj pri amo, frenezo kaj morto" (1917); "Anakondo" (1921); "La senkapigita kokino" (1925); "La koralaj rifoj" (1901); "Rakontoj el la ĝangalo" (1918); "La sovaĝulo", "La dezerto" (1929), ktp. Krome, Leteroj, kiujn ordigitaj en du volumoj eldonis iu Montevidea Instituto (1959).

LUGONES, Leopoldo (1874-1938) Dum la maturaĝo, Lugones es-tis la arg-a verkisto, anto-nomazie. Naskita en nordkordoba vilaĝo, 22-jara li ekloĝis en Bonaero. Junulo kun flama parolo kaj aŭdaco, li imponis al elstaraj homoj kiaj poeto Ruben-Dario. Li montris ekde la starto intereson primajstri la esprimeblojn de la lingvo, kaj mimetismon, kiu lin ebligis adopti diversajn literaturajn stilojn kiel proprajn. Tio kondukis lin al la ekstereco de la beletro, al la nura prizorgo je la sonoro de vortoj, je la virtuozececo; resume, al verkaro, kiu mirigas pro vasteco kaj varieco, sed el kiu ne elstaras varmo kaj profundo de verkisto pensema kaj sentema.

"La ĝaŭĉa milito", serio de rakontoj eposaj, estas inspir-ita je la heroagoj de Generalo Güemes kaj liaj saltanaj (prov. SALTA) ĝaŭĉoj, kiuj gerilis kontraŭ la Reĝanoj dum la Sendependiga Milito. Fascinita de la Modernismo, li prilaboris sian prozon majeste kaj utiligis plastikajn vortaron kaj stilon; sed tiuj rimedoj utiligitaj ĝis troaj ekstremo

malfluigas la rakontadon kaj igas la legadon laciga laboro.

Multfaceta, li estis eminenta poeto; aktivis ankaŭ en recenzoj, didaktiko, filologio, historio kaj eĉ matematiko; agitis lin ankaŭ la politika pasio, kun la klopodo enkorpiigi la beletriston en la politika kaj socia procezo de sia epoko. Sed treege malstabila, li fluktuis ekde la revolucia anarkismo de la junaĝo, ĝis la faŝismo de liaj lastaj jaroj.

Glosaro

Ne troviĝas en PV kun suplemento, sed en PIV, jenaj vortoj:

adher/i	langvor/o	pelmel/o
aprec/i	makabr/a	ponĉ/o
haluks/o	morn/a	sentur/a
ipek(akuan)o	pamp/o	stilzobird/o
		ŝanel/o

antonomazio : karakteriza ekvivalento anstataŭ la propra nomo (PIV).

Gérant & imprimeur: C.Baudé, 47340 Laroque Timbaut.

Commission paritaire de presse 39 863.

ARGENTINA NOVELARO

(DUA SERIO)

Notoj pri la aŭtoroj	... 3
* <u>V. Ayala Gauna</u> : La virino	... 5
* <u>V. Ayala Gauna</u> : Soleco	...11
* <u>V. Batista</u> : La maljunuloj	...16
* <u>S. Cernadas</u> : La sankta promeso	...30
* <u>A. Gerchunoff</u> : La revolucio	...37
* <u>H. Rozenmacher</u> : Bananoj	...43

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
137B * 1980 * 5 FF

Notoj pri la aŭtoroj

AYALA GAUNA (:aĵala-gaŭna), Velmiro

Korientano (1905/...)

Lia patro transdonis al li sian amon al la regionaj aferoj.

Li dediĉis 25 jarojn de sia vivo al la instruado. Li studis la folkloron, socion, lingvon (=gvarania), historion kaj naturon de sia regiono : provinco Koriento, Argentina Respubliko, kaj el tiuj studoj li ĉerpis materialon por la glosoj kaj vortprovizoj de siaj noveloj.

La plej grava motivo de liaj verkoj estas la SOCIA PLEDO, kun la deziro, ke aliaj argentinanoj ekkonu liajn samprovincanojn tiaj, kiaj ili estas en la realo : stoikaj mildaj, rezignacie fatalismaj, subpremataj de la pezo de l'superstiĉoj, kun mankoj kaj virtoj, ekspluatataj, dolorplenaj.

Li diras : "...la medio : rivero, praarbaro, tero, trudas siajn karakterojn al la homo, kiu loĝas en ĝi, kaj kiu estas farita laŭ ĝia bildo. Li ricevas la vivon kiel ORDONON PRI BATALO, en kiu pereas la malfortaj kaj nekapablaj."

BATISTA, Vincento

Bonaerano (1940/...)

Tiu juna verkisto apartenas al la plej freŝdata generacio, ankoraŭ vivanta.

El lia novelkolekto "La mortintoj" ni ĉerpis la prezentitan novelon.

Kiel ĵurnalistoj li kunlaboras en kelkaj gazetoj; li ankaŭ verkas filmscenariojn.

CERNADAS (:sernadas), Samuĉelo

Santafeano (1893/1960)

Naskita en Urbo Rekonkero (hispane : Reconquista), provinco Santafeo, tiu poeto kaj verkisto transdonis

sian nomon al unu strato de sia naskurbo.

Li eldonis : "Regionaj poemoj kaj kanzonoj".

"Mia regiono" (novelkolekto).

Li ĉiam estis proleto : dungito en la Poŝto, en la Fervojo kaj en la Komunumaj oficejoj.

GERCHUNOFF (:herĉunof'), Alberto

Rus-argentinano (1883/1950)

Li naskiĝis en Ruslando en epoko de teruraj pogromoj. Kun la kontingentoj de judaj enmigrintoj organizitaj de Barono Rotŝild por koloniigi distrikton en provinco Entrerío, li ekloĝis tie ĉi kiel 12-jara infano, kaj restis definitive.

En sian unuan kaj plej sukcesplenan libron: "La judaj gaŭĉoj", li envortigis la spertojn akiritajn en la entreriaj kolonioj, per lingvouzo vigla kaj kolora. Poste li plene dediĉis sin al la ĵurnalismo. Li multe praktikis la beletran recenzadon. Per kolekto de eseoj li eldonis libron : "Entrerío, mia lando". Kaj fine li verkis alian novelkolekton : "Rakontoj de Hierau".

ROZENMACHER (:rosenmaĉer), Hermano

Bonaerano (1936/1971)

Malmultaj biografiaj referencoj estas konservitaj pri tiu bonega ĵurnalisto kaj verkisto mortinta tre juna kaj tragike en Urbo Mardelplato (Bonaerio).

Li apartenas al la plej freŝdata generacio de argentinaj verkistoj, kies historion oni ankoraŭ ne skribis.

En eta antaŭparolo por sia unua kolekto, li diras aŭtobiografie, ke eble li heredis la kapablojn kaj la senton pri arto de la patro, aktoro kaj muzikisto, kiu naskiĝis en la judaj kolonioj de provinco Entrerío.

Li verkis du novelkolektojn : "Nigra kapeto".

"La okuloj de la tigro".

Bibliografio : "Baza vortaro pri argentina literaturo"
de : Adolfo Prieto, Bonaero.

"Historio de la argentina literaturo"
verkita de komisiono, en 3 volumoj.

" L A V I R I N O "

De : AYALA GAUNA (:aĵala-gauna), Velmiro

Tradukis : Enio Hugo Garrote

Kordobo (Argentina Respubliko)

El la novelkolekto : "Korientaj noveloj"

.....

Realismo kaj humuro alternas en ĉi novelo, kiu montras la trajtojn de homoj laborantaj kaj loĝantaj meze en la praarbaro, en la koro de la naturo kaj for el ĉia socia kontakto.

.....

Proksime de la "Granda Pado", sur kiu malrapide kaj knare foje ruliĝadis la krudaj kaleŝoj nomataj : "kaĉapeoj"(1) la du arbohakistoj establis sian "bivakon", konsistantan en pajla kaj tera muro rigardanta al la sudo, kovrita de branĉaro kvazaŭ tegmento, sub kiu ili dormadis kaj tenadis siajn malriĉajn provizojn.

Malgraŭ tia proksimeco al la vojo, ili pasigadis longajn tempospacojn en kompleta soleco, kun la larĝaranda ĉapelo kaj la bruna brusto nuda, ire kaj reire kun la hakilo surŝultre tra la vegetala implikaĵo, serĉante kebraĉarbojn(2) por faligi ilin per siaj brakoj, kiuj moviĝis samritme kaj alternis en la fortegaj frapoj, kaj fendis en la griza krusto ruĝan rideton, kiu poste disstreĉiĝis en la tragika grimaco de la falo.

Kaj tiumaniere ĉiutage, ekde aŭroro ĝis krepusko kaj en la ombraj noktoj kribritaj de steloj. Dum la lumhoroj la strebo de la laboro ne lasis al ili tempon por la babilo kaj vespere je la reveno la elĉerpiĝo metis lacon al iliaj paroloj. Tial ili kutimis trakti unu la alian preskaŭ nur per gestoj kaj malmulte da vortoj.

- Varme, ĉu ?

- Ja, ĥm !

Poste ili silente restadis ĝis kiam la dormemo fermis iliajn palpebrojn. Sed malgraŭ tia muteco ili sentiĝis preskaŭ fratoj pro la kruda solidareco de tiu partoprenata vivo. Unu el ili, Petro Lopes, estis el Ĉako (3); la alia, Krispulo Calarsa devenis el urbeto Eskina, provinco Koriento (4).

Ĝis kiam iun vesperon alvenis la virino...

Krispulo, kiu estis preparanta la tapiokan (5) kaĉon por la modesta vespermanĝo, levis la rigardon kaj ekvidis ŝin je la tremanta rebrilo de la flamoj. Tio estis bedaŭrinda homa rubo : malgrasa, nekombita, ĉifonkovrita.

Ŝi ekdiris eĉ ne unu vorton kaj restis nur rigardante lin; sed sufiĉis vidi ŝin por ekkompreni, ke la malsato forvoras ŝian intermon.

- Petro... kompanion ni jen havas... - ekkriis la viro.

- Ĥm... - diris la alia, kiu sin refreŝigis ĉe akvofluo ne malproksime de tie, kaj li alpaŝis ilin.

- Aĥ ! ... tio nome estas virino... Alvenu, sinjorino, kaj aranĝu vin... - li invitis.

- Siriaka estas mia nomo... - respondis ŝi, kaj sidiĝis sub la tegmentorando sur hakita trunko. - Mi venas el La Linoj kaj iras al Unuigitaj Kolonioj...

- Prenu, sinjorino... - diris Krispulo, kaj enmanigis al ŝi latunan teleron kun la manĝaĵo.

Ŝi prenis ĝin, metis ĝin sur la genuojn kaj poste komencis malrapide manĝi el ĝi; sed ŝi elskrapis eĉ la lastan eron el la manĝo.

La viroj ankaŭ finis sian porcion, kaj tiam ŝi ekstaris, kaj kunprenante la malpuran manĝilaron ŝi portis ĝin al la rivereto por lavi ĝin. La hakistoj, kiuj restis fumante sub la branĉaro, opiniis pri la stranga vizito.

- Se almenaŭ ŝi estus pli juna... - diris unu.

- Kial do vi ne invitas ŝin aranĝi vian liton ? - primokis la alia.

- Laŭ mi, eĉ pedikojn ŝi surhavas... - konkludis la unua.

Ili forĵetis la cigarstumpojn kaj iris sterniĝi sur siaj respektivaj litoj, dum el la praarbaro venis la malbonaŭgura susuro de la strigo, kaj sur la tropika ĉielo ardis la steloj.

Sen ia buŝa interkonsento kaj pro la nura trudo de la kutimo, la virino enradikiĝis en la bivako. Kelkajn metrojn for ŝi establis branĉaron por sia ŝirmejo, kaj ekde tie ŝi venadis kuiru la manĝon kaj lavi la tolaĵon de la du arbohakistoj.

La ĉiutaga manĝo, la ripozo, kaj eble la komenciĝanta printempo, kiu burĝonigis la ŝecojn en la branĉoj kaj vekis la seksardon de la arbaraj bestoj, kontribuis plibonigi ŝian

aspekton, sed ŝi ankoraŭ estis sulkoplana kaj malbela kiel sorĉistino.

Poste venis la varmaj someraj tagoj. La humo eligis humidan kaj ardan vaporon, kiun la vento blove sendis de tempo al tempo tra la praarbaro, kvazaŭ la febra spiro de multforma kaj nesatigebla monstro.

Iun nokton, Krispulo ne povis endormiĝi kaj komencis turniĝi en sia litaĉo. La juna sango bolis en liaj arterioj kaj la seksinstinkto dum longa tempo kvietigita komande kaj torture renaskiĝis. Antaŭ liaj okuloj paradis bildoj de pasintaj scenoj, kiuj forkurigis la birdojn de la dormo.

Li duone ekstaris por ekfajrigi cigaron kaj fordistribuan splenon; iom malproksime li tiam ekvidis Siriakan. Sendorma, ŝi ankaŭ eliris por enspiri iom da freŝa aero en la pado, kiun la plenluno tagosimile lumigis.

Kaj tiel stompiĝis la detaloj kaj reliefigis la ĝenerallaj konturoj. Li nur vidis la korpon per la seksdeziro nekontentigita, kaj ŝi aspektis al li avidinda kiel nimfo. - Nu, kiel aĉa ŝi estas !... - li diris al si mem por forlogi sian bezonon, kaj forlasante la cigaron li ekkuŝis sur la lito kaj okulferme forbaris la deziron kaj la nokton.

Kelkajn tagojn poste, dum laborpaŭzo, Petro montris en proksima njandubajo (6) tumultan neston de papagoj, kaj diris :

- Mi esploros, ĉu estas birdidoj... Tiel Siriaka preparos ilin por la vespermango...

Facile kiel simio li surgrimpis la trunkon, kaj poste rampis en la branĉaro. Bruemaj verdaj flugiloj soris (7) en la alton kaj la viro disŝiris la neston per tranĉilfrapoj, tiris el ili plurajn birdidojn kaj teren ĵetis ilin, kie lia vigla kunulo prenis ilin.

Fininte sian laboron, Petro estis malsuprenironta, kiam li ekvidis sur branĉo tufon de orkideo, kiu fiere montris sian mirindan floron. Li elradikigis la planton kaj kunportis ĝin por zorgeme deponi ĝin apud la pulsanta aro de etaj birdidoj.

Krispulo observis lin, konjektis lian celon, sed diris nenion.

Tiun vesperon, kiam la virino servis ĉe la mango, ŝi portis la orkideon kroĉitan je la hararo, kaj Krispulo incitite demandis al ŝi :

- Nu, sinjorino... kiam do vi pluiros vian vojaĝon al Unuigitaj Koloniöj ?

Dum tempeto la virino restis kviete kaj silente; poste ŝi respondis kun ĉagreno en la voĉo :

- Kial, do ? ĉu mi ĝenas vin ?

- Ne... mi nur diras... Eble oni atendas vin...

- Min, jam neniu atendas, Sinjor' Krispulo...

- Tre bone, pardonon... estis nura diro.

Petro daŭrigis silente manĝi sian birdidon; sed liaj blankaj kaj fortaj dentoj frakasadis la ostetojn kun bremsita kolero.

La varmego intense daŭrigis, kaj la laborado dumsiesta fariĝis nebla. Tial la du arbohakistoj pasigadis la sufokajn horojn sub la ŝirmo de sia kruda tegmento aŭ banante sin en la apuda rivereto.

Kiel kutime, la virino kunportis la telerojn kaj la poton por lavpurigi ilin ĉe la akvofluo. Post kelkaj momentoj Petro ekstaris kaj ekiris tra iu arbarpado.

La minutoj pasis, kaj ĉar neniu el ambaŭ revenis, Krispulo eksuspektis pri kaŝa renkonto. La ĵaluzo ekmordis lian animon, kaj sentante ke li posedas pri la virino imagitan rajton, kiun nur liaj instinktoj kaj kaprico donis al li, li murmuris :
- Malbona amiko!... Ja fari tion al mi...!

Li ekpalpis ĉe la zono la tenilon de la tranĉilego, kaj li ĵetis sin meze en la arbaron por serĉi la paron. La silenta praarbaro estis kvazaŭ premita de la intensa varmego, kaj nur kelkaj lacertetoj fuĝeme transkuris antaŭ li, sin perdante meze de la sekaj folioj.

Li subite ekaŭdis malproksiman murmuron de voĉoj kaj ridoj. Li singarde ŝteliris kiel ĉasisto post la ĉasaĵo, kaŝante sin malantaŭ la trunkoj, kaj tiel li atingis la lokon kie Petro kaj Siriaka estis.

La viro estis brakumanta ŝin kaj kisadis ŝin, dum ŝi protestadis, sed ne kun granda konvinko.

- Neĵke...!(8) Lasu min, Sinjor' Petro! Ne kondu tu tiel !

Ruĝa vualo nebuligis la okulojn de Krispulo, kiu preninte la armilon minace montriĝis.

- Tiel mi volis surprizi vin... Malpuruloj!...

La virino liberiĝis el la brakumo kaj flankeniris, dum Petro prenante la armilon respondis la defion.

- Pli malpura ja estas vi...

Kaj li streĉiĝis en atako, kiun lia kontraŭulo apenaŭ povis eviti. Ili poste komencis saltadi laŭ la diableca kreola skermo, nuancita de krudaj insultoj.

- Vi kredis, ke ŝi estos por vi...

- Mi punos vin, mallojala al amikoj... "Anjamembù!" (9)

Oblikva frapo tranĉis Krispulon ĉe la frunto kaj la sango ekfluis sur lia vizaĝo, sed li ne cedis kaj baldaŭ ĉe la femuro li vundis Petron, kiu fortikiĝis ĉe trunko kaj haltigis la atakojn de sia atakanto kaj sukcesis vundi lin ĉe ŝultro. Nekapabla libere movi la brakon, Krispulo treniĝis kelkajn metrojn for kaj falis elsangante sin; dum la alia, kroĉita al la trunko, ankaŭ faladis kaj faladis ĝis kiam li restis sveninta ĉe la arbo.

Ekvidante la batalon, la virino panike kuris al la vojo kaj post tempeto revenis kun laboristoj kondukantaj kaĉapeon. Ili helpis loki la vunditojn sur la dikajn trunkegojn kaj iris al la stablo, kie oni praktikis al ili la unuajn flegojn kaj poste sendis ilin per kamiono al la hospitalo de Tirol-Haveno, en kompanio de la maljunulino.

La hardita korpo de la arbohakistoj baldaŭ superis la suferojn, kaj ili reprenis sian antaŭan viglecon. Ili okulumis la flegistinojn, aŭ la junulinojn, kiuj venis viziti la aliajn pacientojn en la ĉambrego. Kaj iun matenon la administranto vokis ilin, resaniĝintajn, al sia oficejo.

Tie jam troviĝis la virino, kun eta vestpakaĵo ĉe la piedoj. Ekvidante ilin eniri, ŝi amikece ridetis, sed ili sekvis la sekretariinon, gracian brunulinon kun impresaj konturoj, kiu kondukis ilin ĝis kontoro, kie blonda, alta, grizokula viro atente rigardadis ilin, kaj poste demandis :

- Ĉu vi do estas la du arbohakistoj, kiuj laboras en la Centra Stablo kaj interbatalis ?

- Tiel estas, sinjoro...

- Bone, nun mi devos apartigi vin, por ke vi ne plu faru tion.

- Ĉu apartigi nin ? - diris Krispulo. - Ĉu vi nome volas tion, Petro ?

- Mi, ne... Ĉu vi ?

- Ankaŭ mi ne, kompano... kiel vi ja ne estas multaj.

- Nu, kial vi kondukis tiel ?... Kial diable vi interbatalis preskaŭ ĝismorte ?

Ambaŭ preskaŭ senkonscie rigardis la virinon, kiu sidis en angulo kun kompatinda aspekto; kaj poste iliaj okuloj trafis la freŝan belecon de la sekretariino, kiu frapadis la klavojn de la tajpilo, kaj rideto ekaperis ĉe iliaj lipoj. Ili hezite rigardis unu la alian, sendecide :

- Diru tion al li, Krispulo...

- Ne, vi nome diru al li, Petro...

Kaj dum ili ekkonsciis pri la situacio, kreskis la rideto kaj fine fariĝis laŭta kaj senfina ridego.

- Sufiĉe!... - tondrokriis la administranto. - Finu tiun ridadon kaj tuj diru al mi, kial vi interbatalis... Ĉu eble estis pro tiu ?

Kaj li fingromontris al Siriaka.

La du arbohakistoj rigardis la maljunan, ĉifonan kaj kompatindan virinon, kaj unu el ili malmole kaj kruele respondis :

- Pro tiu... ba! Estis pro la varmo... jes, nur pro la varmo...

Kaj ili daŭrigis ridante, dum en sia senpova malespero la mizera vizaĝo de la virino fariĝis pli kaj pli malgaja kaj malbela.

(1) "kaĉapeo". El la gvarania : "cachapé" = ĉaro.

(2) Kebraĉo. Tropika kaj subtropika arbo; laŭdire ĝi havas la plej malmolan lignon de la mondo; ĝi estas neputrema. Oni uzas ĝin por konstrui fostojn por pontoj kaj ŝpalojn por fervojo. El la vario "ruĝa" oni tiras la taninon, glukozido de la tanindustrio. Ĝia nomo estas formita el hispanlingva vortoparo kun signifo "hakilrompanto".

(3) Ĉako. Norda provinco en Argentino, kun subtropika klimato. Produktoj : ligno, kotono.

(4) Koriento. Norda provinco en Argentino, situas fronte al Ĉako. Brutaro, rizo, tabako, oranĝoj.

(5) Tapioko. Faruno el manioko, tropika tubero.

(6) Njandubajo. Sudamerika arbo (mimozacoj) kun ruĝa kaj malmola ligno. La nomo devenas el la gvarania.

(7) Sori. Leviĝi, supreniri (PIV).

(8) "Nejke!". Interjekcio gvaranilingva : = nu, nu...

(9) "Anjamembù!". La plej forta sakraĵo gvaranilingva, laŭvorte = ido de la diablino, sed kun la senco de : putinido.

" S O L E C O "

De : AYALA GAUNA (:ajala-gauna), Velmiro
 Tradukis : Enio Hugo Garrote
 Kordobo (Argentina Respubliko)
 El la novelkolekto : "Korientaj noveloj"

.....
 Jen novelo intime parenca al "La Virino",
 sed ellaborita laŭ pli krude realisma
 maniero, kaj kun fino tragika, nuancita
 de amara humuro.

La du lutroĉasistoj loĝis de antaŭ tri jaroj sur tiu in-
 sulo de la Rivero Alta Paranao (1). Interne, en la marĉoj
 kaj lagunoj situis iliaj ĉasejoj, kie dum la vintraj mona-
 toj ili kaptis la tre grasajn bestetojn kun plej bona felo.
 Ili kutimis mortigi ankaŭ kapibarojn (2), aligatorojn, kaj
 ili kolektis plumojn de blankaj ardeoj, el tiuj disŝutitaj
 sur la nestoj.

Por vendi la felojn kaj la plumojn ili malsupren navigis
 al Ita'-Ibate'. Tie, iu turko (3), akaparisto, konscie trom-
 pis ilin pri la pezo, kaj poste liveris al ili proviantojn
 ĝenerale difektitajn, malmulte da mono kaj multe de ebrigi-
 aĵo.

Lusjo Sosa kaj Elviro Gomes pasigadis plurajn tagojn en
 la vilaĝo, malŝparante sian monon en la baloj, la tabo(4)-
 ludejoj, la kokbatalejoj, kaj ĉe la trinkotabloj de la drink-
 ejoj, ĝis la elĉerpiĝo de siaj rimedoj. Kaj tiam ili ŝarg-
 adis sian kanoton per iom da pistita maizo, tapioko, mate-
 herbo, sukero, cigaredoj, salo kaj kelkaj brandoflakonoj,
 kaj ili revenis al sia soleco.

Sed ĉe la insulo ili administradis la trinkaĵon kun ne-
 kutima sobereco. Ili uzadis ĝin kiel medikamenton : por la
 stomakdoloroj kaj ankaŭ por haltigi la sangon ĉe la vundoj.
 Krom tio, ili kutimis trinki glason nur "kiel digestilon"
 post la manĝoj.

Kaj tiel plu unu tagon kaj alian tagon, monatojn kaj mo-
 natojn. El la abunda kaj varia rivera faŭno ili prenis sian
 nutraĵon : la plej bongustajn fiŝojn. La najbara praarbaro
 provizis ilin per variaj birdoj kaj ovojn, la viandon de la

kapibaroj, viskaĉoj (5), ruĝaj cervoj kaj aliaj kvarpieduloj. Ĝi liveris al ili ankaŭ ĉiuspecajn fruktojn el plej variaj gustoj : dolĉegaj, dolĉacidaj, ruĝaj, brunaj, flavaj...

Ili malmulte konversaciis, kaj kiam ili ne foriris por ĉaslaboro, ili pasigadis siajn horojn, sternante la felojn, preparante sian fiŝkaptan ekipaĵon, aŭ sorbante mateon post mateo dum horoj kaj horoj...

La soleco foje igis iun el ili malkvieta kaj nervoza. Tiam, enkanuante, li pagajis ĝis la proksima vilaĝo Aĵolas, sur la paragvaja riverbordo, de kie li revenis post du-tri tagoj, kantetante polkon (6), kaj kun la plej urĝaj fizikaj bezonoj satigitaj.

Ĝis kiam iun tagon Lusjo rompis la establitan ordon. Ĉe la pruo de la kanuo li kunportis junulinon, kiu stiris ĝin. Ŝia nigra hararo estis aranĝita laŭ longaj kunplektaĵoj; ŝiaj okuloj : grandaj kaj malhelbrunaj; ŝia buŝo : ruĝa kaj seksincita.

Elviro estis liganta per maldika kupra fadeno la trihokan kaptilon al forta ŝnuro. Li tiam ĉesigis sian laboron kaj iris al la komuna ĉambro por depreni la felojn, kiuj formis lian liton, kaj li forportis ilin al la koridoro.

Kiam la aliaj alvenis, iomete konfuzitaj, li diris al ili :

- Jen la ĉambro por vi...

Kaj tuj li aldonis :

- Lusjo, vi poste helpos al mi masoni muron ĉe tiu ĉi flanko, pro la alvenonta vintro.

La alia jesis :

- Aĥa'!

Kaj jam en edza rolo, li ordonis :

- Marsela, lasu viajn aĵojn kaj preparu kelkajn mateojn.

La virino flankenmetis sian vestpakaĵon ĉe angulon, alproksimiĝis al fajro, kiu ardis meze inter du ŝtonoj, metis sur ĝin fulgonigran kaldronon, ekvidis la mateujon sur la tablo, ŝanĝis ĝian herbon, kaj atendis. Kiam la vaporo ekfajfis tra la kaldronbeko ŝi komencis sian taskon : unu por Lusjo, alia por Elviro kaj la tria por si. Kaj tiel ŝi estis akceptita.

La siesto disŝutis ĉirkaŭen ardon kaj kvieton. Post la tagmanĝo Marsela ekiris al la rivero por lavpurigi la manĝilon, kaj la viroj sin pretigis siesti. Nur de tempo-al-

tempo la cikadoj traboris la kristalojn de la silento per la knaro de siaj kantoj.

Lusjo en la ĉambro kaj Elviro en la koridoro, ili deprenis iom el sia vestaro kaj sterniĝis por ripozi.

Ankaŭ la insulo ŝajnis profundiĝi en senfina dormemo. Eĉ ne unu folio agitis sin sur la arbobranĉoj, kaj la akvoj sub la fajra suno eligis blindumajn rebrilojn.

Elviro aŭdis la ritman spiradon de sia kamarado en la apuda ĉambro, dum li turniĝadis tien kaj tien, ne povante endormiĝi. De antaŭ longa tempo li ne iras al Aĵolas, kaj lia sango brulas pro seksardo. Li viŝis la ŝviton, kiu fluas sur la vizaĝo, kaj restis en atendo streĉa.

La virino revenis kun la potoj kaj la teleroj kaj komencis aranĝi ilin apud la fajrujo, sub branĉotegmento almetita al la kabano. La bluzo malsekigita de la ŝvito konturigis ŝiajn firmajn mamojn, kaj kaŭrante ŝi vidigis siajn fortikajn kaj brunigitajn femurojn.

La junulo ne povis elteni plu la angoron, kiu premis lin; kaj rapide ligante siajn pantalonon kaj tolsuojn, spronite de la ega forto de l'instinkto, li aliris ŝin. - Donu al mi iom da akvo... - li petis, kaj aldonis : - tian soifon mi sentas !...

Marsela verŝis en kruĉon iom el la likvaĵo, kiun ili konservis en argila potoj, kaj ŝi enmanigis ĝin al li.

Li eltrinkis kun iuspeca besta avido, kaj redonante al ŝi la ujon, li ekprenis ŝian manon.

La virino milde kaj konsente rigardis lin.

Perdinte la sinregon, li sinĵetis al ŝi kaj enfermis ŝin en siajn brakojn, serĉante la ruĝan karnon de ŝia buŝo. - Ne!...Ne!... - diris ŝi, sed en ŝia neado ne estis konvinko.

Tiam Lusjo ekaperis ĉe la pordo kaj ekvidante ilin, li kriis :

- "Anjamembù!" Malbona amiko !...

Kaj li reeniris kaj denove eliris kun ponardo en la mano. Elviro ekpalpis sian zonon laŭ instinkta movo kaj trovis ĝin malplena. Li hezitis dum sekundo kaj poste li ekkuris al la bordo.

- Li estas serĉonta la kanuon por forkuri... - pensis Lusjo, kaj ĉirkaŭirante la kabanon, li atingis la plaĝon laŭ kaŝvojo, ĵus kiam la alia alproksimiĝis al la barko.

- Eĵo-koape, anjamembù! (7) - tondrokriis la ofendito.

Sed la sendefenda amindumanto ekkuris tra la plaĝo, persekutite de la alia, kiu svingis sian akran ponardon. Li mal-espere paŝis en la akvon, kaj kiam ĉi lasta atingis lian bruston, li energie eknagiis en direkto al la paragvaja bordo. Li estis bona nagiisto kaj li kalkulis, ke li atingos tien post kelke da horoj.

Lusjo ekkuris al la kanuo por daŭrigi la persekuton, sed subite, atakite de inspiro, li faligis la pagajon kaj revenis al la bordo, al la loko, kie li kutimis gardi siajn fiŝhokojn.

Elviro daŭrigis impete fendi la akvon. Li multe bedaŭris perdi la malnovan, multjaran amikon, sed jam sereniĝinte, li komprenis sian fian agon.

- Foje oni perdas la prudenton - li pravigis sin kaj pensis, post kiam li ekrigardis la silueton de la kamarado konturiĝantan sur la bordo : - Jam mi antaŭeniris for de li, kaj se li venos kun la kanuo, malfacile li kaptos min...

Dume, Lusjo ekprenis la trioblan hokon, okulmezuris la distancon, kvazaŭ la alia estus fiŝosvarmo anstataŭ homo, li svingis la brakon kaj sible ĵetis ĝin super la akvon.

Apenaŭ knaro aŭdiĝis, kaj ĝi profundiĝis kelkajn centimetrojn antaŭ la naĝanto.

- Hej !... - diris ĉi lasta, kaj intencis mergiĝi, antaŭvidante la danĝeron, sed jam Lusjo estis forte tirinta kaj du potencaj hokoj fiksiĝis je lia ventro.

Elviro sufokis krion kaj klopodis per la mano elŝiri la hokojn el sia flanko, sed la viro sur la kontraŭa ekstremo, perceptante la reziston, faris la fortan kaj subitan tiron, kiu kutime taŭgis al li por hoki la fiŝojn.

Lautan dolorkrion eligis la gorĝo de la forkuranto, kiam li eksentis la teruran ŝiron plugantan du profundajn sulkojn ĉe la karno, tra kiuj elsaltis la intestoj.

Purpurkolora makulo aperis sur la akvoj. Elviro ĉesigis la naĝadon por klopodi enkonduki reen la intestojn en tiun truon, tra kiu forglitis lia vivo.

La kormo falis funden, kvazaŭ ĝi estus plumba. Vezikoj krevis meze de la ruĝa makulo, kiu sterniĝis sur la akvo.

Nova ektiro kaj la hokoj liberiĝis kaj obeeme sekvis la blankan ŝnuron, kiu volviĝante iris al la plaĝo. Lusjo trankvile kunprenis la trioblan hokon. La akvo milde rebrilis sub la ora suno.

Li atendis ankoraŭ kelkajn minutojn kaj poste revenis al la kabano. De la supro de la vojo li ankoraŭfoje rigardis la Paranaon, sed sur ĝia akvo estis videbla nur la blinduma rebrilo de la sunradioj.

Marsela, kaŭrante en angulo, timplene vidis lin reveni. Ŝiaj nigraj okuloj fiksrigardis la manojn de la viro, kiuj hokiĝis kiel ungegoj.

- Nu, fihundino ja vi estis... - li ekkriis kaj elingigis ree la ponardon.

La virino silente atendis sian sorton.

Sed li cerbumis pri sia ega soleco, kaj ĵetante la ponardon sur la tablon, li ordonis :

- Nu, taŭga ja por io... Preparu kelkajn mateojn.

La junulino obeeme ekstaris kaj ekpaŝis al la fajrujo. Pufante la vangojn por vigligi la fajron, ŝi forblovis la cindron kovranta la braĝojn. Ŝi poste plenigis la mateujon, kaj transdonis ĝin al la viro kun tremanta mano. Sidante sur seĝo, li daŭrigis silenti, kuntirante la brovojn.

- Prenu... - ŝi proponis, kaj aldonis kvazaŭ senkulpige :

- Mi ja ne volis, nur li estis...

- Tre bone... - allasis Lusjo kaj redonis al ŝi la mateujon.

Kiel sejbo(8)-floro tremis rideto sur la lipoj de la junulino.

- (1) Alta Paranao. Alta = Norda. Paranao, riverego sudamerika, 4 500 km. longa.
- (2) Kapibaro. Sudamerika mambesto, rongulo senvosta, granda kiel porko, vivas ĉe lagoj kaj riveroj.
- (3) Turko. Kromnomo aplikita al ĉiuj arabdevenaj personoj, ĉar kiam ili enmigris en nian landon ili havis turkan pasporton. Turkdevenuloj ĝenerale ne estas troveblaj.
- (4) Tabo. Kreola nomo de la bova astragalo, uzata en la kamparo por vetludi.
- (5) Viskaĉo. Kreola nomo de la lagostomo : mambesto, rodulo, loĝas en truoj, damaĝas la grenkampojn.
- (6) Polko. Paragvaja kaj korienta muziko kaj danco, simila al la samnoma eŭropdevena.
- (7) "Eĵo-koape, anjamembù!". Gvaranilingva sakro = revenu, putinido!
- (8) Sejbo. Sudamerika arbo kun belegaj ruĝaj floroj, kiuj estas la naciaj floroj de la Argentina Respubliko.

" L A M A L J U N U L O J "

De : BATISTA, Vincenzo

Tradukis : Enio Hugo Garrote

Kordobo (Argentina Respubliko)

El la novelkolekto : "La mortintoj".

.....

Vidata de ekstere, ĝi aspektas majeste : antikvaj muroj, ulnolarĝaj, tute tegitaj de muskoj kaj konvolvuloj; grandaj fenestroj kaj malnovaj pordoj el ligno, malbrilaj kaj tra-ronĝitaj.

Nur unu pordo, la ĉefa, estas el fero : senbrila, nigra fero. Ĉe la supra parto de tiu pordo estas la ŝildo. Dumtage ankoraŭ videblas la literoj, kiuj pretendis esti gotikstilaj: "HEJMO DE MALJUNULOJ", ĝi diras.

Vidata el interne, eble ĝi estas belega. Multaĝaj kverkoj formas la ripozparkon, kaj ĉe la mezo, la malnova domego. Pli ol kvardek ĉambroj : antaŭ du generacioj, lumaj kaj ri-ĉaj; nun apenaŭ malĝojaj, grizaj ĉambroj, preskaŭ ĉiuj tut-plenaj de litoj, krom tiuj uzataj kiel manĝejo kaj akceptejo. Kaj la du lastaj, ĉe la maldekstra alo, en la plej profunda parto de la parko, estas la muzeo; kora, intima muzeo, kiu gardas la relikvojn de tiuj, kiuj donacis la kastelon por rifuĝejo de senhejmaj maljunuloj.

La vivado azila estas simpla. Oni ellitiĝas frue; maten-manĝas malpeze, kaj poste oni iras promeni en la parko, atendante la tagmezon. Kolorplena tagmanĝo, kvankam silenta. Poste, ree en la parkon. Iuj elektas la sieston. Tre malmultaj, manlaborojn aŭ legadon. Tiel alvenas la vespermanĝo. Poste, endormiĝi; kaj la silento, ĝis la venonta tago.

Kompreneble, estas ŝanĝoj. Povas alveni iu arta spektaklo aŭ oni povas organizi maĉojn por "ĉampioneco pri damoj" aŭ "...domenoj". Tiuj aferoj, aŭ la morto de iu el ili, unuigas la azilanojn. La novaĵo pri la morto disvastiĝas tre rapide.

- Nikolao.

- Ne povas esti. Nu, hieraŭ mi vidis lin, tre bonfarta.

- Koratako, oni diras.

- Kompreneble, li estis sufiĉe aĝa. Kaj li ne fleĝis sin.

Kaj estas la muzeo, vizitebla en kiu ajn momento. Unu ĉambrego gardas kostumojn, porcelanaĵojn kaj malnovepokajn

meblojn. La alia, armilojn kaj uniformojn apartenintajn al Kolonelo Salinas : eminenta familiano, "heroo en la Kampanjo de la Dezerto (1) kaj nobla kaj altkvalita politikisto. Mortinta en Dia Graco la 5an de novembro 1907a." diras bronza plato lokita sub la bildo montranta la Kolonelon, kun napoleoneca mieno kaj eleganta en sia parada uniformo. Tie, antaŭ la bildo, la azilanoj kutimas longe restadi. Ankaŭ tre rigardata estas la alia bildo, tiu montranta la edzinon de la Kolonelo : Magdalena Kastro Robles de Salinas, belega virino, tre rigida, kun milda rigardo kaj severaj lipoj, surportanta luksan noktostumon.

- Tiel similanta ŝin, estis Sesilja - diris iun vesperon Manuelo Ponse, 71-jara, unu el la laste alvenintaj : li ekloĝis en la azilo apenaŭ antaŭ du monatoj.

- Kiu ? - demandis lia tiumomenta kumulo, Viktorjo Antola, 69-jara : de antaŭ kvin jaroj li loĝas en la azilo.

- Sesilja, tute simila al ŝi. Tiajn okulojn ŝi havis - diris Manuelo, kaj li glitigis sian manon tra la frunto, kvazaŭ por ordigi la memorojn.

Viktorjo rigardis la bildon, poste rigardis Manuelon. Li ŝultrotiris, kaj ne dirante eĉ unu vorton, li malrapide pluiris al la bildo de Kolonelo Salinas. Tiu plaĉis pli al li.

- Okulojn similajn al tiuj...

La voĉo sonis ĉe lia dorso. Viktorjo turniĝis kaj renkontis Manuelon. Li jesigis la diron per etaj kapmovoj.

- Ĉu al tiuj ? - diris Viktorjo, montrante la okulojn de la Kolonelo.

- Bonvolu, Viktorjo, kredis al mi. Similaj, egalaj - diris Manuelo, kiu, kaptante la brakon de Viktorjo, turnigis lian rigardon al la bildo de S-ino Magdalena - Kredis al mi, tiuj okuloj...

La sonorilo vokanta al la tagmanĝo interrompis iun komenton de Viktorjo. Ili silente iris al la manĝoĉambro, kaj kiel kutime, pri nenio oni parolis dum la manĝo. Poste ili dissemiĝis en la parko. Kaj dum la vespermanĝo Viktorjo ne priatentis Manuelon. Li preferis la blagojn de la "turko"(2) Asbani, kiu iam estis tre virinama, kaj ĉiuvespere havas novan aventuron rakontotan. Alvenis la horo endormiĝi, kaj ĉio denove estis silento.

Je la sekvinta mateno, Viktorjo abrupte rompis la cerbumadon de Manuelo. Li sidis sola ĉe la tablo, atendante la

matenmanĝon.

- Bonan tagon - diris Manuelo. Sidiĝu.

Al Viktorjo la nokto fariĝis longa; do por venki la enuon li pensis pri la blago.

- Sesilja... kiel ? Kiel nomiĝis tiu virino de hieraŭ ?

Manuelo, netrinkinte, apogis ree la tason sur la teleron.

- Oros. Sesilja Oros. - li diris.

- Kaj, ĉu estas vere, ke ŝi havis tiajn okulojn ?

- Same, egalaj.

- Do, ne estas dubo - diris Viktorjo.

- Pri kio ne estas dubo ?

- Ŝi estas la sama Sesilja, kiun mi konis - diris Viktorjo, kaj la mieno de Manuelo pruvis al li, ke liaj planoj ne fiaskas. La afero komencis plaĉi al li.

Estis tre facile sciigi pri ĉio cetera. Post malpli ol kvar horoj, ĝuste dudek minutoj antaŭ la tagmanĝo, Viktorjo sciigis, ke Sesilja estis solfilino, orfa laŭ la patro, kaj loĝis proksime de Kvartalo Palermo (3), kune kun sia patrino kaj iu onklino. Poste, dum la manĝado, li sciigis pri ŝia pasio rilate la pianon.

- Memoru, ŝi estis virtuozulino - diris Manuelo.

- Vere, virtuozulino, pri ĉio... - asertis Viktorjo.

Kaj en la parko ili rememoris la kvalitojn de Sesilja. Manuelo estis kontenta : tio estas bela hazardo.

- Kia afero ! - li diris. Kiel vi konis ŝin ?

Viktorjo faris geston, kaj restis silenta. Nenion li povis diri, ĉar ĝis tiu momento li konis nenion pri Sesilja. Krom tio, ke ŝi ludis tre bone la pianon. Li estis decidinta koni ŝin de ĉiam. Kaj nun Manuelo maloportune demandis al li pri la maniero kiel li ekkonis ŝin.

Necesas sciigi pri aliaj aferoj, kiujn kutimis fari Sesilja : ĉeesti festojn aŭ kunvenojn, aŭ la teatron, aŭ koncertojn. Komprenable, tio : pianistino = koncertoj. Li riskis.

- Ĉe Teatro Markoni, dum la prezentado de Ruĝero Puĉi. Tie mi konis ŝin.

- Sesilja ĉe Teatro Marconi ! - interrompis lin Manuelo. Ne povas esti !

- Bone... ŝi estis kun la patrino.

- Nu, sed la patrino estis invalida - denove interrompis lin Manuelo.

- Kun la patrino... tion mi kredis komence... poste mi sciigis, ke ŝi estas la onklino - , li devis zorgi ne paroli kun tia certeco...

Malgraŭ ĉio, li sciigis pri pli da aferoj ("la patrino li jam ne povos eltiri el la hejmo...") - Ili komentadis pri la mirinda "La adiaĵoj", kaj mi rekonas, ke aŭdace sed sincere ravita de tiuj okuloj, mi partoprenis la konversadon.

Tiu Sesilja, kiun Manuĉelo konis, ne emis komenci konversadon tiunmaniere, subite, kun nekonato... kaj ĉe la akceptejo de Teatro Markoni ! Memkompreneble, ŝi estis kun la onklino, kaj la konversado temis pri muziko : Bethoveno, kiun ŝi tiel multe ŝatis. Malgraŭ tio, li ne pravigas ŝin. Kaj kolero atakis lin. Kie devis esti li tiun nokton, dum Sesilja parolis kun nekonato ?

Nun la nekonato estas apogita ĉe arbo; ili promenis de antaŭlonge kaj Viktorjo sentiĝis iomete laca. Ridetante, li ekrigardis la ĉielon kaj diris, ne turnante la rigardon al Manuĉelo :

- Belega vespero. Ĝi memorigas min pri tiuj en Palermo Parko (4).

Palermo ja devis memorigi lin pri nenio. Li ankaŭ ne pensis diri tion. Sed la frazo senkonscie, senpere elbuŝiĝis. Ĝi estis bela, kaj li amuziĝis pri la mieno de Manuĉelo. Tiam, duonfermante la okulojn kaj apenaŭ mordetante sian malsupran lipon, li faris geston, kiu priskribis mirindajn vesperojn kaj longajn piediradojn tra feaj arbaroj. Li ekridis.

Manuĉelo estis petonta al li klarigon pri tiu rido sed aperis la "turko" Asbani. Li parolis pri la kompenso de iu partio je damoj, kaj serĉante li kuntrenis Viktorjon ĝis la ludejo.

Manuĉelo restis sola en parko, kiu ne estis ja Palermo, kaj rigardante vesperon, kiu ja ne estis tiu de Palermo. Li volis memortrovi vesperon identan, kaj li vidis sin promenantan kun Sesilja tra la Rozujaro(5) ambaŭ silentaj. Nun li tion memoris bone : tio estis unu el la unuaj vesperoj, kiam ili eliris kune. Vesperoj de Palermo, li ripetis kun moka rideto, sed tra la Rozujaro kaj nur kun mi. Kaj li fiere ekpaŝis al la Muzeo.

II.

Kvankam jam de antaŭ pli ol unu semajno oni babilis pri la spektaklo, nur tiun matenon oni konfirmis la sciigon : teatra ensemblo (en speciala prezentado kaj kiu scias pro kia paradokso) surscenejigos "Don Juanon" de Zorrilla. Je la sepa, en la manĝosalono oni improvizos la scenejon. Longe antaŭ la sesa, la maljunuletoj jam estis pretaj, atendantaj la prezentadon. Sidante sur benko, Manuelo rigardis la preparojn. Al tiu benko direktiĝis Viktorjo.

- Oni rakontas, ke la "knaboj" estas bonegaj - li diris, sidigante.

- Jes - diris Manuelo.

Nun ambaŭ rigardis al la manĝosalono. Viktorjo, per vergeto ĉe sia mano, provdesegnis figurojn sur la tero : ŝipeton, arbon, kabanon, ion, kio aspiris simili al vizaĝo. Li tediĝis; per la piedo li forviŝis sian verkon. Kaj kiam li intencis foriri, Manuelo diris :

- Argentina Teatro, ensemblo de Mùinjo-Alipo, ĉu vi memoras? Iun vesperon mi vizitis ĝin kun Sesilja.

De antaŭ kelkaj tagoj ili jam ne paroladis pri ŝi.

- Ha, jes. Al ŝi plaĉis multe la teatro. Ankaŭ mi invitis ŝin plurfoje, - diris Viktorjo sidaranĝante sin pli kontente.

Manuelo kolere rigardis lin, sed tio mallonge daŭris al li.

- Devas esti ja alia Sesilja; ŝi neniam rakontis al mi, ke ŝi konis vin - li diris sinkontentige.

- Bone, tiuokaze, ŝi ankaŭ neniam parolis al mi pri vi - , diris Viktorjo rideta rigardante al lia vizaĝo.

- Sed...

- Ni iru - interrompis lin Viktorjo - la prezentado estas komenciĝonta.

Kaj brake prenante lin, li kondukis lin al la improvizita teatro.

Ili denove renkontis unu la alian dum la intervalo de la unua akto. Manuelo ne estis priatentinta la ludadon; li pensadis pri la kialo de la amikeco inter Sesilja kaj Viktorjo. Jarojn post la lasta vespero, kiam ŝi kaj li (Manuelo) estis kune, ne ekzistis alia ebleco; kaj ja ne povis ne ĉagreni lin, ke dum la tempopaso Sesilja konus ian ulon, kia Viktorjo.

- Kiom aĝa ŝi estis, kiam vi konis ŝin ?

La demando surprizis Viktorjon. De antaŭ du semajnoj li imagis Sesiljan juna; ŝin kaj lin : junaj...

- Mi ne scias... - li diris, heziteme - , kion mi scias...
Ŝi aĝis dudek jarojn, pli-malpli.
- La aĝo, nu, la ĝusta aĝo...
- Ĝusta, ĝusta... Kiom aĝa ŝi estis, kiam vi invitis ŝin al la Argentina Teatro ?
- Dudek-tri jaraĝa -diris Manuelo.

Viktorjo ŝajnigis mienon de memoresploranto, duonfermis la okulojn kaj per etaj kapmovoj li serĉadis la aĝon de Sesilja. Fine, li asertis :

- Ĝuste tiom aĝa, ĝuste... - li diris, fingrosignante al Manuelo.

Kaj Manuelo senmove restis, ne sciante kion diri. Viktorjo amuziĝis.

- Nu, kial ? Ĉu ŝi estis via amantino ? Ĉu via edzino, eble ? - li demandis, tre serioze.
- Ne, ne ; tio ne gravas - diris Manuelo, kaj turnante sian dorson al li, li ekpaŝis en direkto al la seĝoj. Oni komencis estingi la lumojn. Li sidiĝis kaj fermis la okulojn.

Kaj li ne leviĝis dum la intervalo de la dua akto.

"Kion ajn mi volas, krom renkonto kun Viktorjo".

Li ne povis eviti lin fine de la prezentado. Li vidis lin tre kontenta : farante gestojn, li laŭte parolis.

"Kiom da energio por lia aĝo !" - pensis Manuelo, kaj alproksimiĝante li eltrovis, ke liaj gestoj estas sufiĉe ridinda imito de la duelo de la unua akto.

- Fabele ! Kiel fabela duelo ! - diris Viktorjo, ripetante kvarfoje la geston de la glavopiko.
- Jes, - diris Manuelo, kaj li sentis, ke oni apogas fingron kontraŭ lia brusto.
- Frapite ! - Viktorjo ride kriis, kaj kliniĝis, imitante la saluton de la venkinto. Aliaj kompanoj ĉirkaŭis lin, kaj ili ridante ekiris al la dormoĉambroj.

III.

Dum longa tempo oni parolis pri la teatraĵo. Por esti ekzakta, ĝis la tago, kiam mortis la "turko" Asbani. Ĝis tiu mateno, kun akraj kritikoj aŭ grandaj laŭdoj, la biblioj ĉiam temis pri la prezentado de "Don-Juano". Poste, kompreneble, oni babilis pri Asbani : pri tio, ke oni multe sopiros pri li ; ke li estis bona kaj kamaradeca ; ke

tiamaniere, malgraŭ lia aĝo, ke tiel subite... Kaj pri amaso da aliaj aferoj, ĝis kiam Zorrilla kaj Asbani estis forgesitaj, kaj ĉio denove fariĝis kiel antaŭe.

Viktorjo tamen ankoraŭ memoris ilin ambaŭ : Asbanin, ĉar li estis vera amiko lia, amuziĝema kaj ŝercema kiel li ; Zorrillan, pro la unua akto de "Don-Juano". Li ne povis forgesi la scenon de la duelo, kaj nun li bezonis ~~kunmemori~~ ĝin kun iu. Li pensis pri Manuelo kaj ekiris al la muzeo. Li estis certa, ke li renkontos lin kiel ĉiam, silente starantan ĉe la bildo de S-ino Magdalena.

- Ĉu vi vidis, kiel mirinde, kiam "Don-Juano"... ? - li diris, alvenante.

Starante antaŭ la okuloj de S-ino Magdalena, tiel similaj al tiuj de Sesilja, neebliis ke Manuelo priatentos alian aferon. Li eĉ ne rimarkis la ĉeston de Viktorjo. Silente, li ŝajnis paroli kun la bildo. Viktorjo tusavertis kaj Manuelo surprizite turniĝis. Tiam, montrante al la bildo, li diris :

- Kion vi faris ? Kien vi iradis kun ŝi ?

Viktorjo ne emis paroli pri "ŝi". Tiu matenon li emis paroli pri dueloj, pri ilia signifo por li. "Don-Juano" pravigis lin. Ekde la prezentado, li ne pensis pri alia afero. Tre malmultajn minutojn li estis dediĉinta al Sesilja. Kaj denove (nun nevole) li estas implikita de tiu amindumo. Li sin ĝenis. Li tre malvolonte komencis imagi renkontojn.

- Kion mi scias... ? Ni eliris promeni kaj babili, kie ajn - li diris, post tempeto.

- Kie, kaj pri kio vi babilis ?

- Nu... ni babilis pri tiom da aferoj. Pri muziko, ĉar ŝi do tiel multe ŝatis ĝin. Fine, nu, pri ĉio, kion oni povas priparoli en tiaj okazoj.

- Kiaj okazoj ? - diris Manuelo, kun la dorso turnita al la okuloj de S-ino Magdalena.

- Tiaj por eliri kaj piediri... promeni, ni diru.

- Kie ?

- Nu... mi ne memoras... en tiom da lokoj. La centro, la haveno, kion-scias-mi ?... la Rozujaro...

- Ne, ne, tion ja ne...! La Rozujaro, ne...!

Viktorjo ekpensis pri la dueloj. Li streĉis la brakojn kaj malfermis la manojn kun la platoj supre.

- Nu, bone, tra la Rozujaro, ne. - li diris - Kaj kun amikeca gesto li transmetis brakon sur la ŝultron de Manuelo, kaj milde malproksimigis lin el la bildo de S-ino Magdalena.

Li bezonis apartigi lin disde tiuj okuloj, kaj krome atingi adekvatan kadron por sia babilo. Li ekĝojis : en la ĉambrego mem li trovis la scenejon : du malnovaj sabroj pendantaj ĉe la muro. Tie ili ekhaltis.

- Memoru, kiam "Don-Juano" glavobatalas - li diris, montrante al la sabroj. Duelo ! Vi ne imagas, kio estas tio...

Matene, sed kiam la suno ankoraŭ ne leviĝis ; kaj la silento ; kaj la arbaro ; tiu mallumo jam ne malluma kaj nur sep viroj : la duelantoj, la sekundantoj kaj unu kuracisto.

Ĉiuj silente. Kaj eĉ la paŝoj : mezuraj, ceremoniaj. Ĝi estas rito de sango kaj fiero. Ĝismorte !

- Ĉu per pistolo ? - demandis Manuelo.

Estis la unua fojo, ke li vidas sian kumulon en tia animstato.

- Ne, kompreneble, ne - diris Viktorjo. La pistoloj bruas, multe bruas. Per sabroj. - kaj denove li montris al la sabroj - suss, suss (6), kaj morton ! Sangon, kaj mallevi la armilon.

Viktorjo mallevis la brakon. Li akompanis la rakonton per la mimiko de la duelo, kaj nun li estas tre laca. Li lasis sin sidfali sur fotelon. Li malfacile spiris.

- Kaj la makulo, ruĝa, etendiĝante sur la nigra vesto - li povis diri, kaj li fermis la okulojn.

Estiĝis longa silento. Manuelo, stare, rigardis sian kumulon. "Li estas maljuna", li pensis. Kaj li restis rigardante lin, ne sciante kion fari. Fine, eksidante apud Viktorjo, li komprenis, ke li devas demandi ion.

- Sed... ĉu vi iam duelis ?

- Ĉu mi ? Bonvolu ; dum mia vivo mi ne ekprenis glavon. - Viktorjo kun sufiĉe da malĝojo nun diris la veron.

Sed estus plaĉinta al mi...nu, kion mi scias...

Manuelo ekstaris, kontente.

- Kontraŭe, mi, jes - li diris ŝultrofrapante lin.

- Jes, kio ? - demandis Viktorjo.

- Mi skermadis, kiam mi estis pli juna - diris Manuelo, kaj nun li kondukis Viktorjon al la sabroj.

Li malpendigis unu, li provsalutis, kaj li malfacile intencis manovron. Li ankoraŭ memoris ion.

- Sesilja ĉiam venadis al la ludoj. Ŝi multe amis la skermarton.

Tio estis blago. Sesilja povis vidi lin en neniu turniro, ĉar Manuelo konis pri la skermarto apenaŭ du-tri elementajn

aferojn lernitajn antaŭ ol li fariĝis dudek-jara.

Kio gravis ? Jen Viktorjo staras gapante al li kun okuloj larĝe malfermitaj, kvazaŭ sorĉite. Tiam Manuelo, ĉiam kun la sabro en la mano, elpensis la plej nekredeblajn historiojn : pasiigajn, honorplenajn batalojn. Ĵetinte sin en la fabeladon, li kuraĝis elpensi duelon, kiu ne efektiviĝis, ĉar okazis la reamikiĝo.

- Tio ŝajnas al mi afero de malkuraĝuloj - interrompis Viktorjo.

- Kion vi ja scias pri tiaj aferoj ? - diris Manuelo. Li (kaj lia nomo ne gravas al la historio) preferis la pardonon, ol la morton.

Kaj li remetis la sabron ĉe ĝia loko. Poste, li pergeste invitis Viktorjon eliri el la muzeo. Ili silente piediris : Manuelo, tre kontente ; Viktorjo, kun kapo mallevita, sentis koleron kaj ne emis klarigi al si kial.

Ĉiam silente ili preterpasis la bildon de S-ino Magdalena.

Viktorjo ekhaltis, ŝajnigante indiferentecon. Li rigardis la bildon ; poste rigardis Manuelon. Kaj denove ekridetante, li diris :

- Kiel strange, ŝi neniam rakontis ion al mi ! - li faris longan paŭzon por esplori la reagon de Manuelo. Malgraŭ tio, ke ŝi ĉion rakontadis al mi.

Li trafis ja sian celon. Manuelo jam ne havis la feliĉan mienon de antaŭ kelkaj minutoj ; kaj li nun denove rigardis serioze al li, atendante la aliajn vortojn.

Kaj Viktorjo ne atendigis lin. Li parolis pri luksaj baloj, senfinaj valsoj, ambaŭ turniĝantaj kaj ridantaj, forgesintaj la mondon. Li parolis pri sunplenaj vesperoj, kaj ili kuŝantaj sur la boatfundo, lasantaj sin konduki tra kiu ajn rivero de TIGRO (7). Li parolis pri la kaŝita insulo, kiun li ĵus elpensis. Kaj li parolis pri amaso da aliaj aferoj ; ĉio ĉiam volvita de malkvietiga dubasenceco.

Manuelo rigardis la vizaĝon de S-ino Magdalena, ŝiajn okulojn. Li pensis pri la insulo, ĉirkaŭita de junkoj kaj odoranta je verdaĵo. Kaj mordante siajn lipojn, li faris la demandon.

- Mi estas sufiĉe vireca por ne respondi tiun demandon - , diris Viktorjo tre serioze, reliefigante la lastajn vortojn.

Manuelo komprenis sian eraron. Li hontis, sed li ne volis pardonpeti. Sen diri eĉ unu vorton, li eliris el la muzeo direkte al la manĝoĉambro.

Ili manĝis disigitaj. Viktorjo sopiris pri Asbani ; jam li ne estas por blagi, kaj la historio de Sesilja ĉiutage plaĉis al li pli kaj pli. Li emis daŭrigi, parolante pri ŝi. Li konis nur ŝiajn okulojn ; ĉion ceteran li elpensis unika kaj bela. Kaj tiun vesperon, finfine, li konvinkiĝis, ke tia knabino, kia Sesilja, estas tiu vivkamaradino, pri kiu li iam revis. Kaj li dormis, feliĉe.

Manuelo, kontraŭe, havis tre malbelajn sonĝojn. Li vidis insulon kun vualitaj koloroj ; kaj en la insulo iun Sesiljan malsimilan al tiu, kiun li konis ; iun Sesiljan, kiu ridadis kaj ridadis, kurante inter la junkaro kaj transsaltante flakojn, ĉiam man-en-mane kun iu difuza viro, el kiu poste rezultis Viktorjo. Ambaŭ devas kanti tre gajan kanzonon, ĉar brakumite kaj ridante ili falas meze en la herbon. Tie, iom post-iom kaj ĉiam ridante, ili perdiĝis.

La tusado de tiu ĉe la lito 8 vekis lin. La maljuna Roĝero malbonfartis, tusadis forte, vekante siajn kunulojn. Poste, ĉiuj ree endormiĝis. Sed ne Manuelo ; kun okuloj treege malfermitaj, rigardante aŭ pli bone dirite, imagante la blankon de la plafono, li pensadis pri la insulo, pri la promenoj, pri la ridoj kaj pri la babiloj. Li kreadis la plej krudan perfidon, kaj baldaŭ li konvinkiĝis, ke la ridoj estas pri li, ke ambaŭ mokridas lin. Li tiam premfermis la okulojn, kaj preskaŭ nekonscie insultis laŭte.

- Pardonu, mi ja ne povas eviti tion - , diris Roĝero meze de la tusado. Mi klopodas, sed ne povas.

Manuelo ne respondis. Li turniĝis en la lito, kaj kovris sin ĝis la kapo. Morgaŭ li parolos kun Viktorjo.

Li renkontis lin en la muzeo, kun la sabro en la mano, provante skermomanovrojn.

- Kion vi faras ? - demandis Manuelo, surprizite.

- Ne, nenion - diris Viktorjo, kaj mallerte remetis la sabron ĉe ĝia loko. - nur por pasigi tempeton.

Nun ambaŭ staris, silente kaj rigardante unu la alian.

- Vi, Manuelo, kiu scipovas - Viktorjo alproksimiĝis kun amara rideto - nu, bone, vi kiu praktikis, kaj ludis en turniroj, kaj ĉio... ĉu vi... ni diru... ĉu vi ne povus... instrui al mi iun movon, aŭ ion similan...

Li koleris, ĉar li diris "instrui", sed li jam staris apud Manuelo, kaj nun li ameme premis lian brakon.

- Nu... por vidi, kiel tio estas - li finis, intencante

ŝajnigi indiferentecon.

Mirigite, konfuzite, Manuelo rigardis lin unufoje kaj denove. Kaj li ekĝojis : nu, kien la insuloj, kaj la boatoj kaj la valsoj ? La ridado finiĝis : jen la amindumanto petas al li bonvole la instruadon de la nobla skermarto. Li prenis pozon de granda majstro.

- Pro Dio, Viktorjo, tio ne estas lernebla en unu tago.

Tujsekve li aldonis, en tre mallakta voĉo :

- Vi krome estas jam tro aĝa por lerni.

Viktorjo malbenis sin, insultis sin, diris al si "idioto", sed li tenis la rideton.

- Jes, kompreneble - li diris, ridetante.

Li ne povis eviti ĵeti lastan rigardon al la sabroj. Li metis la manojn en la poŝojn kaj komencis piediri direkte al la parko. Li bezonis esti sola, pensi pri nenio, alparoli kaj vidi nenion. Iu mano haltigis lin. Manuelo estis preninta lian brakon, kaj milde retroirigis lin. "Li instruos al mi", pensis Viktorjo, kaj li tre kontente turniĝis.

- Mi havas plurajn aferojn por demandi al vi - diris Manuelo.

Sesilja, ha ne ! Kvankam tio ankaŭ plaĉis al li, nun li ne emis elpensi promenojn, koncertojn aŭ konversaciojn. Li estis tre malĝoja ; tiu ne estis momento por ŝercadi pri tiu junulino. Li malligiĝis je Manuelo.

- Pli malfrue - li diris.

- Ne, nun - diris Manuelo.

- Nun, kion ? - demandis Viktorjo.

- Mi volas ĉion scii.

- Kian ĉion ?

- Ĉion. Mi volas ĉion scii pri tiuj promenoj kaj tiuj babiloj.

- Mi jam diris al vi, kie ni promenadis, kaj pri kio ni babiladis ; al vi mi jam diris ĉion. Bonvolu ne esti ĝena.

Kion pli vi emas scii ?

Manuelo kvazaŭ ploure fikse rigardis lin.

- Mi volas scii, ĉu vi amis ŝin, diable !

Li tremis kaj preskaŭ ne povis stari ; li premis la dorson de la fotelo per ambaŭ manoj. Li malfacile spiris ; li diris ion pli, sed tio ne estis komprenita.

Viktorjo ne devis rideti. Li senkonscie ridetis, preskaŭ nevole. "Nu, mi do jam ne havas la aĝon", li pensis, rigardante sian kunulon ; sed li ne povis ne kompati iomete lin : Manuelo, tre pala, ŝvitis. Eble pro kompatato li estis ĵus

konfesonta al li, ke li neniam konis ian Sesiljan, diri al li la veron kaj lasi lin trankvila kun siaj memoroj.

Sed li ekvidis la sabrojn; kaj malantaŭ la sabroj, iun junulinon kun tre mildaj okuloj, kiu gratulas la junulon Manuelo Ponse, venkinton en nova turniro. Tie, tre apude, li povis vidi tion, kion li neniam havis. Kaj ankaŭ, la belegan kaj unikan - sed ne por li - fraŭlinon, kiun li ankaŭ neniam havis; tiun, kiu nun malproksimiĝas feliĉa, premante la brakon de la junulo Manuelo Ponse.

Li sentis ion neprecizan, kvazaŭ honton aŭ indignon; kaj li denove ridetis.

- Pri tio, ĉu mi ja amis ŝin ? - li konsciis, ke li venĝas je io -, Jes, kiel oni ja amas virinon.

- Kiel ? - diris Manuelo. Li sentis kapturmon, li pli forte premis la fotelon.

- Bonvolu, Manuelo ! Ĉu mi ankaŭ devas klarigi al vi, kiel oni amas virinon ? - diris Viktorjo, ridante.

Li sentis ĉe la vango frapon tre fortan, donitan de malgrasa mandorso. Estis mallonga silento ; Viktorjo palpis sian vangon. Poste, premante siajn dentojn, li antaŭenpaŝis al Manuelo.

- Maljunulo... - li diris, levante brakon.

Manuelo trankvile atendis lin, rigardante lin fikse, nekapabla fari ion.

- Ne, tiel ne -, li diris, kaj tio sufiĉis por haltigi la baton de Viktorjo. Tio estas viŝinda nur per unu maniero. Pro tio, se vi ne scias ĝin : mi ĵus defiis vin.

Viktorjo ankoraŭ ne komprenis bone. Li tamen sciis, ke li devas resti senmova : rigardante tiun maljunuleton, kiu serioze, ne personece, parolis malrapide, kvazaŭ pripensante ĉiun vorton.

- Kaj sen pistoloj, ĉar la pistoloj bruas - , diris Manuelo, kaj li montris la sabrojn, kiuj pendis ĉe la muro. - Ĉu vi memoras ? : "suss, suss, kaj morton !"

Nun Viktorjo komprenis ĉion tre bone. Li estis ĵus ridetonta, ridonta, kaj tiumaniere ride klarigonta al li, ke tio estas granda blago. Sed certe unuafaĵe en sia vivo, li povis eviti la rideton.

Mi ne scias, eble ĉar li vidis la rigardon de Manuelo aŭ la okulojn de S-ino Magdalena, aŭ la du sabrojn, solaj ĉe la muro; neeblus klarigi la kialon, aŭ klarigi kiel li komprenis, ke tiu estas SIA momento. La nura, la sola, kiu

povus pravigi esti havinta neniam fraŭlinon kun mildaj okuloj, kaj promenon kun ŝi, kaj insulon kaj kunridon.

Li vidis la okulojn de Sesilja en la okuloj de S-ino Magdalena, kaj li malĝojis, ĉar li ofendis ŝin. Li sentiĝis multe pli malbone, ekkompreninte, ke tiu fraŭlino eble iam estis ankaŭ de Manuelo. Li kolere rifuzis partopreni ŝin. Sesilja nun estas LIA. Kaj li ekkonsciis, ke se li pardonpetus, li jam neniam povus reekhavi ŝin. Li memoris, ke neniam en sia vivo li manipulis sabron kaj li malvarme komprenis, ke Manuelo venkos.

Li ne havis tempon timi; li travivis tiun momenton, kiun oni nur unufoje travivas. Kaj se oni ne kapablas tiun fojon travivi ĝin, jam neniam plu. Do, kial ĉio? Li ne intencis lasi sian nereveneblan momenton forfuĝi. Li pardonpetis al iu Sesilja Oros, kiun li neniam konis, kaj per laŭta voĉo, tre serioze, li diris ke jes, ke li akceptas la defion. - Je la kvina frumatene, en tiu ĉi sama loko -, estis la respondo de Manuelo.

Kaj ili revenis al la silento.

IV.

Ne estis sekundantoj, ankaŭ ne kuracisto. Ĉi lasta ne necesis, ĉar la duelo estos ĝismorta.

Ili renkontiĝis, je la difinita horo, en la salono de la muzeo. Eĉ ne salutinte unu la alian, ili malrapide malpendigis la malnovajn sabrojn. Manuelo provis la sian, palpante per fingro la akraĵon. Viktorjo faris la samon, kaj ambaŭ komprenis, ke la armiloj troviĝas en sufiĉe malbona stato, tre rustaj kaj preskaŭ malakraj. Sed ne estis aliaj, kaj por unu plia fojo - la lasta -, tiuj taŭgos.

- Kiam vi volos - diris Manuelo.

- Kie? - demandis Viktorjo.

- En la parko - diris Manuelo.

Kaj en tiu direkto eliris: Manuelo Ponse, 71-jara, de antaŭ nur du monatoj en la azilo, kaj Viktorjo Antola, 69-jara, jam de antaŭ kvin jaroj en la azilo.

Ili eliris en la nokton, kiu ne estis malluma. Ili silente iradis, meze de la milda parfumo kaj la susuro de folioj kaj birdoj, kiujn ĉiuj parkoj havas je tiu horo. Ambaŭ tre malĝoje iradis: Manuelo Ponse devis forigi la lastan personon, kiu konis Sesiljan. Li jam ne havos, kun kiu paroli pri ŝi. Viktorjo Antola iris al sia sola kaj

lasta duelo; al li plaĉus rakonti tion al iu, kaj ankaŭ kompreneble rakonti al tiu pri Sesiĵa.

Ili malrapide iradis, ambaŭ firme kaj rekte. Unu mano ĉe la flanko de la korpo; per la alia ili arogante kaj orgojle premis la tenilon de la malnova sabro.

Tre milda vento blovis. En la fono, ektagiĝis.

- (1) Kampanjo de la Dezerto. Kampanjo de la Prezidento, Generalo Roka, en la jaro 1878a, por disbati la lastajn indiantribojn kaj liberigi la "Dezerton" (= Pampon) al la koloniado.
- (2) "Turko". En Argentino, kromnomo foje karesa por la arabdevenuloj kaj idaro (ĝenerale sirianoj kaj libanoj). La unuaj enmigrintoj havis turkan pasporton, ĉar ilia devenlando estis sub turka jugo; la oficistoj ne komprenis la diferencojn de gentoj. Veraj turkoj enmigris malmultnombro; kontraŭe, la siria-libana kolektivo kaj posteuloj nombras ĉ. 800.000.
- (3) (4) PALERMO, kvartalo kaj Parko. Distrikto norde de Urbo Bonaero, kun altvaloraj konstruoj kaj belega giganta Parko.
- (5) Rozujaro. Loko en Parko Palermo, priplantita per rozujoj.
- (6) Suss, suss! (el: susuro). Onomatopeo de la susuro de la glavo fendanta la aeron.
- (7) TIGRO. Regiono, delto en Bonaerio. Pitoreskaj turismaj lokoj.

" LA SANKTA PROMESO "

De : CERNADAS (:sernadas), Samuelo

Tradukis : Enio Hugo Garrote

Kordobo (Argentina Respubliko)

.....

La miraklofara kruco de Lopes, ekde pramalnovaj tempoj, havis sian sidejon en la ranĉo de Sinjor' Davido Cabrera (1), maljuna kreolo, koloniinto de Haveno Rekonkero (2), je tri leŭgoj (3) de la vilaĝo.

Oni plenumis la sanktpromesojn kun la devigo procesie porti kaj reporti la krucon, kun muziko, post la rita balo.

Kiam forpasis ĝia posedanto, la kruco estis translokita al la vilaĝo, kie de tempo al tempo oni efektivigis tiujn pitoreskajn festojn.

Sed... kiu estis Lopes ? Kiamaniere li influis post sia morto ?

Tion diras ĉi versaĵoj, kiujn foje ni aŭdis kanti ĉe la improvizita altaro :

"Antaŭ tiu ĉi altaro
kaj de ĉiuj ĉeestantoj
ni prikantos historion
de la kruco jen staranta".

"Francisko Solano Lopes
estis juna kavaliro,
honesto, amuziĝema,
sincera, lojala amiko".

.....

Bum ! Bum ! Bum ! la frapoj kadence sin sekvis, kaj la batilo de la pistujo, manipulata de la fortika brako de Sinjorin' Konsinja (4), malrapide faris la taskon prepari la maizon por la bongustega lokro (5), baza plado en la nutrado de la humilaj homoj en la norda regiono de Santafeo.

Foje kaj foje la diketaj manoj de Sinjorin' Konsinja transŝutis la enhavon de la masiva vazo el urundaj(6)-ligno, varmeta pro la ripetitaj frapoj, en latunan pladon

por ventumi ĝin; kaj tiam brue ĉirkaŭis ŝin roto de kortobirdoj avidaj engluti la ŝelojn aeren disĵetitajn.

Sinjorin' Konsinja estis ĉirkaŭ kvindek-jaraĝa vidvino kun masiva korpo, kiu posedis, krom la ampleksa kabano kie ŝi loĝis, tri laktobovinojn kun idaro, kadukan malaltan ĉevalon, sian filinon Ĥasinta, sian filon Ŭenseslao, dekdu-dektrijaran adoptofilon kromnomitan Tato, la plej diversan kolekton de kortobirdoj, el kies bredado ŝi tiris bonan profiton, kaj sufiĉe da katoj kaj hundoj atestantaj, ke ŝia domo estas de kreoloj.

Ĥasinta, bela kaj ĉarma, fortika junulino, kvankam deknaujara, neniam okazigis al sia patrino la plej etan ĉagrenon. Eĉ se ne mankis al ŝi amindumantoj, el kiuj la plej persista kaj obstina estas la turka (7) kolportisto Dibb, kiu frenezas pro amo al ŝi de antaŭ tri jaroj, ŝi scipovis seniluziigi ilin sen ofendi ilin, pretekstante, ke ŝi ankoraŭ ne deziras forlasi sian patrinon.

Kontraŭe, Ŭenseslao, ĉirkaŭ kvar jarojn pli aĝa, jam ekde sia frua junuĝo estis la inkubsonĝo de la hejmo. Drinkema kaj kverelema, neinklina al laboro, senĉese promenanta kun nerekomendindaj kunuloj, li konis jam dufoje - krom la lokaj karceroj - la amarecon de la malliberejo, kien kondukis lin liaj denaskaj emoj, kaj el kie forkondukis lin per doloraj oferoj la plena patrino.

Tiumaniere jaron post jaro la brutoj, kiuj konsistigis ne tre malŝatindan gregon je la morto de la famiestro, reduktiĝis al la tri laktobovinoj kaj la kaduka malalta ĉevaleto.

Jam preskaŭ unu jaro estis pasinta de kiam Ŭenseslao, kvazaŭ pro sorĉo, komencis konduki edifan vivon. Escepte de siaj dubindaj viraj rilatoj, li ne plu drinkis, ne eliris, kaj kontraŭ siaj antaŭaj kutimoj, li ameme deponis la monprodukon de sia kontinua laborado sur la manojn de Sinjorin' Konsinja, por ke ŝi disponu pri ĝi laŭ sia bontrovo.

Tiu subita transformiĝo, kiun komence oni kredis pasema kaj kaprica, tiel multe plaĉis al la fratino, ke ŝi vivadis nur por festi ĝin, amplene prizorgante la vestaĵojn de la junulo, kvazaŭ ŝi estus amema edzino dediĉita diveni liajn dezirojn, por kontentigi ilin.

Kaj Sinjorin' Konsinja, rejuniĝinta kaj ĝojega ekde kiam ŝi ekrimarkis la novan situacion, nevarie ripetadis kiel

refrenon, kiam oni menciis la aferon al ŝi : "Dank'al Dio...! ...ligna kruco...". Kaj ja neniuj, eĉ ne ŝia filino, sciis kion diable Sinjorin' Konsinja volis diri per tiu dubasenca vortoparo miksitaj de hispana kaj gvarania, kiun ŝi aldonis al tiu ĝojplena : "Dank'al Dio!"

- Tat-o-o-o-o!

- Panjo ?!

- Ĉu vi konas la domon de la altaro ?

- Ĉu ĉe la kruco de Lopes ?

- Jes.

- Ba! Kiel mi ja ne sciis ? Lastsabate, ĉu vi scias, panjo? Kiam oni alportis ĝin ĉe Sirilon, kiu sanktpromesis por ĉesigi la drinkadon, mi firme portis la flagon.

- Ah! Kaj Sirilo, ĉu li ĉesis drinki ?

- Li volis tion; pro tio li solenis la balon al la kruco.

Ĉu vi scias, panjo?... li ĉesos klini la botelojn kiam Manuelo fariĝos Sanktulo, kaj por ke tio okazu, al mia kaduka ĉevaleta devas kreski la laktodontoj...(8).

- Bone, Tato. Prenu la ĉevaletan, rajdu ĝis la domo de la altaro, kaj diru al la mastro : "Komisie de mia baptopatrina, Sinjorino Konsepsiona, Vidvino de Morales, mi diras al vi, ke venontan sabaton la flagportantoj venos kunporti la krucon por plenumi sanktpromeson ĉe ŝia domo de la Ombuaro" (9).

- Tre bone, panjo.

- Ĉu vi scipovos diri, kion mi diras al vi ?

- Jes, certe.

Ŝi lastafoje surblovis la pistitan maizon de la latuna vazo, kiun ŝi metis sur la malaltan aleron de la kuirejo, ŝi fortimigis la birdojn ĝenantajn ŝian iradon, kaj poste ŝi portis seĝon kun sidloko el plektitaj ledrimenoj sub la ombron de ombuo, kies vasta branĉaro atingis la kabanflankojn, kaj ŝi mediteme sidiĝis.

El tiu poŝo kaŝita ĉe la faldoj de sia ampleksa orlita vesto, ŝi eltiris etan pakajon, kiun ŝi zorge malvolvis. Ŝi vokis sian filinon, kiu plenumis la mastrumajn laborojn akompanante ilin kiel kutime per la plej varia repertuaro de popolkanzonoj.

La junulino rapide atentis la patrinan vokon, kaj Sinjorin' Konsinja kun mistera mieno ordonis al ŝi alŝovi seĝon kaj sidiĝi apude. Poste ŝi diris al ŝi, transdonante

la etan pakajon, kiu konsistis el komunuzaj monbiletoj :

- Filinjo, kalkulu tiun monon.
- Panjo, el kie vi ĉerpis ĝin ?...estas almenaŭ cent pesoj...
- Pli ol tio devas esti, filinjo, ĉar kiu gardas kiam troas, tiu neniam estas malriĉa. Kiom estas ?

La biletoj pasis tra la fingroj de Ĥasinta, kiu per la manplatoj streĉadis kaj glatigadis ilin sur unu el la genuoj, kaj ŝi fine ekkriis :

- Panjo, estas cent dekkvin pesoj !...
- Estas malmulte, filinjo, sed mi ne povas atendi plu.
- Por kio, panjo ?
- Mi jen diros tion al vi : jarfine fariĝos unu jaro ekde la nokto kiam via frato revenis tute ebria, dum vi dormis; li malrespektis min kaj eĉ... Bone, filinjo, silente plorante mi kore faris sanktpromeson al la miraklofara Kruco : se Ŭenseslao forlasos la drinkadon, kiu damaĝas nin ĉiujn, post unu jaro mi faros feston al ĝi.

Kompreneble, la sekvintan tagon Ŭenseslao sciigis per mi pri sia miskonduto, kaj tiam li pardonpetis kaj promesis ne plu drinki.

Sed, filinjo, la Kruco ankaŭ estas miraklofara, kaj mi pagos mian ŝuldon; kaj sabate ni havos ĝin hejme por honorigi ĝin kiel decas per muziko, per balo kaj per raketoj, ĉar por io atingos tiu mono, frukto de mia pacienco.

- Kaj la altaro, panjo ?
- Pri tio zorgos vi kaj viaj amikinoj. Mi volas, ke oni ne diru, ke en mia hejmo, kie neniam oni dancis, kiam oni faras tion pro la sanktpromeso, la homoj ne amuziĝas. Komencu do prepari vin ekde hodiaŭ kaj senpere disponu pri tiuj bonaj pesoj (10).

En "LA OMBUARO" svarmis la homoj. La sciigo pri la festo ĉe Sinjorin' Konsinja estis zorge disvastigita pere de Tato kaj sia ĉevaleto. La ampleksa korto ombrata de branĉoriĉa ombuo estis glata, pura, bone akvita, kaj ĉirkaŭita de benketoj kaj la plej diversa kolekto de krudaj seĝoj destinitaj al la alvenantaj dancontinoj.

La petardoj kaj raketoj foje kaj foje krakadis, disĵetante tra la aero la akran odoron je pulvo.

Interne de la kabano, Ĥasinta kaj ŝiaj amikinoj lerte donis la lastajn retuŝojn al la altaro, impona kolekto de broditaj galonoj, brodeteksitaj tukoj kaj orlopuntoj tapiŝ-

antaŭ pecon de la muro kaj kovrantaj ĝisplanke tablon almetitan ĉe tiu loko. Ĉio estis garnita de la plej diversaj ornamoj imitantaj florojn kaj kronojn, ellaboritaj per la tuta varia gamo de la fleksebla krepa papero.

Je la vesperkrepusko, en la longa vojo ekaperis la procesio kun la miraklofara kruco. La flagportantoj, viroj kaj virinoj kun larĝaj rubandoj el malsamaj koloroj, subtenis aliajn pendantajn de la brakoj de la kruco, alte portata, meze de la irantaro, de barba kaj ebria maljunulo. Antaŭe, gitaroj kaj violonoj disvastigis la akordojn de nekomprenebla muziko, en la bruado de la petardoj kaj raketoj. Ambaŭflanke, du larĝaj naciaj flagoj flirtis en la vento; unu el ili estis portata de la rebonigita Ŭenseslao, vestita per la pordimanĉa kampbluzo.

La pitoreska kolono atingis la korton de la festo, kie la korpulenta Sinjorin' Konsinja kaj ŝia filino Ĥasinta, genuantaj ĉe la mezo, akceptis la krucojn de la manoj de la ebria maljunulo, kaj post nekompreneblaj vortoj de ekzota rito, ili portis ĝin domen por ke ĝi prezidu ĉe la improvizita altaro la kampan ceremonion plenumi sanktpromeson por reciproki ĝian miraklan influon.

La ampleksa dancejo estis malgranda por tiom da danco-paroj, kiuj formiĝis je ĉiu ĉamameo (11) aŭ polko (12), kiun la muzikistoj ludis.

La lanterno de la gaŭcoj - la luno - en sia tuta lumopotenco, disŝutis kvazaŭ brilajn monerojn sur la ombrita tero, aŭ pendigis moviĝantajn speguletojn ĉe la vestoj de la dancantoj, kiam ĝi filtris siajn radiojn tra la densa branĉaro.

La dommastrino, sidanta en konvena loko sur sia komforta fotelo kun sidloko el plektita pajlo, plenumis la ritaron ekfajrigante per sia dika paragvaja cigaro paketojn de raketoj, kiujn ŝi disĵetis meze de la dancantojn. Tio, miksite meze de la paroj, klopodis trete estingi ilin por gardi la nefajrigitajn.

Ĥasinta jam estis doninta la centan afablan neadon al la turketo Dibb, kiu senŝanceliĝe insistadis per renovigitaj argumentoj en sia pretendo konkeri la koron de la Ĉarmega kreolineto.

Ankaŭ Ŭenseslao estis dancinta, kaj en la balo li ne povis eviti la denovajn interrilatojn kun la malnovaj kama-

radoj, kiuj festis pro lia ega ĝojo.

En senĉesaj apartaj kunvenoj, ili insiste invitadis lin iri tien, al la proksima drinkejo de Aĵala, por refreŝigi malnovajn rememorojn pri intima kamaradeco... La junulo rezistis laŭ sia eblo, sed la pravigoj de liaj malnovaj kamaradoj superis lian volon. Kaj li iris tien...

De la invito de la unua glaso li transiris al la propono. Ĉio cetera venis pro logika konsekvenco, kaj post unu horo ŭenseslao, meze de siaj amikoj, komplete ebria kaj kun la malnovaj mankoj reviviĝantaj, rompis per laŭta batalkriego la ritmon de la ĉamameoj. Kaj unuafoje estis la kazo, ke sanktpromeso al la miraklofara kruco de Lopes havis kontraŭan efikon.

Sinjorin' Konsinja brakumis sian filon, kiu nesubmeteble kaj bataleme fendis la aeron per sia elingigita ponardo, kaj afliktoplena, kun distaŭzitaj haroj, ŝi priploris la senutilecon de sia ofero.

- (1) ranĉo. En Argentina Respubliko kaj Urugvajo, kabano starigita de kampuloj. Nuntempe, "la propra domo", eĉ se ne modesta; tio estas relikvo de la antikva ĝauĉa lingvo.
- (2) Rekonkero. Traduko de la hispana nomo de nuntempa grava urbo en provinco Santafeo, ĉe la Paranao. Reconquista (: rekonkista).
- (3) leŭgo. France : "lieue"; angle: "league". Longomezuro = ĉirkaŭ 5 kilometroj.
- (4) Konsinja. Diminutivo de Konsepsiona, virinnomo.
- (5) lokro. Keĉudovena vorto. Plado : pistita maizo, boligita kun viandopecoj, kaj ingrediencoj kaj spicoj.
- (6) urundajo. (el la gvarania). Amerika arbo, el la anakardiacoj, kun fortika malhelruĝa ligno ("astroniam balansae")
- (7) Turko. Araboj, sirianoj, libananoj, egiptanoj, ktp, estas misnomitaj kiel "turkoj", eble ĉar je la tempo de sia enmigro, ili kunportis turkan pasporton. Veraj turkoj estas ja malmultaj.
- (8) "...la laktodentoj" . Argentina esprimo, ironio, aludanta ion neblan.
- (9) ombuaro. Aro de ombuoj, giganta herbo kun spongeca trunko, misnomita "arbo" pro "sia branĉaro, sed kiu malhavas la ĉefan kondiĉon por tio : lignecan trunkon.

- (10) Peso. Argentina nacia valuto.
- (11) Ĉamameo. El la gvarania : "chamamé" = koridoro. Vigla muziko kaj danco multe praktikata en la Parana-bordaj provincoj argentinaj.
- (12) polko. Kreola varianto de la samnoma eŭropa danco, praktikata en la sama regiono kiel la ĉamameo.

" L A R E V O L U C I O "

De : GERCHUNOFF (:hercunof'), Alberto.

Tradukis : Enio Hugo Garrote
Kordobo. (Argentina Respubliko)

El la novelkolekto : "LA JUDAJ GAŬCOJ"

.....

En tiuj tempoj la ofico de vilaĝestro estis avidata de la plej respektindaj najbaroj de la kolonio. Al siaj plenumantoj ĝi donis ian aŭtoritatan prestiĝon, eksterigitan dum la oficialaj aranĝoj per manpremo de la administranto aŭ eksterordinara sendito de la "Jewish"(1).

Dum tiu simpla ceremonio la kolonianoj estis regataj de nebula respekto, ekvidante sian reprezentanton konversacii kun tiuj altranguloj en familiara tono.

Oni pompe nomis lin : Urbeŝtra Moŝto, sed fakte liaj funkcioj estis malvastaj kaj trivialaj. Ili konsistis el la demarŝoj ĉe la Administracio pri la etaj procesoj de la najbaroj, la ŝanĝo de iu jungilo, iu bovino ekstreme nemal-sovaĝigebla aŭ la ĉevalo lamiĝinta pro iu ajn akcidento. Tamen ĝi provokis la luktojn kaj la pasiojn, kiujn la publikaj postenoj provokas en la bone organizitaj socioj.

Oni elektadis la vilaĝestron laŭ la demokratiaj reguloj, en preparaj kunvenoj kaj bruaj kunsidoj, en kiuj la plej pacemaj judoj ekzaltiĝis dum la disputoj per la jakobena oratorarto.

En la epoko, kiun mi aludas, Rabeno Isak Ŝtajn finis sian oficitempon. Dudek-ok kolonianoj konsistigis la solidan grupon de la opozicio, kaj kelkaj restis kiel partianoj de la vilaĝestro. La situacio estis grava, kaj la komentarioj de la sinagogo vortigis angoran malkvieton, kies eksplodon oni timis.

Iun sabaton matene, ĉe la korto de la kaduka templo, oni konversaciis pri tiaj aferoj, kaj oni utiligis la plej akrajn vortojn por kvalifiki la modestan funkciulon.

Rabeno Israel Kelner formadis agresemajn frazojn; Rabeno Abraham sobre kaj modere asertadis, malrapide glatigante sian belegan barbon; Jakobo, la juna kamplaboristo, ĉiam bone informita, intencis rakonti iun faron, kiu laŭ lia

opinio estis hontinda por Ŝtajn.

- Iun fojon - li diris - mi estis en la forĝejo de la Administracio...

Rabeno Israel, solena kun sia rita tuniko, faris patrecan geston, kaj asertis :

- La junuloj ne devas okupiĝi pri politiko; Rabeno Isak estas antaŭ ĉio respektinda maljunulo...

Jakobo fiksrigardis lin, aranĝis sian ĉapelon, kaj post kiam li levis iomete la zonon, kie brilis la tranĉiltenilo kaj la ĵetbuloj (2) el plumbo, li respondis kun kruda trankvilo :

- Vi pravas, Rabeno Israel; sed se la junuloj ne devas okupiĝi pri tiaj aferoj, vi ne devus peti al mi, ke mi voĉdonu por vi...

Rabeno Abraham diskrete tusetis kaj Kelner klopodis rideti. Junuloj kaj maljunuloj, dronantaj en ĝena atento, silente atendadis. Finfine, Kelner ekrisis :

- Vi neniam ŝanĝiĝas, junulo; vi ja nenium respektas... Do, vi diris ke vi estis en la forĝejo...

- En la forĝejo de la Administracio - respondis Jakobo. Mi iris tien preni unu sokon. Tie ĉeestis Rabeno Isak, kiu ankoraŭ ne estis vilaĝestro. Kiam ĉi-lastata foriris, la forĝisto rimarkis, ke dratvolvaĵo reduktiĝas laŭmezure kiel li malproksimiĝas. Kompreninte la okazaĵon, li tuj node ligis la alian ekstremon de la drato ĉe iu fosto kaj li vokis nin ĉiujn. Isak Ŝtajn rajdis laŭ malrapida troto laŭ la vojeto de la deklivo, sur sia grizblueta ĉevalo. Subite la drato streĉiĝis en la aero samkiel ŝnuro, kaj longa vibrado reeĥis. Rabeno Isak mallonge flugis super la kapo de la bruto kaj peze terenfalas kiel fojnobloko. Li pene leviĝis, malligis la draton el la ringo de la selo, rigardis al nia direkto, ree surĉevaliĝis kaj daŭrigis sian vojon. Vespere, parolante al mi pri la okazaĵo, li diris : "Ĉu vi vidis, Jakobo, kio okazis ? Mi ne scias, kiu kroĉis al mi la draton!"

Aliaj rakontis ne malpli interesajn aferojn, kaj oni alvenis al la konkludo, ke la vilaĝestro malhonoras la kolonion.

- Mi petis al li la ŝanĝon de iu jungilo - ekkriis unu -, pasis do jam tri monatoj kaj ankoraŭ mi ne sukcesis pri tio.

- Kaj pri Rozinjo?(3) Li ankoraŭ ne donis al mi alian bovion. La mia estas sovaĝa kaj oni ne povas melki ŝin ligita

je la piedoj nek ĉe paliso .

La plendoj kontraŭ Rabeno Isak daŭris plu. Ĉiu kolereme formulis admonojn el la sama speco, dum interne raŭkaj voĉoj hore preĝis.

- Jen venas la vilaĝestro - anoncis Jakobo.

Sur la polva vojo oni ekrimarkis la silueton de Rabeno Isak laŭ ĝia tuta larĝo. Li alproksimiĝis kun rideto plena de protektemo, salutante per tre afabla tono :

- Bonan sabaton, hebreeoj !

- Bonan sabaton, bonan jaron ! - oni respondis al li.

En la troa sobreco de la respondo la vilaĝestro ekrimarkis, ke la etoso ne estas tre favora al li, kaj li decidis konkuri la simpation de siaj malamikoj. Li diris :

- Hodiaŭ estas belega tago !... Kia plezuro, ke ĝi estas sabato, ĉar tiel ni povos tutriposi el la semajno, ĝui la bonegan aeron kaj la junuloj povos laŭplaĉe amuziĝi !

Israel Kelner, kiu pretendis esti justama homo, respondis :

- Li pravas.

Tio kuraĝigis la vilaĝestron. Lia facila parolmaniero elĉeniĝis per akordiga kaj afabla babilado, kun unu laŭdo por ĉiu. Preterpase, la antaŭan vesperon li vidis la tritikon en la kampo de Gintler.

- Impona tritiko !... - li ekkriis kun esprimplena gesto, priskribante la panoramon de la etendaĵo kovrita de tiu densa kaj verda ondaro. - Kaj la legomĝardeno de Kelner ? - li aldonis : - En kiu kolonio, Rabeno Israel, la okuloj renkontus similan vidaĵon ? Oni gajiĝas ĝin vidante.

Kelner replikis :

- Mi ja ankaŭ prilaboris ĝin.

La vilaĝestro ne neglektis esti agrabla eĉ al Jakobo, kies ŝultron li manfrapetis, demandante :

- Kaj via ĉevaleto ? Vi havas ĉevaleton, kiun princo envidus; kaj ĉiomon da mono ĝi valoras. Ĉu vi scias ? Nu, mi ŝanĝus ĝin kontraŭ mia plej bona ĉevalo.

- Malbonan negocon vi farus - respondis Jakobo -, la ĉevaleto estas iomete sovaĝa, kaj necesas scipovi rajdi sur ĝi...

Ŝtajn, kiu atendis pli ĝentilan respondon, rimarkis, ke li devas diri la preĝojn. Li surmetis la tunikon kaj eniris.

.....

Oni anoncis, ke post unu monato okazos la balotoj. Kelner promesis al la opoziciuloj zorgi pri seriozaj aferoj kaj fari la demarŝojn por la konstruo de lernejo kaj de la sinagogo.

Li faris la promeson dum parolado, ĉe Gintler, kaj li admonis Ŝtajnon pri lia indiferenteco kaj lia maldankemo. Kaj oni elektis lin.

Liaj antaŭaj amikoj post nelonge ektrovis mankojn al li. Samkiel Ŝtajn li malfruis en la liverado de novaj laboriloj al la najbaroj, kaj krome li sin tenis arogante kaj malŝateme. Iun fojon, ĉe la oficejo de la Administracio, la buĉisto petis al li fari la demarŝon por la ŝanĝo de unu plugilo, kiu preskaŭ tute difektiĝis pro la bovparo, kiu timigite forkuris. Estis pluga tempo, kaj tial la peto urĝis. Kelner aŭdace respondis :

- Lasu min, mi estas nun okupita!...

Kun malplaĉo oni komentis la agon, kaj la ofendo al tiel prestiĝoplena viro, kia la buĉisto, plenigis la virinojn per indigno.

- Kiu povus kredi tion ? - ili diris.

- Tio meritas punon !

La agado de la vilaĝestro estigis gravan movadon, estritan de Rabeno Isak Ŝtajn, laŭ antikva respektinda moro, kiu metis la eksvilaĝestron ĉe la fronton de la malkontentaj najbaroj, kiuj ĝenerale konsistigis la plimulton en la kolonio. Ofte fariĝis tumultaj kunsidoj, kaj en unu el ili oni pritraktis la plej oportunan manieron elficigi Kelneron.

Gravaj diskutoj kaj ardaĵ disputoj skuis Rahil-on. (4) Iun tagon la vilaĝestro troigis sian malrespekton, forpelante Ŝtajnon el sia domo. La vilaĝanoj eksplodis, kaj oni decidis kunveni tiun saman vesperon. La junuloj foriris al la paŝtejoj, kaj la maljunuloj kolektiĝis en la sinagogo por cerbumi pri la eventoj.

- Kiel vi opinias, se ni iros viziti la vilaĝestron ? - demandis Rabeno Abraham.

Ili pridiskutis la riskoplenan intencon, kaj fininte la kutimajn preĝojn, ili ekiris direkte al la domo de Kelner, ĉe la ekstremo de la liliputa vilaĝeto. La najbaroj okope marŝadis laŭ la vojo per malrapidaj paŝoj, en duopaj vicoj, kaj la vento agitis iliajn abundajn barbojn.

Kiam ili preterpasis la unuan loĝejon, la virinoj zorg-
 antaj pri la mastrumado per balailoj kaj rastiloj, demandis
 pri la kialo de la neatendita parado. Unu el ili klarigis,
 farante kolerplenan geston :

- Vizitonte la vilaĝestron !

Ili aliĝis la decidoplenan kolumnon, kaj el la apudvojaj
 domoj eliris virinoj por grandigi la imponan amason.

- Ni postulos al li la librojn... - kriis iu virino.

- La librojn! - ĉiuj ekkriis.

Tiaj libroj konsistis en kajero provizita de la Adminis-
 tracio, sur kiu la vilaĝestro notadis la petojn de la naj-
 baroj; ĝi estis la plej videbla simbolo de lia aŭtoritato.

Kelner, alarmite, ekaperis ĉe la pordo, kaj kiam la vi-
 laĝanoj alproksimiĝis, li demandis per ne tre aplomba voĉo :

- Kion vi volas ?

- Ni volas la librojn !

- La librojn ! - ĉiuj ripetis.

La vilaĝestro klopodis persvadi la ekzaltitojn, sed liaj
 penadoj estis vanaj. Eblis malkonvinki la virojn, sed ne la
 virinojn, kies koleron pligrandigis la milda tono de Kelner.

Ĉi-lastata finfine ekkriis :

- Estas aferoj, kiujn oni ne devas pritrakti kun virinoj !

- Kion diris tiu monstro ? - ekkriis unu.

Kaj alia, kiel nura respondon, ĵetis la balailon sur la
 vizagon de la vilaĝestro. Tio estis la signalo de la ekri-
 belo. La virinoj atakis la domon, detruante tion, kion ili
 trovis, kaj finfine ili trafis la alte ŝatatan kajeron.

Ŝtajn-edzino montriĝis ĉe la mallarĝa fenestro triumfe
 flirtigante la kajeron, kaj la tumulta kolumno ekmarŝis
 sub la venka svingiĝado de balailoj kaj rastiloj.

Tia estas la historio pri la revolucio de Rahilo, kiu
 similas al ĉiuj revolucioj, pri kiuj la Historio rakontas
 al ni.

(1) "Jewish". Mallongigo de "Jewish Colonization Company" =
 Juda Koloniiga Kompanio, fondita de Barono Rotŝild en
 Eŭropo, por la translokado de judaj enmigrintoj al kolo-
 nioj en provinco Entrerio, Argentino.

(2) Ĵetbuloj. Uzataj por piedlazi brutojn.

- (3) Rozinjo. En la kamparo oni donas karesnomojn al la brutoj.
- (4) Rahilo. Nomo de la kolonio, kie disvolviĝas la agado de la novelo.
-

" B A N A N O J "

De : ROZENMACHER (:rosenmaĉer), Hermano.
 Tradukis : Enio Hugo Garrote
 Kordobo (Argentina Respubliko)

El la novelkolekto : "KOMPLETA NOVELARO"

.....

La bananspadiko estis tiel grandega, ke DIAZ (:dias) apenaŭ povis teni ĝin. En la posttagmezo varmega, humida, ŝvitbana, ĉe ĉiu paŝo lia leviĝis polvonubetoj inter liaj piedfingroj.

Li palpe plukis unu bananon dum li traŭradis tiun straton de FORMOSA (1), larĝan kiel senakva rivero, kun la trotuaroj malproksime, kaj per la flavaj dentoj li senŝeligis kaj en-glutis ĝin, ĉar temis pri tiuj etaj bananoj, kiujn oni fin-mangas per unu mordo.

Iu hundo priŝlaris liajn kalkanojn, kaj DIAZ oblikve pied-frapis ĝin, sen vidi ĝin, pro tiu bananspadiko kiu kurbigas lian dorson.

Li poste emis ekhalti por malligi tiujn ŝuojn, kiujn li portis, pendantajn de la zono per la laĉoj; sed se li haltus, li sterniĝus mem tie; kaj krome la ŝuoj estas de la doktoro, kaj estas striktaj al li (2).

- "Kial vi ne lasas min resti, doktoro (3)?" - li estis dirinta al la paragvajano, notario, kiu tamen establis spicejon, kiun li atentis en pantofloj.

- "Nu, por kio? Se vi jam farbis la domon... Mi ne volas ofendi vin, sed vi uzis unu monaton por finfarbi ĝin."

Kaj li, malespere :

- "Nu, doktoro, la afero estas, ke mi laboras konscie. Kaj nun, kien mi iru?"

Kaj li donacis al li tiun bananspadikon, kiu preskaŭ faligis lin, kiam ĝi estis metita sur lian dorson. Kaj nun li sopiras pri tiuj vesperoj en la malantaŭa ĉambreto, inter la vitlaŭbo kaj la cisterno, kun la radiosendilo, kiun la paragvajano ŝaltis mem tie, en la deponejo, meze de skeletkestoj de vinboteloj kaj la klapliteto, sur kiu DIAZ dormis sur ĵurnalamaso.

Kiam li metis tiujn ladetojn (4) ĉe siaj oreloj, jam ne

surdigis lin la senfinaj griloj svarmantaj en la varmo, kaj tiam iu voĉo diris :

- "Kio nova ? jen tie ĉi parolas Perez(:peres), en Kuzko (5)."

Kaj li rakontis, kiel li estis koloriginta la banĉambron. Kaj tiam la doktoro ekkoleris, dirante, ke la sendoricevilo estas por pli gravaj aferoj. Sed kiam la doktoro surmetis la "ladetojn", li rakontis, ke efikis malbone al li la kapridaĵo, kiun li manĝis pasintdimanĉe.

Kaj Diaz petegis : "Lasu iom pli al mi".

Kaj la alia manipulis nadlojn kaj butonojn kaj diris : "Hola, Filipinoj"; kaj jen stranga voĉo, iel hispaneca, atinginta nin oni ne scias kiel, diris inter ondecaj interferoj : "Ho, kiel pluvas ĉi-matene, tie ĉi en Mindanao (6)". Kaj transigante la "ladetojn" al la paragvajano, Diaz demandis : "Nu, ĉu eble jam ĉesis la malvarmumo al Licenciito Medina ?".

Kaj tiel ili interparolis kun Akapulko (7) aŭ Barcelono, kaj Diaz ekscitiĝis kiel infano, ĉar tio estis kvazaŭ ĉiuj kunvenus ĉiuvespere en drinkejo.

Kaj tage, dum li helpis al la doktoro pri la varliverado, li zorgoplene diris al li : "Nu, kiel devas farti nun tiu astmulino el la bolivia vilaĝeto ?".

Nun ĉio finiĝis. "Bonvolu, Sinjor' Tobio" - li petegis al la paragvajano. "Kion mi faros ? Ĉar tio ĉi estas kvazaŭ mia hejmo ! Ĉar vi ja estas iel mia patro !".

Kaj la paragvajano diris al li : "Ĝuste, filĉjo, ĝuste !".

Li venis iam kun la radiosendilo por prepari la revolucion kontraŭ STROSNER (8), kaj fine li establis tiun magazenon, kaj nun li nur uzadas la radiosendilon por konversacii tre mallaŭte, enfermite en tiu deponejo, dum la grandegaj koleopteroj milope albatigias kiel memmortigaj blinduloj kontraŭ ĉiujn lanternojn, en la vespera varmego ; kaj li, distrite, interesiĝas pri la hepatito de la dentisto el Ariko (9).

- "Prenu" - li diris, liverante al li paron da ŝuoj kun la plandoj truitaj kaj la ledoj ĉe la pintoj preskaŭ ĉifona.

- "Sed kio restas al mi ? Post kiam mi ĉie erarvagadis, mi jen renkontis vin, kaj nun, ĉu mi devos do reiri al mia ino...?"

Kaj li rakontis ree al li, ke li havas ok idojn; sed tio ne efikis.

"Se Tolentina kaptos min, ŝi min murdos; mi ĵuras, ke ŝi min murdos, doktoro..."

Sed la alia jam estis ekhavinta senpagan vojaĝon pere de ŝipa ŝtewardo, kaj diris al li, duonkolere: "Nu, de antaŭ unu monato mi subtenas vin, Diaz, kaj vi vidas, ke mi ne havas monon".

Li ja havis, eĉ por disĵeti. Diaz emis diri al li, ke li ne estu tiel avara, ke li estu pli kristana, ke li protektu lin... sed li ja estis tiel timema...

Kaj jen li estis foriranta, kaj jen nenio savos lin de Tolentina. Ĉiuj aferoj kondukis lin ree al ŝi.

La vojaĝo al Bonaero, sufokite meze de la bovinoj, la okazaj dungigoj en la grenrikoltoj, la batadoj de iuj ebriaj policanoj en Santafeo (10), la nova eskapo sur la tegmento de vagono ĝis Formosa, ĉio estis senutila.

Kaj kiam li estis plej malproksime, kaj la aferoj komencis sukcesi, jen kun sia bananspadiko, kiu subpremas lin, sendefende, rankore, kun hundeca honto, li malespere iras returne direkte al la tereno apud Espeleto (11), kie la naŭa ido jam estas ekstere, kiel kulmino...

"Merdon! mi forlasos ĉion!"... - li ekdiris ĉe la palmoj de la registara palaco, kies peronoj malsekis, ĉar oni ĵus akvopurigis ilin.

Supre, ĉe la galerio, ja devas esti malvarmete. Forĵeti la bananojn, la ŝuojn, ĉiujn siajn ostojn, resti en la ombro kaj dormadi dekkvin tagojn! Sed li eltrovis, ke supre malantaŭ kolono staras iu policisto, kiu kaŝobservas lin.

La doktoro ne ĉeestas; kvazaŭ li neniam ekzistus. Kaj nun tiu policisto rigardegas lin; li englutis salivon kaj emis proponi bananon al li, pro la duboj; sed se li demandus pri la celo de tiom da bananoj, sincere dirite tio ne estus klarigebla. Kaj fine tiu spadiko estas lia sola posedaĵo, lia nura pakaĵo.

Li almenaŭ povos porti ion al Tolentina: "Mi foriris ĝis Formosa, kaj jen mi alportas tiujn ĉi bananojn..."

Li provis klarigon; kvankam la vojaĝo estos longa, kaj ili ĉiuj forputros. Eble ne, Dio volu, ke tio ne okazu, kaj ke estu friduĵo aŭ io ajn por iel konservi ilin, kvankam ili estas tiel multaj, kaj... kie mi metos ilin ĉiujn? Nur ili ja okupas duonon da ŝipo! Malfacile transiri nerimarkite!

Li forte vespiris, dum li iradis ĉiam pli kaj pli premite, kaj li sentiĝis tiel kompatinda, tiel malfeliĉa, tiel humiligita, ke li ekdiris : "Ĉu tio eblas, doktoro ?" - kvazaŭ la paragvajano ĉeestus tie - "neniam mi sukcesas pri io".

La larmoj miksiĝis al la ŝvito, kiu fluis tra la lipharoj; kaj li mallevis la kapon, kiel taŭro, kun la hararo super la okuloj, malalta kaj fortika, kun grandaj brunaj manoj, sed kiel iu taŭro venkita de multaj banderiloj (12).

- Ĉu vi denove tie ĉi ?

La boato treme ŝanceliĝis sur la malpura akvo de la haveno. Diaz malsupreniris unu el la ŝtupoj. Lin rigardis la boatanoj, kiuj "fiŝkaptis" transistorojn, nilonon kaj cigaredojn ĉe la paragvaja bordo.

Dum la semajnoj, kiujn li pasigis en Formosa, antaŭ ol ekkoni la doktoron, malmola pano kaj bananoj estis lia nura manĝaĵo; kaj sur la boato oni donis al li terereon (13), kruĉojn da terereo, kiujn li trinkadis por enpuŝi la bananpecojn, kiuj formis ian bulon malmolan kiel fero, plumbo kaj ŝtono kune.

- "Kien vi iras, kamarado ?"

- "Al Bonaero".

- "Ĉu kun la tuta bananspadiko ?"

Diaz ŝanceliĝis sur la ŝtona ŝtupo. La spadiko nun pezis pli ol morta ĉevalo. Kaj li rektiĝis, ĉar li estis side falonta. Fleksite, li ekrigardis ilin, kun la mentono ĉe la brusto, incitite kaj paceme, sorbante per la dika malsupra lipo la ŝviton, kiu gutadis el la lipharoj.

Nu, ke ili ja provu tuŝi unu bananon ! Ke ili ekkuraĝu!..

- "Nu, ne tiel certe! - diris unu el la boatanoj.

La fiŝkaptistoj jam ne rikanis, kaj rigardis lin ĉe tiu varmega riverhaveno, apud flavaj kaj ruĝaj barkoj, balanciĝantaj meze de oranĝoŝeloj kaj paperoj, kaj la manĝorestaĵoj flosantaj sur la akvo.

Kaj ili vidis lin trapaŝi la dokon en la krepuska venteto, meze de la muŝoj kaj la korboj de la vendistoj ĝenantaj la lastajn pasaĝerojn, kiuj eniras la blankan ŝipon kun iomete rusta poupo, kun radoj ĉeflanke, kun tri maldikaj tuboj vomantaj maldensajn nigrajn nubojn en la senmovan humidan varmegon. Tiu estis la nura vaporsĝipo en la semajno kaj ĝi okupis la tutan havenon.

- Ĉu S-ro TOTO AGUIRRE (:agir-re) ?

Diaz, flanken kurbiĝinte, rigardis la dikulon kun grasbrila, ŝvitmalseka, kalva kapo. Li staris ĉe la ŝtuparo kun disŝiritaj biletoj en la mano.

- Je kies nomo ? - la dikulo fingratis sian kapon kaj el-tiris cigaredpakaĵon el la blanka jaketo. Tiuj manoj lakte-blankaj, diketaj, senharaj, fajrigis ĝin per gasfajrigilo. La dikulo apenaŭ rigardis lin.

Diaz kiel ajn devis supreniri tiun ŝipon. Tio signifis sekure pasigi kelkajn tagojn, ne forkurante el la policanoj, ne pensante kion fari, kion manĝi, kie dormi, ne vagante sencele. Ĝia domo, kiu malsupren flosos sur la rivero.

Nun la dikulo senparole rigardadis lin, paŭzante.

"Pli decus esti surmetinta la ŝuojn..."

- Je la nomo de la doktoro - diris Diaz.

"Kaj se necesus petegi, humiliĝi iomete ?"

"Bonvolu, s-ro TOTO AGUIRRE - li dirus.

Sed estas senutile, li timemas paroli, nenion li povas eligi.

- Ĉu vi estas amiko de la doktoro ? - diris la dikulo.

- NE - li diris.

Kaj necesas diri jes, ĉiam jes.

Sed la dikulo diris : "Supreniru..."

Kaj Diaz jam estis supreniranta, kiam la dikulo, kolere - kaj la motivon Diaz ne konis - ekprenis lin ĉe la brako, skuis lin, puŝis lin eksteren.

- Nu, kion vi faras ?

Diaz konsternite ekrigardis lin.

- Ĉu tiuj fruktoj ? - ekkriis la dikulo.

Kun la kapo mallevita, preta spiti, senparole, kuntiriĝinte, Diaz apogis sin ĉe la balustrado de la ŝtuparo.

- Kiajn fruktojn ? - diris Diaz.

- Kun pakaĵoj, kiom ajn vi volas, sed kun fruktoj, ne !

- Tio estas mia pakaĵo, s-ro TOTO !

La dikulo furioziĝis.

- Krom senpage vojaĝi vi ankaŭ emas superruzi min, ĉu ? -

kaj li patose levis la brakojn, atakeme -, la komunuma dekreto! - li ekkriis, ruĝa pro kolero. - La dekmil kvardeka, streko, kvardektri ! (10040-43) Ĉu vi ne scias, ke ekzistas iu dekreto, nigra kojomulo ! Kun fruktoj, ne !

Sed li ja ne scias.

Kaj tiam la dikulo plenforte, kvazaŭ tio estus la lasta afero, kiun li faros en sia vivo, terure forpuŝis la spadikon kaj ambaŭ baraktis ĝis la bananoj falis en la akvon kaj Diaz torpore sidfalas sur la ŝtupojn.

- Kaj nun ? - li diris.

Tio estas katastrofo. Liaj okuloj estis larmoplenaj.

- Kion mi diros nun al Tolentina ?

- Rap, rap, rap ! Al la tria klaso ! - la dikulo klakigis siajn grasajn fingrojn, urĝante lin; kaj li turnis sian dorson, ĉar estis ĉirkaŭ kvar pasaĝeroj atendantaj, kaj iu senpacience ekkriis ion.

- Nu, ilin donis al mi la doktoro - Diaz tre milde diris tion, dum li malsuprenkuris sur ŝtuparo, ĉar...

"la tria klaso devas esti malsupre..."

- Kial mi devus ludi la ruzulon ? - li diris tion al neniuj, kaj la padeloj de la ŝiporadoj disŝprucigis ŝaŭmon.

"Kiel tiu ideo venas al vi en la kapon, s-ro TOTO AGUIRRE ? - li diris tion al la akvo, kaj neniam li sciis en kiu momento li eltrovis, ke oni navigas.

Li iris al la poŭpo : jen la haveno malproksimiĝas. Batis lia koro : li flosas !

- Domage pro la bananoj - diris la maljuna Floridoro - kaj eble tiuj paroloj kulpis pri ĉio.

Trans la kapoj de la aliaj, Diaz ekvidis la spadikon dronantan meze de la barkoj ĉe la nun malplena doko, kiel flava kaj nigra tigro en la dubelilaka lumo.

- Domage ! - diris la maljunulo, kaj li metis ĉe la ŝelkoj siajn poleksojn similajn al maldikegaj haŭtotegitaj bastonetoj.

- Ĝi estis mia - diris Diaz kun ia melankolia fiero.

- Estis treege multaj - kalkulis Floridoro kaj streĉis la ŝelkojn dum li skuis la magran, kadavrecan kapon, kiu estis sola bruna haŭto kun faltaro.

- En ĉiu haveno ni forlasas ion - diris Diaz -, kiu neniam estis naviginta.

Tiam Floridoro nekonscie eltiris el la malantaŭa poŝo pomon zorge volvititan per malpurega poŝtuko. Per ega razilo li ekkomencis senŝeligi ĝin. Diaz rigardis lin.

- Kaj tio, ĉu ĝi estas frukto ? - li akuzis.

Floridoro flustris en lian orelon :

- Unuope, oni povas transigi ilin. Necesas ja scii kiel.

Jen en la pantalonoj, jen en la poŝoj, aŭ bone kaŝitaj en

la valizoj.

Li tre zorge tranĉis la pomon laŭ kvar pecoj.

Tiam Diaz ekvidis du infanojn grimpe pendantajn ĉe la randa balustrado, sur kiu ili apogis la mentonetojn, en la hela vesperkrepusko. Unu, kun la vizaĝo ĝisekstreme malpura; kaj la alia pli aĝa, ĉirkaŭ kvinjara, kun la nazo abunde floranta je verdaĉa mukaĵo : sendomaj helikoj. Estis kvazaŭ ili neniel rilatas al la maljunulo, sed ili ĉeestas kun li.

- Nu, prenu, baptono (14).

Diaz englutis kun amaro, kun malŝato, kun rankoro.

"Ĉi-vespere la doktoro manĝos intestaĵojn". (15)

Floridoro sidigis po unu infano sur ĉiu genuo, kaj per tiu ĉifita poŝtuko, rozkolora, malpura, kiu : "ne povas esti lia", li dolĉe-mallerte nazpurigis ilin kaj sukcesis, ke la mukaĵo disŝutiĝu tra la tuta vizaĝo.

Dume la ŝipo malsupren navigis tra la Paranao proksime de la praarbaro, kun la tri lumplenaj etaĝoj; kaj Formosa estis miraĝo stompiganta trans la riverturniĝo; kaj la nura vero estis tiu virga, nevenkita furiozo : Paranao, la akvo kiu ĉiuvespere malsupren fluas suden.

Floridoro ekdiris :

- Ĉu al vi plaĉus ?

Li ventumis sin per la bruna ĉapelo kun randoj iomete makulaj, kaj sidante sur sia granda valizo ligita per malnovaj kravatoj, li prigardis ĉiujn mansakojn disĵetitajn ĉirkaŭe : ia reĝo meze de pakaĵoj kaj pakaĵetoj.

- Jes - diris Diaz kaj ekprenis nigran cigaredon el la latuna cigaredujo kun blankaj kaj nigraj strioj, kun riverocanta dancistino, kies kruroj estas deformitaj pro la glukoguloj, videble fuŝtondita el iu gazeto kaj algluaĉita de Floridoro mem.

Virina cigaredujo kiun Floridoro uzadis, kvazaŭ ĝi apartenus al li.

"Kiom da aferoj li havas !" -li pensis, kaj diris :

- Vi ja havas alian frukton ! - li urĝis -, kaj la maljunulo malfermis tiun sakegon el vakstolo, kaj el meze de malpuraj infanaj subĉemizoj kaj kalsonoj li ĉerpis unu mandarinon.

- Ne plensatiĝu per fruktoj. Ni jam estas vespermanĝontaj, diris Floridoro.

Diaz ekrigardis la foran paragvajan bordon, malaltan, kiu aspektis apenaŭ kiel streko ĉe la fono de la rivero. - Ĉi-vespere mi ne iros al la mangoĉambro -, li diris el-suçante la sekciojn de la mandarino, kaj li englutis eĉ ties grajnetojn.

Floridoro diris :

- Tute ne, sinjoro, vi estas mia gasto.

Kaj Diaz malfide rigardis lin. Kiam li vidis lin levi super la randon la infanon, kiu emis pisi, kaj li malbutonumis la pantaloneton kaj tenis lin kvazaŭ montrante lin al ĉiuj fiŝoj de la rivero, tiu mallerto, tiu odoro je malferliĉo ŝvebanta super tiu maljunulo kaj liaj objektoj, kiujn de antaŭlonge ne tuŝis virinaj manoj, ia mikso de hororo kaj malŝato konfuze skuis Diaz.

"ESTAS ULOJ PLI MALBONAJ, OL LI !... Kaj jen tiu arogo inviti lin por vespermanĝi!..."

- Ĉu vi donus al mi alian cigaredon ? - ekkuraĝis Diaz.

Floridoro eltiris la cigaredujon.

- Havu ĝin; finfine mi fumas malmulte.

Kaj antaŭ la malpardona ekmiro de Diaz li sternis sur la granda valizo foruzitan tukon el punto kun ŝiritaj falbaloj.

Kaj Diaz eksentis, ke li volas rulvolvi lin per tiom da vanto, kaj krome videblis, ke tiu tuko kaj tiuj infanoj :

"ne povas esti liaj, kaj li tro maljunas por esti la patro, kaj certe nur la kuratĉoro aŭ la onklo..."

"kaj la edzino, tro juna, forkuris el la hejmo kun nur la portataj vestoj, forlasante lin kun la infanoj..."

Aŭ oni ja ne scias, kia estas la historio de tiu maljunulo ! Sola, apartigita de ĉiuj samlandanoj navigantaj malsupren tra la Paranao kun siaj ŝrankoj kaj matracoj direkte al iu el la ladvilaĝoj ankoraŭ nekonataj, sed kiuj certe atendas ilin. Kaj meze de ĉiuj navigas Floridoro, soleca, kun sia odoro je katastrofo, kiu lin apartigas kvazaŭ skabiulon.

Kun ega mallerto, kiel impotenta koko, li postkuris la infanojn tra la ferdeko.

- Permesu minuton, sinjoro, estas la horo de la kaĉo.

Li malŝtopis termoson (16) kaj ŝutis tiun amasaĉon da malvarma terpoma kaĉo sur malpuran teleron el latuno. Kaj kvazaŭ li ankoraŭ ne sciis kiel trakti ilin, li treege zorge ligis grasmakulajn buŝtukojn ĉe la ĉemizetoj tegitaj

de kaĉrestoj, kaj per la granda kavetita kulero li puŝis manĝaĵon en la buŝojn.

- Venu, Joĉjo Karlo -, sed la knabo, ridegante, kontente kuradis kaj evitadis lin.

- Mi tuj atentos vin -, diris Floridoro, kaj aldonis :
Permesu al mi; sed jam kurante.

"Rigardu, TOLINJO, kion mi alportas al vi, mi diros al ŝi. La maljunulo eble forgesos, kaj la cigaredujo restos por mi. Se ne, mi petos ĝin : "Nu, bonvolu, ĉar kontraŭe mia ino mian vivon finigos..."

Sed eble mi alvenos, kaj ŝi rigardos min per tiuj amaraj okuloj ŝiaj, kaj tiam fermigos mia gorgo kaj tremos miaj kruroj, kaj kiel ĉiam Tolentina : "krie fekigos min" (17); kiel antaŭ naŭ jaroj, kiam pro ŝia kulpo mi foriris el mia hejmo, el la kapridoj, el la sablejo. Kaj pro kio dum la siestotempo tiun tagon ni ŝargis sur la ĉaron la liton, la kokinojn kaj la birdokaĝon, kaj ni foriris al la rikoltoj ? Kial ni ŝtelire fuĝis de panjo ? Ĉi-lastata ĉiam diradis al mi : "Vidu, filĉjo, tiu ino ruinigos vin". Kaj en la sablejo ni estis dek kvin filoj, ĉiuj edziĝintaj, kaj ni malsatsuferis. Unue ni dungigis ĉe rikolto, kaj ĉio sukcesis; poste ĉe alia, sed finfine ni restis en plena mizero kaj nudeco. Kaj ni trairis duonan Respublikon. Tolentina jam gravedis je la tria, kaj tiam ni atingis Espeleton. Kaj mi opiniis, ke fine oni lasos min bredi kokinojn kaj sorbi mateon, ĉar al mi plaĉas la trankvila vivado, la matorbado kaj la gitarludado (kvankam mi havas malakran orelon), kaj la cerbumado, rigardante la preterŝvebantajn nubojn.

Sed en Espeleto la kampuloj ekloĝas kaj ĉiuj poste nervozigas, foriras je la kvara frumatene, fariĝas iuj frenezuloj kiuj piediras ĉirkaŭ du leŭgojn (18), aŭtobuse veturas ĝis la stacio kaj poste, ĉiuj endormiĝantaj, trajne aŭ per alia aŭtobuso, ili alvenas post du horoj ne al Bonaero, kiu situas proksime, sed al la alia rando de la suburboj, al iu fabriko.

Tio ĉio timigas min, kaj nu, kion malbonan mi petis ? Kolorigi la domojn, ripari la tegmentolikaĵojn... Kion fari ?... Tio ja plaĉas al mi. Kaj pro tio mi ĉiam estis tre taŭzita. Tolentina ĉiam krie alparolis min. Sed mi

neniam ordonis al ŝi leviĝi ja la kvara frumatene kiel la ceteraj, kaj vojaĝi per du aŭtobusoj por atingi tiun domon en Floresta Kvartalo, kie certe ŝi nun estas dungita, se oni ne forpelis ŝin post la malfeliĉa okazaĵo. Kaj ĉu ŝi devis fariĝi tia, ĉar mi ne taŭgas, eĉ por viŝi la fekaĵon al la beboj ? Se ŝi ne amas ilin, mi seksumos alimaniere (19), kaj ĉio solvita...

Sed ĉiujare venis nova bebo, kaj ili ploradis, kaj mi matesorbadis. Kion fari, se tia estas mia karaktero ? Mi estas iel timema, sed mi ne drinkas, nek vetludas, nek diboĉas, kaj tion ja neniu rimarkas.

Kaj la pelmelo, kiun ŝi faris per tiu lĵamo, kiu aperis iun sabaton vespere ! Venis granda kamiono, kiu forĵetis amason da fotistoj kun lĵamoj; iuj ciganoj ili devis esti. Kaj iu el ili ekaperis ĉe la pado meze de la trudherboj, inter la brikdomoj, kaj li surŝultre kunportis fotilon el ligno kun stativo.

Kaj mi eltrovis, kie Tolentina gardas la monon. Kaj la cigano havis kombilon kaj ladskatoleton kun akvo, kaj mi kombis la knabetojn. Kaj li metis la kapon sub iun nigran tukon kaj prenis al ni grandan foton, sed malklaran, malmulte videblis. Kaj poste li foriris. Kaj ni vetadis : "kiu malkovras la alian", kaj ni ĉiuj restis kontentaj. Kaj ŝajnas, ke la cigano entuziasmiĝis kaj tiun nokton li ĉeestis la balon en Klubo Indiana, lada staplo, kie eĉ Palito (20) iam venis, kantis ion kaj foriris per aro da aŭtoj. Kaj samkiel ĉiusabate ne mankis la ponardovundo, tiun fojon estis la vico de ĉi tiu cigano, al kiu oni tratranĉis la ventron. Pro kio ? Nu, mi neniam scias kial okazas tiaj aferoj. TIA MI ESTAS...

Se oni estus lasinta min tie, en la granda domo, paŝtante kaprojn, anstataŭ forŝiri min el la sablejo kiel denton, mi ne ruliĝus tien kaj tien kiel bulo.

Kaj frumatene kiam mi eliris por pisi, mi ekvidis la lĵamon, solece paŝtantan sin malantaŭ la barako, kaj tiam mi kaŝis ĝin interne.

Kaj alvenis la kamionuloj sed ne eltrovis ĝin. Kaj mi kun la infanoj multe prizorgis ĝin, ĝis kiam iun tagon ĝi aperis venenita, kaj laŭ mi, tio estis ja kaŭzo de Tolentina. Same, alian fojon, kiam mi emis helpi al ŝi, kaj je monatkomeno ŝi alportis la salajron kaj iris al

la spicejo aĉeti mortadelon (21) ĉar ŝi festenis tiel, mi forŝtelis al ŝi la tutan monon kaj iris ĉe tiu junulo, la brokantisto. Kaj pro tio ke mi freneze avidis havi ĝin, mi aĉetis tiun blankan turnoseĝon, ĉu barbistan ĉu dentistan mi ne scias, kiu turniĝis al ĉiuj flankoj, kaj sur la pordo mi skribigis al mi afiŝeton : "HARTONDISTO"; kaj nu... mi elturniĝis...

Ĝuste en tiuj tagoj aperis mararmea suboficiro Ekflagro, tiel kromnomita ĉar ĉiu konektilo, kiun li riparais, eksplodis. Li diris al Tolentina, ke...

"Mi lasas al vi la domon, sinjorino, por ke vi prizorgu ĝin, ĉar el briko kaj mortero ĝi estas. Mi havas alian; mi volas nur, ke vi tegmentu ĝin, kaj se vi fosos la puton por la klozeto mi dankos vin, kaj se vi faras deponejton ĉe la fundo de la tereno, ja des pli bone..."

Kaj interne de la barako, kun la infanoj mi aŭdis kiel ekstere Tolentina babilas kun li kaj diras : "dankon!"

Kaj : "...almenaŭ kvin jarojn vi loĝos tie..."

Kaj tiun frumatenon ĉirkaŭ la tria aŭ la kvara okazis al mi tiu malfeliĉo...

"Vi ne estas viro, - kriadis Tolentina; kaj mi mallevis la kapon kaj ploris, ĉar ankoraŭ ne estis pasinta unu jaro, kaj mi estis metinta la tegmenton al la domo, kaj krome... Subite ekaperis Ekflagro.

"Kion vi volas de ni, do ?"

"Vi devas foriri, kaj ĝuste nun ! - li diris.

Kaj Tolentina petegis, ke li bonvolu lasi nin dum kelkaj tagoj serĉi alian ejon. Kaj pasis ĉirkaŭ du semajnoj kaj ni trovis nenion, kaj alian frumatenon, ankaŭ ĉirkaŭ la tria, Ekflagro ekaperis seĝ ĉi-foje uniforme kaj akompanate de tri marsoldatoj kun kasko, kaj pere de la bajonetoj ili forpuŝis nin ekster la domon kaj devigis nin forporti ĉion.

Kaj Ekflagro diris :

"...kion fari, sinjorino ? pardonu min..."

Sed dirite, farite. Li tuj igis la soldatojn ŝanĝi la seruron. Estis somera nokto, kaj Tolentina instaliĝis sur la tereno ĝuste fronte al la domo, kun la lito, la spegulo kaj la pelvo. Ŝi jam estis graveda je la naŭa, sed tamen ŝi piedfrapis la soldatojn kiuj forportis la

aĵojn. Ni estis aranĝintaj nin antaŭ malpli ol unu jaro, sed Ekflagro diris ke :

"El la alia domo oni forpelis min, sinjorino..."

Kaj mi kiel kompatinda kojono ja elportis ĉion.

La kamionoj kiuj preterpasis mallongigante la vojon ĉar la koto sekigis, prilumis per la lanternoj mian familion amasiĝantan sur lito. Kaj meze en la tereno iu soldato sidis sur mia barbira turnoŝeĝo kun la fusilo sur la kruroj, sub la lunlumo.

Tio estis la lasta afero, kiun mi vidis pri mia familio, ĉar meze de la pelmelo mi ne eltenis plu kaj forkuris tra la kamparo, batite de tiu malfeliĉo kaj sakrante je mia malkuraĝa karaktero, kaj plorante pro senpoveco. Estis iuspeca vento kiu sencele forportis min al tiu konfuzo, al tiu orfeco, ĝis kiam mi renkontis la doktoron en Formosa.

Kaj se mia familio jam eĉ ne rememoras min, tie kun la radiosendilo mi estis en familia rondo. Kial la doktoro forpelis min ? Se mi ja faris lian vardisdonadon, kaj mi parolis radie kaj mi aŭskultis per la "pudrujoj"(22) tiujn strangajn voĉojn, kaj mi estis en bona situacio... Kaj nun alia vento subite forportas min returne al la tereno, kie certe ankoraŭ estas Tolentina kun la infanoj, kiujn la najbaroj devas varti dum la tago... kaj eĉ kun alia viro dumnokte."

Kaj nun tiu maljunulo invitas min vespermanĝi, kvazaŭ li estus supera al mi, kvazaŭ ankaŭ li kredus kapabli revolveri min.

- Kial vi ne manĝas ? - diris Floridoro.

- Dankon. - diris Diaz malamikece, kvazaŭ timema taŭro.

- Prenu, prenu - kaj li enmanigis al li grandan pecon da frida kokidaĵo, kiun li certe alportis el Asunciono (23) kaj Diaz komence rifuzis, sed fine li forprenis al ĝi la grasmankulan paperon kaj ekmanĝis.

- Ĉu salon ? - diris Floridoro.

- Ne, dankon. "Almozon, ne!" -, li estis dironta. Sed li ekmaĉis.

- Ĉu vi vojaĝas ĝuste al Bonaero ?

- Jes - diris Diaz sen rigardi lin.

- El kiu kvartalo vi estas ?

La knaboj endormiĝis sur la valizoj. Iu maljunulino,

apogite ĉe la grandega poupa direktilo, kapbalancis kun cigaro ĉe la dentoj.

Diaz neniam estis enirinta en la urbon, sed preterpasis ĝin.

- El Ĉakarita (24) - li diris por diri ion, ne sciante kio estas tio.

- "Ŝakarita-ĵunior" (25) - kun troigita bonaera akcento Floridoro moktrenis la vortojn, milde ripetante.

Diaz ekpensis, ke la maljunulo, ekde la bananafero ek-konsciis, ke li povas primoki Diaz...

- Ĉu vi konas "Floren-Delbene" ? (26)

Diaz estis demandonta pri "kiu li estas".

- Kompreneble - li diris singarde. - Najbaro mia.

Kaj tiam Floridoro komencis paroli pri iu Bonaero kun malnovaj kaj ŝiritaj filmoj, viditaj en mallumaj matineoj (27) antaŭ multe da jaroj kaj diris :

- Inojn kaj ĉampanon, kian vivon vi ĝuas ! Kaj Lavaje-ŝtrato !

Aŭ aferoj, kiujn Diaz estis neniam eĉ aŭdinta, en tiu mensa rekonstruo de urbo, kiu eĉ ne ekzistas. Sed li diris :

- Tie oni ja manĝas; ĉu vi scias ?

"Fakte ne kreu tiu ulo, ke ĉiuj estas kiel li..."

Jam estis tre malfrue kaj ili daŭrigis manĝante, ĉar Diaz estis nekontentigeble malsata, kaj Floridoro regalis lin.

- Ĉu mi sukcesos ? - li subite demandis, kaj mallevis la ekstremojn de la ĉemizkolumo, sulketitajn, senbartajn, kiuj denove risorte saltleviĝis.

- Kion vi opinias ? - li diris, kaj li malstrikte ligis la larĝan kaj brilan striitan kravaton.

Sed Diaz apenaŭ balbutis :

- Certe.

Kaj Floridoro eĉ ne aŭdis lin.

Tiam li konfesis al li :

- Ĉar mi jam ne estas junulo, por denove komenci.

Li ja esperis, ke Diaz diros : "kompreneble, ne dubu pri tio", aŭ ion similan, sed Diaz diris nenion.

Serĉante tukon, Floridoro tiam malfermis mansakon; Diaz pretervidis oran ekbrilon, kiu skuis lin, kaj li ne sciis, kio ĝi estas.

Floridoro ekvidis la ŝaktabulon kaj sentis, ke tiu brilo ĉe la okuloj de la alia estas bona.

- Ĉu plaĉas al vi ...? - diris Floridoro eltirante el la sako la tabulon kun flavaj kaj ruĝaj kvadratoj, kaj apenaŭ dum ununura momento Diaz ekvidis tiun ekbrilon; la sako fermiĝis kaj Floridoro miksis ĝin kun la aliaj; Diaz nun ne scias en kiu sako estas tio.

- Ĉu ni ludu? - diris Floridoro.

- Je kio? - diris Diaz.

- Ŝakon -, kaj li lokis la ŝakpecojn, antaŭ la streĉa atendemo de la alia.

Li metis blankajn ĉevalojn kontraŭ nigrajn turojn sub la fortega lunbrilo.

- Ne. Mi ne scias ludi - diris Diaz kaj interne ekkoleris.

"Kion li pretendas nun, ĉu gajni al li per iu ludo, kiun li ne konas"

- Mi instruos al vi - Floridoro ekrigardis lin.

Diaz timeme ekdiris :

- Ne, dankon! - kaj li malproksimiĝis disde la randc. -

Mi iros enspiri aeron - li diris.

Sed la maljunulo petegis :

- Atendu; - kaj serĉante sub iuj malpuraj ĉemizoj, li eltiris pomon.

- Vi ankoraŭ ne manĝis la deserton.

Diaz diris al li :

- Permesu al mi.

Li prenis de li la razilon kaj komencis zorge senŝeligi ĝin.

- Rigardu; - diris Floridoro -, kaj el alia sako li eltiris broĉon el arĝentumita lado. - Mi faras ilin. Mi estas juvelisto; - diris Floridoro -. Ĉu vi opinias, ke tie mi povos vendi ilin?

Diaz al si mem diris, ke ne; ke tio ne estas la ora ekbrilo. Kaj li emis peti al li la donacon de tio, kion li eĉ ne vidis por kunporti ĝin al Tolentina. Sed certe : "li ne donacos ĝin"; kaj krome li ne kuraĝis. Li havis mal-aŭdacan karakteron.

- Kompreneble; - diris Diaz.

Floridoro entuziasme, freneze revante, ŝultrofrapis lin. Kaj li jam imagis sin ĵetita tra senfinaj stratoj kun siaj horloĝoj, siaj juvelaĉoj, siaj infanoj kaj sia mallerto.

- Ĉu mi instruu al vi? - li subite ekkriis.

Kaj tiuj ŝkeletecaj fingroj nun galopas tra la diagonaloj de ruĝaj romboj, jene : "Takata!" "Takata!" (28).

- Oni ŝovas la pecojn tiel ! - kaj Diaz malkovris la mirindon de tiuj blankaj ĉevaloj kun longa koló kaj malfermita buŝo. La kupolo de la reĝino, la krono de la reĝo, la kreneloj de la turoj... nu, tuta armeo por li sola.

- Oni kaptas tiel; - Floridoro kunigis la fingrojn are kaj unu mano saltis super la alian tra la diagonaloj, dum la ŝipo malsupren navigis tiel solece kiel la unua karavelo, kiu supreniris ĝin antaŭ kvarcent jaroj. Dum pluraj horoj oni ne vidos eĉ unu barkon, eĉ unu boaton, eĉ ne unu lumon ĉe la alta Ĉaka (29) bordo.

Nenio en la kosma soleco ŝirita de la ŝiporadoj priatentis tiujn du homojn sidantajn unu kontraŭ la alia ĉe ŝaktabulo sub la fascina lunlumo, sur tiu poŭpo trabalaata de la vento, kiu nun blovis el la alia nevidebla bordo : jam ne Paragvajo, sed Koriento (30).

- Nu, kion mi gajnos ? - diris Diaz, freneza pro tiu ora ekbrilo, kiu estis nek oro nek arĝento, kaj li ne sciis, kio ĝi estas.

- Nenion -, konfuze diris Floridoro.

- Mi do ne ludos; Diaz ekstaris, komencis foriri.

Floridoro ekkaptis lin ĉe la ĉemizo.

- Bonvolu; - li diris, paliĝinte. - Kion mi havas, ĉu ?

Kaj li furioze skuis lin.

- Ĉu la peston mi havas, ĉu ? - kaj liaj okuloj ruĝiĝis -

Kial vi ne ludus kun mi ? - li kriis al Diaz kun amareco.

- Ne krii al mi - diris Diaz, kiu neniam antaŭe kaptis la kolumon al iu.

- Retiru vian manon - diris Floridoro, kaj eksentis ke la alia povas disŝiri lin -, sed li diris : Retiru la manon disde min.

Kaj Diaz rigardis lin, kvazaŭ li estus amaso da fekaĵo, ridetis kaj malprenis lin.

- Atendu - diris Floridoro, kiu ne volis petegi per la voĉo sed teni sin malmola, sovaĝe digna, kaj fine li diris :

- Mi pagas. Se vi gajnos, vi forportos tion, kion vi volas;

- kaj li neprecize montris al siaj pakajoj; - nu tion, kion vi volas...

- Ekmovu - defiis Diaz kaŭre, streĉite.

Li neniam estis batalinta, sed tiun vesperon li ja batalos ĉe la ŝaktabulo kreolan batalon kontraŭ tiu maljunulo kun peonoj kaj ĉevaloj, sur la ferdeko meze de la rivero.

Floridoro dum tempospaco fumadis, ĝis kiam lia furioza spirado kvietiĝis. Li tiam ridetis, frapetante lin ĉe la brako.

- Bone, - li diris -; pardonon, sinjoro. Kaj subite :
- Eĉ vian nomon mi ne scias; kaj etendante sian manon li prezentigis.
- Diaz - diris Diaz sen levi el la tabulo sian kapon.
- Ni estis iomete ekscititaj - diris Floridoro, kaj ridetis al li - sed tio jam pasis.

Kaj li ekmovis.

La maljunulo estis frakasonta lin. Liaj nigraj peonoj mortigocele kuratakis la liajn. Diaz ŝvitis.

- Mi iras vespermanĝi - informis Floridoro. Tiel vi lernos - li diris, kvazaŭ ekskuzante sin, kaj li forprenis liajn du blankajn kurierojn.

Diaz fajfis kiel lokomotivo grimpanta deklivon.

La maljunulo teksis sian ruzan araneaĵon kaj eĉ kompatis lin.

Sed nun Diaz sturmis.

- Mi kaptas ! - li diris kaj li saltis diagonale kien ajn kaj forkaptis tri peonojn, unu kurieron, du ĉevalojn.
- Ne - diris la maljunulo. Tiel oni ne devas ludi; - kaj li relokis la pecojn.

Diaz rigardis lin :

- Ĉu vi primokas min ? - li kriis.

Sed la maljunulo pravis, kaj implikis lin.

Forviŝante la ŝviton, kiu fluis sur la okulojn, Diaz rigardis la tabulon, sed li estis senpova kontraŭ tiuj nigraj ĉevaloj, kiuj kuradis sub la lunlumo sturmante, mordante, fuĝante, dekumante liajn trupojn kaj li : tute senpova.

- Ŝakon ! - diris Floridoro ; kaj Diaz rigardis terurite la grandegan nigran reĝinon, kiu frakasos ĉion ĉe sia paso, kaj tiun mildan mienon de la maljunulo teksanta sian malican saĝon por venki lin, ĉiam kun la pravo ĉe sia flanko, kaj tiam li ekdiris :

- Mi ne plu ludos !

Floridoro, venkate, rigardis lin :

- Nu, se vi ja gajnas al mi !

Diaz neis kun kapo mallevita :

- MI NE PLU LUDOS !

- Nu, amiko - diris Floridoro - permesu al mi.

Kaj li ŝovis unu el la malmultaj blankaj peonoj, kiuj transvivis la katastrofon de Diaz.

- Ĉu vi rimarkas, kiel vi povas kapti tie ?

La maljunulo komencis ludi por ambaŭ.

- Nu, ĉu mi ja gajnu, ĉar vi volas ? - diris Diaz, kaj per la brako li trabalais la tabulon.

- Nu, ne... diris Floridoro, timigite. Atendu, sinjoro - kaj li ekzakte refaris la tabulpoziciojn, aldonante kelkajn blankajn pecojn.

- Vidu, sinjoro, ŝovu tie; - kaj Diaz pensadis kaj fajfadis.

Li kaptis unu, du, tri pecojn, kaj la maljunulo :

- Nu, ŝovu tie ! Kaj tie !

- Ŝakon ! - spiregante ekkriis Diaz.

La magregaj longaj fingroj de la maljunulo metis la blankan reĝon, kaj Diaz kolere ekkriis :

- Mi kaptas !

Li dezertigis la tabulon, kaj lia kapo estis krevonta.

La tabulo subite kreskegis kaj fariĝis pli granda ol la ŝipo, kaj la ĉevaloj kuradis tra la kvadratitaj altanoj(31) ruĝaj kaj flavaj de la nokto sub la furioza lunlumo.

Kaj li daŭrigis atakante, dum li revis pri la ora ekbri-
lo, sed tio estis kvazaŭ batali kontraŭ ombrojn, ĉar la maljunulo lasis sin venki. Sed poste estus alia partio kaj alia pli, kaj tiu aĉa maljunulo ĉiam gajnus : "ĉar ĉiam la aferoj estis tiaj por Diaz".

- Ĉu vi forgesas tiun ĉi ? - diris Floridoro.

Sed Diaz kaptis kaj poste nekontentigeble rigardis la tabulon malplenan je malamikaj trupoj : nur lia reĝo kaj du peonoj estis transvivintaj la buĉadon, sed li avidis pli, multe pli...

Ekbrilis la razilo kaj Diaz profundigis ĝin en la ventron de la maljunulo unu-, du-, trifoje, kaj Floridoro falis, kaj estis nur singulto kaj nenio pli...

Denove la frumatena silento kaj meze la ronkado de la infanoj kaj de ĉiuj ceteraj homoj kuntiriĝantaj sur siaj valizoj.

Tiam Diaz ĵetiĝis sur la mansakojn kaj malfermis unu, kaj tie ĝi ne estis, kaj malfermis alian, kaj jen ankaŭ ne. Kaj la ferdeko komencis surkovriĝi de malpura tolaĵo...kaj nek horloĝoj, nek broĉoj, nek kuleroj, ja nenio aperis, dum li daŭrigis malfermante tiun labirinton de mansakoj, kaŭr-

ante, kvazaŭ freneze, serĉante tiun oran nekapteblan ekbrilon...

Tiam Diaz ekstaris sub la eterna indiferento de la steloj, sur tiu radoŝipo flosanta suden, meze de la nebulo ŝvebanta super la akvo... Li emis ululi, sed sufokiĝis, kaj nur ekkriis : - MIA DIO !

- (1) Formosa. Loĝloko, ĉefurbo de samnoma argentina provinco, haveno ĉe Paragvajo-Rivero. Loĝantoj : 40.000. Norde, pere de Rivero Pilkomajo, la provinco limas Paragvajan Respublikon. Kotonoj, ligno, bananoj.
- (2) kaj. Konjunkcio senĉese ripetita pro stilefekte : insisto, intenseco.
- (3) Doktoro. Argentinaĵo, alparolo al ĉiu pli klera persono.
- (4) Ladetoj. Argentinaĵo : kapaŭdiloj.
- (5) Kuzko. Urbo en Perua Respubliko.
- (6) Mindanao. Urbo en Filipinoj.
- (7) Akapulko. Havenurbo kaj turisma loko en Meksikio.
- (8) Strosner. Prezidento de Paragvaja Respubliko, senĉese ekde 1954a.
- (9) Ariko. Havenurbo en Ĉila Respubliko.
- (10) Santafeo. Grava havenurbo ĉe Rivero Paranao, kaj ĉefurbo de samnoma argentina provinco.
- (11) Espeleto. Urbeto en Bonaerio, sude de la metropolo Bonaero.
- (12) banderiloj. Pikiloj kun rubandoj, kiujn la banderilistoj aŭ toreadorhelpantoj enpikas en la dorson de la taŭro.
- (13) terereo. El la gvarania : maniero prepari la mateon per malvarma akvo, kaj nomo de la infuzaĵo mem.
- (14) baptano. PIV : Baptopatro. Fig : argentinaĵo : alnomo de amikeco.
- (15) intestaĵoj. La intestaĵoj de brutoj, precipe el la bova specio, estas ŝatata plado en pluraj sudamerikaj landoj.
- (16) termoso. varmizola botelo; termobotelo.
- (17) "...min..". Argentinaĵo : pro la nervozeco okazigita de la timo, oni surfegas sian kalsonon.
- (18) leŭgoj. Argentina mezuro de distanco, proks. 5 km.
A : "league".
- (19) "...alimaniere". Eufemismo por : "interrompita koito".
En la originalo : krudvorto.

- (20) Palito. Nuntempa famkonata argentina kanzonisto.
- (21) mortadelo. PIV : speco de tre dika salamo.
- (22) rudrujoj. Argentinaĵo : kapaudiloj.
- (23) Asunsiono. Ĉefurbo de Paragvaja Respubliko.
- (24) Ĉakarita. Grava kvartalo de Urbo Bonaero.
- (25) Fonetika transskribo de la mokimito pri nomo de klubo kaj futbalteamo en kvartalo menciita en glosa 24.
- (26) Floren Delbene. Kinartisto argentina, fama en la '40-aj jaroj.
- (27) matineo. Prezento de teatraĵo, filmo, ks. antaŭ la nokto, precipe en la posttagmezo.
- (28) takata!! Onomatopeo de la ĉevalhufoj.
- (29) Ĉako. Argentina provinco limanta al Formoso kaj Santafeo. Kotono, grenoj, kebraĉo.
- (30) Koriento. Argentina provinco, fronte al Ĉako. Rizo, kotono, brutaro.
- (31) altano. PIV: rigardejo, teraso.

* *

ARGENTINA NOVELARO

(TRIA SERIO)

Kompilis kaj tradukis : ENIO HUGO GARROTE
Kordobo (Arg. Respubliko)

Reviziis kaj korektis : RAFAEL DIAZ MORILLA
Bonaero (Arg. Respubliko)

- * G. Estrella : Forkuris la rato ... 3
- * G. Calvetti : La senmorta timo ... 9
- * O. Villordo : La insulo ...18
- * G.L. Borges : La sudo ...23
- * I. Codina : La nigra kruco ...30
- * G.L. Borges : La mortinto ...42

Broŝurservo de S.A.T.

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laûte!" * F 47340 Laroque Timbaut

1982 * 5 FF

" FORKURIS LA RATO "

De : ESTRELLA (:estreĵa), Georgo
 Tukumano, 1939-
 Novelisto.

.....

La rato fulmrapide forkuris meze de la kriado kaj la naŭzo de la du mekanikistoj kaj la tri helpantoj de la garaĝo. Ĝi trakuris la ĉeftrabon de la duklina tegmento kaj ĝi, kvazaŭ grimpe, vertikale malsupreniris la kolonon, kiu enteriĝis en la centro de la betonumita planko. Kiam ĝi atingis la ebenon, ĝia irmaniero rapidtakta kiel sesdek-kvaronoto kondukis ĝin rekte al la enirpordo, sed tie oni baris ĝin, kaj ĝi devoĵiĝis.

Ĝi pafiĝis en direkto al la fenestro kaj atingis ĝin antaŭ ol ili, ĉar ĝia kurado estis ne nur rapida sed nemodifebla, kvazaŭ kuraĝigita de la serena konvinko, ke ne povus savi ĝin la hasto nek la halto por cerbumi. Ĝi grimpis ĝis la fenestro samkiel ĝi estis malsuprenirinta tra la kolono, ĝi saltis en la straton - sed la salto ankaŭ ne estis pli rapida - kaj ĝi perdiĝis sub la etan kamionon, senmove kuŝantan, sen la rado, kiun oni estis riparanta, kaj kiu aspektis kiel hundo levanta sian kruron por trankvile urini, dum forkuras timigite la insektetoj cirkulantaj sur la arbo aŭ la muro.

La kriado kaj la naŭzo ekhaltis, laŭtvoĉe parolante antaŭ la kamioneto kun aspekto de urinanta hundo. Ili kliniĝis super dek genuoj, palpis ĝian ventron kaj esploris ĝian korpoflankon. Sed pri la rato, nenio nova. La kriado kaj la naŭzo iomete trankviliĝis kaj demandis al si, ĉu la rato, kaŝita de la kamiono, eble transiris al la kontraŭa trotuaro.

- Ne ; ĝi ne havis tempon.
- Ĝi surgrimpis la kardanon kaj instaliĝis en la motoro, tute certe.

- Alportu stangon. Levu la kapoton.

Ili levis la kapoton, alportis iun stangon kaj komencis frapi la kamioneton.

- Ne tiel. Necesas piki per la pinto de la stango.

Ili enigis la stangon pikbatante sence la raton, kiu ie devis sidi senmove. Post la pikadoj venis la levilmanieraj baraktadoj, la skuoj, la grimpoj sur la bufron, ĝis kiam ekdiris iu :

- Zorgu, ke ĝi falos !

La kriko estis cedinta kaj la esplorita subparto kuŝis nun sur la planko.

- Tiel, malpli bone ni povos vidi ĝin.

Iu knabo manĝanta bananon ekhaltis por rigardi. Li manĝis kaj rigardis. Apud la knabo ekstaris poste iu sinjoro, kiu demandis al li :

- Kion ili serĉas ?

- Raton - respondis la knabo, nun kaŭranta.

La sinjoro komentis al du sinjorinoj, kiuj ankaŭ rigardis :

- Ili serĉas raton.

- Kaj nu, kiu renversis la kamionon ? - demandis unu el la du sinjorinoj.

- Eble tion faris la rato - respondis la alia sinjorino.

- Eble - diris la sinjoro, ne kuraĝante kontraŭdiri, ĉar ankaŭ li ne estis tre certa, ke la rato ne estis renversinta la kamionon.

La tri helpantoj eĉ per sia vizaĝo faris fortostreĉojn por levi la kamioneton, dum la du mekanikistoj diris :

- Ankoraŭ ne, daŭrigu - dum ili klopodis loki iujn kojnojn en la heziteman kaj avaran truon. (1)

- Ni ne eltenas plu - diris la baraktantoj.

Unu el la mekanikistoj forlasis sian kojnon kaj aliris helpi al tiuj kun la vizaĝo ruĝa kaj kiel kuspita ĉe la buŝo.

- Pli, pli, pli ! - ekkriis tiu, sola ĉe la kojno.

- Uf, ĝis kiam !

- Pli, pli, mankas malmulte, kaj ne parolu, ĉar tiel vi perdas la spiron kaj la forton.

- Ni helpu - diris iu el la rigardanta grupo.

Tuj la kamiono pendis preskaŭ tute en la aero.

- Mi ekvidis ĝian voston ! - kriaĉis la banano-knabo.

Kiu metis la kojnon, ankaŭ tiu ekvidis ĝin.

- Ĝi sidas en la motoro, malsupre, proksime de la krankskatolo (2).

Dudek okuloj kaj dek postaĵoj ŝanĝis situon, alcelante la krankoskatolon kaj la ĉielon.

- Nenio videblas.

- Nu, kaj se ĝi estus en la kajuto, ĉu ? Ĝi povis enŝoviĝi tien.

- Kompreneble. Por serĉi necesas forpreni la sidlokojn.

La pordoj malfermiĝis kvazaŭ oscede, kaj tra ili elŝutiĝis ĉiuj remburajoj de la kamioneto, kiuj ne estis multaj.

Oni serĉis ĝin ĉe la planko, ĉe la tegmento, ĉe ĉiu kaŝangulo de la lado, sed la rato plu estis nur atendado streĉa, kaj la kamioneto nur iu skeleto sub la suno, resignaciante al tio, ke ĝiaj partoj dissemitaj estu ĉiam malpli kaj malpli de ĝi, kaj ĉiam pli kaj pli de la strato polva, suna, nenies.

- Kial vi ne startigas la motoron ? Eble ĝi ektimos kaj eliros - proponis iu timeme.

- Certe ! - asertis unu el la mekanikistoj.

Kaj ĉar ne estis sidloko, li sidiĝis sur la plankolado. El ekstere, li preskaŭ ne estis videbla. Oni nur sciis, ke li estas faranta ion, kiam oni ekaŭdis la startigilon furioze funkcii.

La gapantoj apartiĝis formante rondon ĉirkaŭ la kamiono kun nevidebla ŝoforo : veturilo kaj stiristo, kiuj ne intencis ekveturi kaj stiri sed simple produkti bruon kiu falu kiel infero en la orelojn kaj la animon de la rato, kiu ludis kaŝludon kaj ankaŭ savi sian vivon.

La motoro fine startis, kaj la akcelado timigis kelkajn gapantojn, kiuj konfuze disiĝis, sed ne la raton. La forto-streĉo de la motoro ŝajnis karikaturo pro la veturilo tiel kvieta : tioma bruo por tia senmoveco de la kamiono kaj de la rato, kiu devas ie sidi aŭskultante tiun kvarcilindran koncerton dediĉitan al ĝi.

La nevidebla ŝoforo de la senmova kamiono daŭrigis akceladi, akceladi, akceladi.

Li esperis, ke iu indikos al li ĉesigi tiun muĝadon de la motoro, ĉar la rato jam eliris. Sed li rimarkis, ke la bruo de la motoro subite estis pli bone aŭdebla, ke abrupte

silento lasis la bruon kaj lin solaj, aŭskultante sen vidi.

Kiam li ĵus komencis ion konjekti, tiam subite malfermiĝis la pordo liaflanke kaj li ekvidis la rondon de gapantoj silentaj, kaj en la mezo, sed multe pli proksime, apud la pordo, super sia vizaĝo, la laŭtkria mienon de la kamionmastro.

- Kion vi faras tie, besto?! Mi lasis al vi la kamionon, por ke vi rekaŭĉuku al ĝi bendon, ne por ke vi disŝiru ĝin tiunmaniere, kaj krome ludu per la motoro kiel idioto.
- Nu, temas pri... la rato - sed li preferis ne daŭrigi.
- Ĉu rato? - demandis la alia senkomprene, sed sen ia intenco ion kompreni. Malsupreniru kaj rebonigu la kaĉon, kiun vi faris.

Neniu intencis menciigi denove tion de la rato. La knabo kun la banano daŭrigis kaŭri kaj kredis vidi denove la voston, sed li ne kuraĝis komuniki la novaĵon kiu antaŭ malmultaj minutoj estus saltiginta la rondon de gapantoj pro naŭzo kaj feliĉo.

La ŝoforo malfunkciigis la motoron - nur tiom longe li stiris - kaj malsupreniris.

Nun preskaŭ ĉiuj alcelis la atendon al la malsupra kamionparto, kiu en kiu ajn momento povus ricevi la elektrosimilan kuradon de la rato. Kaj kiam la mastro turniĝis al la rondo de gapantoj, ĉi-lastaj aŭtomate ekrigardis la ĉielon, la polvan straton, kvazaŭ serĉante perditan moneron aŭ la apudstaranton por ekbabili pri tio ajn.

La mastro sentis sin kiel tiuj ŝakpecoj jam forluditaj, kiuj rigardas kaj ne povas eĉ konsili kion oni devas fari, sed la afero estis, ke li ne plu memoris kiam li estis forigita el la ŝaktabulo.

La rondo de gapantoj jam ne plu estis rondo, kiam ĝi malproksimiĝis por atendi kaŝe la aperon de la rato. Ili malproksimiĝis, sed revenis la paŝoj aŭ la okuloj. La mastro, kvankam suspektante ke okazas io, okulsekvis man-en-kokse la movojn de la mekanikisto remuntanta la pneŭon.

La ceteraj dungitoj de la garaĝo decidis ne alproksimiĝi al lia helpo, ĉar al ili kostis trarompi tiun ringon

de indigno, per kiu ĉirkaŭis lin la rigardo de la mastro. Ili preferis agi samkiel la gapantoj : okupiĝi ŝajne pri io malsama, sed kun la aŭdorgano kaj la oblikva rigardo fiksitaj sur la laborkamarado remuntanta la pneŭon, kaj ankaŭ sur la malsupra parto de la kamiono.

Nur kiam la pneŭo estis fine lokita, unu el ili alproksimiĝis al la kamiono, deprenis la ŝraŭbingojn de la nabo, prave rigardis la krankoskatolon : neniu signo pri rato ! kaj helpis al sia kamarado reloki la radon. Ili streĉis la ŝraŭbingojn, mallevis la krikon, skuis per la manoj la kombineojn sen kuraĝi ankoraŭ rigardi la mastron. Krie ĉi-lastata ordonis al ili reloki la sidlokojn kaj apogilon.

Multaj rapidis helpi. La servopretuloj tiumomente tuŝetis la mastron, kiu jam ne povis konservi la brakojn ĉe-la-koksoj, kaj tial li ekrimarkis ke lia kolero estas mislokita, senigita de propra spaco, nereakirebla, jam post la movo de pecoj sur la ŝaktabulo. Finiĝis la silento kaj revenis la babilado, sed neniu menciis la raton, kvankam oni ne pensis pri alia afero.

Ili skuis la veturilon kiom eble ili povis, klinis sin por okulesplori pro kiu ajn motivo, ĉiam remetante la partojn de la kamiono en ĝia interno.

Kiam ili fermis la pordojn, indikante la finon de la riparo, denove elstaris la mastro, ne antaŭ la okuloj de ĉiuj, ĉar neniu lin rigardis, sed pro tio, kion li faros, afero ankaŭ neantaŭvidebla, ĉar ili sciis, ke li suriros la kamionon, startigos la motoron kaj forveturos.

Sed precize tio, tiel antaŭvidebla, ŝajnis neebla, ne povis finiĝi tiel, sen tio ke la rato aperu aŭ aperu aliloke trankvile portata, kondukata kun atendemo kaj ĉio cetera oni ne scias kien.

Kaj tio ja okazis. La viro sidiĝis, funkciigis la startigilon, kaj nun li sentis la rigardojn, kiuj ŝajnis alnajli lin ĉe la sama loko.

Tamen, kiam li turniĝis, neniu rigardis lin, kiel ĉiuj faris tion unu sekundon antaŭ ol li komencis turni la kapon.

Li denove manipulis la startigilon kaj tiam ja aŭdiĝis la muĝado de la motoro. Kiam ĝi ekveturis, la knabo kun la banano komencis postsekvi ĝin, aliaj flankeniris.

Neniu retiris la okulojn nek la esperon disde la malsupra

parto, nun moviĝanta, de la kamiono, ĝis kiam oni perdis vidon de ĝi du angulojn for, kie ĝi turniĝis maldekstren, en direkto al la placo de la vilaĝo.

- (1) Heziteman kaj avaran truon (parolturno) : = "ĉar ĝi ne allasis la raton".
- (2) Krankoskatolo : (tek.) angle : "crankcase".

* * *

" L A S E N M O R T A T I M O "

De : CALVETTI (kalveti), George

Ĥuĥujano, 1916-

Poeto kaj novelisto. Premiito de Tutnacia
Kulturkomisiono.

.....

Malmultajn tagojn post mia alveno, Paŭlo venis viziti min, kaj post mallonga tempospaco de hezitoj, de konvenciaj demandoj kaj respondoj, li familiariĝis, kaj ni longe konversadis.

Paŭlo estas bona junulo kaj mi vere ĝojas, konstatante ke la estimo, kiun li sentas je mi, ne malkreskis pro la distanco kaj la foresto.

Mi konvinkiĝis pri tio kiam, jam je la adiaŭo, kaj kun rideto en kiu mi kredis eltrovi ian gajan vantecon, li diris al mi :

- Se vi volas rajdi, kiun ajn tagon vi povas preni iun bistrulon blankmakulan, kiun mi alportis el la valo. Ĝi estas ankoraŭ ne tute malsovaĝigita, kaj nur mi selas ĝin ; sed mi pruntas ĝin al vi ĉar vi ja ne estas viro ema malbontrakti brutojn. Kiam vi iros, se mi ne ĉeestas, petu ĝin al Sinjorin' Avelina (tiumaniere, respektplene, li kutimis nomi sian patrinon).

Mi multe dankis lian komplezon, ĉar mi scias kion ĝi signifas por homo el MAJMARAO (1), kiu devas defendi siajn ĉevalojn kontraŭ turistoj kaj fremduloj.

Ne malfrue poste venis la oportuneco : Felisa iris viziti fratinon sian loĝantan en TILKARO (2), kaj mi ne povis, eĉ mi ne estus povinta, preterlasi la okazon iri vidi ŝin. Mi do ekiris en direkto al la domo de Paŭlo por preni la bistrulon.

Ĝuste kiel li antaŭvidis tion, atendis min Sinjorin' Avelina. Renkonti la aĝulineton plaĉis al mi, kaj mi sentis min kortuŝita, kiam ŝi nomis min laŭ mia kromnomo de la infanaĝo. Ni tuj ekparolis pri la ĉevalo, kiun ŝi kondukis

post nelonge.

- Vi devas zorgi - ŝi diris - , ĉar ĝi estas suspektema.

Per tio ŝi volis diri, ke ĝi malkonfidas kaj timigite ekbaŭmas, se tiu ne estas Paŭlo, kiu surrajdas ĝin.

- Tiu ĉevalo de mia filo tute ne plaĉas al mi ; pro kiu ajn motivo ĝi spiregas.

Mi ridetis pro ŝiaj esprimoj kaj mi respondis, ke tio ne devas esti tiel grava ; poste mi aldonis komplimente ke la besto aspektas bela kaj bone zorgita.

- Oni ĉi tie kromnomas ĝin "Guanako" - daŭrigis la maljunulino, kiu ŝajne volis disvolvi la temon - kaj ĝi certe aspektas tia. Rigardu al ĝi... oni povus diri, ke ĝi jam estas kraĉonta...

La nomo estis trafe donita. La ĉevalo, kun mallonga kapo, dika kolo tre fleksita malantaŭen kaj kun la muzelo rigida, ŝajnis preta ekhenni ; en ĝi estis io diferenca, io stranga, kiun mi ne povus difini ne uzante la vorton "statueca".

Ĝi estis malhele bistra, kun tri kruroj blankaj, unu ĉe la maldekstra kaj du ĉe la dekstra flanko. Mi atente rimarkis la detalon, ĉar estas tre konate, ke ĉevalo kun makuloj ĉe la du maldekstraj kruroj estas malfortika.

Kiam mi alproksimiĝis, la bruto - kvazaŭ por pravigi Sinjorinon Avelina - laŭte spiregis kaj emis timigite forkuri. Mi ne priatentis tion, kaj tiris ĝin tra irante la stoplejon survoje al la strando. Mi ne avertis ke la ledaĵo uzata kiel kaprimeno havis nodon, kiu malhelpis ĝin alĝustigi al la kolo. Tio sekvigis, ke post nur malmultaj metroj mi devis hardi miajn nervojn, rigardante la ĉevalidon petolantan en la hordea kampeto. Je la distanco, mi vidis ĝin majesta. Bistra, kun kruroj blankaj, flirtantaj kolharoj, ŝtarante kun kapo levita, kun tia trotmaniero alta kaj vasta de la liberaj ĉevaloj, ĝi ŝajnis al mi harmonia kaj pura forto de la Kreitaro.

Tian ĉevalon priskribis hispana poeto :

"Okulo vigla, alte stara kapo,
piedo kun kuraĝa, tondra frapo".

Sed mi devis foririgi ĝin el la hordea kampeto.

Estus nepardoninde, ke mia neglektemo okazigu la malaperon de la plej bonaj ŝosoj de la plantejo. "Guanako"

estis haltinta kaj rigardis al mi.

Mi alproksimiĝis sufiĉe al ĝi, kaj mi ne scias ĉu pro kutimo de soleca homo aŭ ĉar mi pensis laŭte, mi ekparolis al ĝi :

- Nu, kara bistrulo - mi diris al ĝi - vi devigos min uzi la lazon. Jam ekde preskaŭ kvar jaroj mi ne piedlazaras. Ni vidu, ĉu mi sukcesas...

Mi volis uzi la ledrimenon, sed ĝi denove forkuris kun sia vigla kaj trema trotado. Mi tiam iris al la domo por ekpreni kaptoŝnuron. Revene, Sinjorin' Avelina akompanis min.

Mi klopodis anticipi senkulpigojn pro mia antaŭvidebla malsukceso kiel lazisto :

- Mi ne scias, ĉu mi povos - mi diris al ŝi. Ĉi lazo de Paŭlo estas tre malpeza. Mi estas al kutimiĝinta al la mia, ĉakdevena (4) kaj sesŝnura.

Kiam mi atingis la hordean kampeton, la bistrulo ne estis tie. La maljunulino ekvidis ĝin en la korto. Kun sufiĉe da kolero kiom eble plej bone mi ŝajnis kaŝeman mienon pro la duonekskuzoj, kiujn mi donis, kaj kiu taŭgos por ke oni ruze komentu - al mi ŝajnis aŭdi ilin - "ke mi fariĝis ursa dando" ; "ke al mi mankas nur uzi gamaŝojn kaj anglastilan selon" ; "ke se mi forgesis fari firman nodon, kion diri pri la kaptado"...

Nu, ni iris preni "Guenakon".

La bistrulo lasis sin ligi, kvankam spiregante, kaj mi profitis la okazon por haste foriri al la domo.

Kiam mi volis seli ĝin, ĝi denove henegis kaj terurigis. Mi decidis kovri ĝian kapon per la poŝo ; tuj kiam mi montris la intencon, ĝi jam trankviliĝis, eltenis felojn, ĉabrakojn kaj selaĵojn. Dum mi streĉis ĝian ventrozonojn, ĝi ekbaŭmis.

Mi estis kolereta. Felisa estis atendanta min, kaj pro la ĉevalo mi alvenus malfrue.

Tamen mi ja rimarkis la reagmanieron de "Guanako". Estas malfacile, ke iu ĉevalo ekbaŭmas, ĉar oni streĉas ĝian ventrozonojn. Ĝi jen piedfrapas, jen mordas kaj de tiuj du ebloj oni devas gardi sin. Sed tiu neatendita ekbaŭmo liberiganta ĝin, ŝajnis al mi stranga.

Fakte ĝia ruzeco devigis min lasi la ventrozonojn nestreĉita, kaj mi devis ekrajdi sen la piedingoj. Mi kondukis ĝin rigore kaj streĉe, ĉar ĝi snufegis kaj timigite galopegis,

ĝis kiam komencis ĝeni ĝin la manko de hufumoj.

Mi bedaŭris la neglektemon de Paulo. En la Nordo, precize en la Nordokcidento, surrajdi nehufumitan ĉevalon estas ja fifaro. La sekaj kaj gruzoplenaj vojoj treege eluzas la hufojn kaj eĉ povas invalidigi bruton.

Kiam mi atingis TILKARON, mi memoris nek hufumojn nek ion ajn. Tie staris Felisa ; belega, belega, haŭto pomkolora, gracia kiel neniu. Pli mallonge dirite, ŝi plaĉis al mi, plaĉas al mi. Kaj kiel !... Kaj kiom !... Tiun vesperon mi donis min al ŝia amo senpripense, konfuzite. Mi amis ŝin ekde tre juna aĝo, vere ; sed post tiel longa tempo, ĉio estis intensa, emocia.

Je la vesperkrepusko, mi ekiris por viziti la forĝiston. Mi volis reveni rapide, kaj ne hufumi la ĉevalon signifus malrapidegan iradon.

La domo de Doroteo la forĝisto situas fronte al la "Nova Bazar" ; tiel kun enviinda esperkapablo oni nomas liberan terenon, kie oni promesis konstrui tiun Bazaron, "baldaŭ". Nuntempe en tiu tereno estas nur futballudejo.

Mi direktiĝis al la pordego de la forĝejo. Antaŭ ol atingi ĝin, la bistrulo denove snufegis, dum ĝi arkigis la dorson kaj vikle moviĝis. Mi emis trankviligi ĝin, milde manfrapetis ĝin kaj kun naiveco (aŭ saĝeco) de rajdanto mi komencis alparoli ĝin :

- Pŝŝt... Trankviliĝu...

Nenio rezultis al mi el tiu aĝo. La ĉevalido ekbaŭmis anhelante. Mi timis, ke ĝi dorsen falos, ĉar ĝi tro alte ekbaŭmis, kaj mi devis terensalti kun la kondukiloj en la mano.

Mi ekkonsciis, ke en la futballudejo ĉiuj ĉesis ludi kaj atentegas mian konflikton kun la ĉevalo. Mi ekpensis : "Mi ne povas daŭrigi stare. Oni diros, ke ĝi faligis min". Mi klopodis ordigi miajn pensojn kaj kalkuli la eblojn.

Se mi firme alkroĉiĝus al "Guanako" kaj donus al ĝi du frapojn per la rajdovipo, eble per saltego mi atingus la forĝejon. Ne malbona ideo, sed... se ĝi denove ekbaŭmus ? : denove teren ! Ĉar la lasta eblo estis la plej probabla, mi decidis ekrajdi kaj pluiiri.

La bistrulo preterpasis arkigante la dorson timigite. Mi aŭskultis murmuron tra la dentoj kaj iuspecan grumblon:

mi supozis, ke oni komentas mian situacion. Tio kolerigis min, sed mi ne volis turniĝi.

"Ja tiuj nuntempaj junuloj eĉ neniu respektas" - mi pensis.

Mi direktiĝis al la trinkejo apuda al la stacidomo. Tie devis preterpasi Felisa je la horo de la trajn-alveno. Mi emis vidi ŝin denove kaj mi restadis atendante ŝin kaj trinkante ĝinon.

En ĉi tiuj lokoj ankaŭ la trajno estas tradiciama : por agi laŭ sia kutimo ĝi alvenis malfrue. Pro tio, kiam mi ekvidis Felisan, mi jam ne statis kiel por konversadi. Mi decidis foriri antaŭ ol ŝi alvenos. La bistrulo ĉi-foje ne rezistis. Mi normale metis la piedon en la piedingon kaj ekrajdis viglapaŝe.

Kiam oni havas interne bonan kvanton da glasoj, oni sentas sin pli proksima, pli ligita al la ĉevalo. Mi ne povas klarigi pro kiaj kialoj, kaj mi turnas min al via sperto, por ke vi klopodu memori kaj kompreni min. Jam survoje, paŝon post paŝo, mi rigardadis la "tagiĝon de la nokto". La luno ekaperis oriente kaj en la montoj okcidentaj milda tago komencis eklumi.

Estas kortuŝe rigardi tiun pejzaĝon duecan kaj tremantan. Tagas en la altecoj heligitaj de la luno, dum en la valo la nokto defendas sin kaj kvietigas sian nudan ombron ; la montoj forviŝas siajn kolorojn kaj ĉio estas hela sed malforĉa, preskaŭ lazura.

Ha, provincaj noktoj, lazuraj noktoj, kun tero kvazaŭ malfortigita de la luno, kun ventoj proksimaj al la ĉielo, kaj la fantomeca ombro de la montoj !

"Mi restos ĉi tie - pensis mi - mi volas rigardi bone ĉi kamparon, ĉi malhelecon de la vivo ĉe la rando de la lumo".

Mi sentis min kvazaŭ lancopikita de la tempo kaj la spaco. Mi decidis deĉevaliĝi : mi serĉis platan ŝtonon kaj mi sidiĝis ; la bistrulo staris apud mi ; al ĝi la mordaĵon mi forprenis, kaj laŭ mia kutimo mi komencis konversadi al ĝi :

- Kia nokto ; rigardu, bistruleto, rigardu !...

Mi diras al vi sincere, mi multe ŝatas la ĉevalojn ; mi konsideras ilin vera lukso de la vivo. En ili ĉio plaĉas al mi : iliaj okuloj tekoloraj, tiu varmkoreco preskaŭ homa

per kiu ili dankas la manfrapetojn, la aspekto de potenco, de neestingebla forto de iliaj elstaraj vejnoj kvazaŭ skulptitaj ĉe la brila brusto. Krome, ĉu la henado ne estas unu el la plej esprimplenaj voĉoj de la naturo ? Ĉu pro ĝojo, ĉu pro seksa furiozo, ĉu ĝi ne ŝajnas al vi voĉo viva, klarega, elokventa ?

"Guanako" estis mallevinta sian kapon, kaj ĝi rigardis al mi. Li estis maltrankviligita, ŝajnis preta forkuri. Ĝi movis la lipegojn, kvazaŭ por heni. Tiam ĝi kun fortostreĉo gorgis voĉis : "ni iru... laca...mi 'as laca...". Unue estis la surprizo, kaj poste la teruro. Mi rigardis ĉirkaŭe, ne serĉante homon (mi estis certa pri mia soleco) sed serĉante reaperanton, turmentatan animon ; ĉio eblas, sed tio ke ĉevalo...

Konfuzita, stultigita, mi respondis : "kial ni rapidu, nenio urĝas nin". Mi ne scias, kio pelis min kontraŭdiri. Eble la timo, la mallerteco, la ĝino... Eble mi faris tion por aŭdi nenion pli kaj kredi ke ĉio estas alkohola halucino, kaj forgesi. Sed la bistrulo daŭrigis.

Ĝi elparolis per voĉo malklara, malrapida, en kiu subite iu vorto finiĝis per brutala ronkego.

Iomete revigliĝinta, mi denove sentis min eta ; mi emis forkuri, sed mi ne havis forton por tio. Mia kuraĝo estis tiel artefarita kaj malforta, ke ĝi alvenadis laŭ ondoj preskaŭ nepercepteblaj.

Denove ĝi elparolis, kvazaŭ sufokiĝanta ; ĝi movadis la kapon, arkigadis la dorson, kaj la vortojn ĝi eligis mallertege. Mi pensis, ke ĉar ili trakuris la longan kolon, intermite kiel akvogutoj, ĝi elparolis ilin deformite, preskaŭ elmordite.

Mia tasko estis rekonstrui ĝiajn frazojn, helpi al ĝi donante vortojn kaj kompreni ĝiajn, kiujn ĝi eligis "malnete".

Ŝajne ĝi "vekiĝis" en la Valo kaj estis kaptita dum granda enkortigo de brutaro, kun lĵamoj, vikunjoj kaj ĉevaloj. Ĝi estis postsekvinta la alian kvazaŭ lude, sed poste la ludo rezultis terura... Nur timo restis al ĝi el la pasinteco. Timis ĝi ĉiujn kaj pro ĉio. La lazo malesperigis ĝin. Certe pro tio, kiam ĉe Sinjorin' Avelina mi iris preni ion por ligi ĝin, ĝi forkuris terurite en la korton.

Ne tute malaperis tiuj impresaj blekoj, kiuj miksiĝis al ĝiaj vortoj. Por ne aŭdi ĝian anheladon de tiel proksime, mi leviĝis kaj instigis ĝin sekvi min. Apud mi ĝi paŝadis kun la kolo tiel retrofleksita, ke tio impresis min. Ree ĝi ŝajnis al mi statueca kaj monstra. Eĉ unu vorton mi ne eldiris, ĉar mi proksimis al terurigo, vidante ĝin tiel stara, preskaŭ homigita.

Iom post iom ĝi rememoris sian vivon. Ne multe kostis al ĝi kompreni tion, kion la homoj parolas. Tre stranga estis ĝia rakontado ; ĝi miksis kreolajn vortojn kun vortoj neniam aŭditaj de mi.

Iun tagon, en la Valo, ĝi volis babili kun iuj kampuloj. Tio devis esti io terurega, ĉar ĝi tremis rememorante ĝin. Ili diris, ke ĝi estas ĉamnito, kiu pagas pro siaj kulpoj, ke ĝi estas la diablo... Mi ne scias, kiel ĝi saviĝis. Iu maljunulino, malespera ĉar oni ne mortigas ĝin, ĵetis al ĝi krucojn, kandelojn kaj eĉ brulantajn stangojn.

Surpriza estis la kadenco de ĝia memorpovo. Ĝi menciis, kiel mi diris, tre strangajn aferojn. Aŭ, ĉu mi ja ne komprenis ilin bone ? Mi memoras kelkajn vortojn. "Pirito" - ĝi diris pli ol unufoje. Mi ne scias, ĉu Pirito estas iu herbo aŭ iu loko. Ĝi parolis ankaŭ pri riveroj kun nur unu bordo kaj pri verdaj akvoj. Mi neniam vidis tian riveron. Poste ĝi parolis pri deklivoj, pri ĝangaloj kaj pri marmoroj. Ĉu temas pri statuoj ? Al ĝi plaĉis ripetadi : "Iksion" ; "Iksion", kvazaŭ vokante iun.

La vortojn strangajn ĝi elparolis pli bone. Ĝi rakontis, ke ofte okazis al ĝi forgesi ĉion memoritan kaj aliajn fojojn alvenis al ĝia memoro aferoj kaj okazoj neniam viditaj kaj kiujn li certe travivis. Ĝi diris ankaŭ, ke kiam ĝi sentas sin senmemora, ĝi proksimiĝas al la ĉevaloj. Precipe en la tempo de la bona fojno, al ĝi plaĉis intermiksiĝi kun ili kaj ĵeti sin sur kiun ajn ĉevalinon. Iun fojon, kiam ĝi decidis fari tion, la ĉevalino forkuris terurite pro ĝia "neĉevalco", ripetante plurfoje : "neĉevala".

Poste ĝi aldonis, ke ĝi ne povas morti kaj ke ĝia destino estas daŭradi, daŭradi. Ni jam estis proksime de la lastaj montetoj, kiuj atingis ĝis la vojo, kaj ĉar mi ne kuraĝis - neniam mi estus kuraĝinta - surrajdi ĝin, mi klopodis imagi kion oni diros ekvidante min alveni piede.

Mi estis denove sidiĝonta sur iu ŝtono por iomete ripozi...

kaj refreŝiĝi, sed ĝi estis tre nervoza. Apud ĝi, mi pensis pri tio, kion ĝi diris, kia ĝi estas, ĉu belega ĉu aĉa.

Subite ĝi starigis sin fronte al mi. Ĝi anhelis, ŝvitis, kvazaŭ ĝi estus galopinta. Ĝi ŝajnis al mi pli mallerta ol iam. Finfine ĝi eldiris per voĉo kava, stumbla : "las' las' forir' galop' las' ".

Forlasi ĝin meze de la kampuloj estas kondamni ĝin al la sufero - mi ekpensis. Tiaj aferoj ĉiam devas okazi al mi. Bonŝance, ĝi renkontis min ; kaj mi povas helpi al ĝi. Dum mi demetis al ĝi la selaĵojn kaj la muzelington, ĝi henadis mallaŭte kaj kapskuis. Mi preskaŭ emis brakumi ĝin. Mi vidis ĝin malproksimiĝi per vasta galopo. Foje kaj foje ĝi haltis por rigardi la nigran monton kaj la Andojn, kun aroganta aspekto, kiu multe plaĉis al mi. Je la distanco la korpo perdiĝis en la ombroj kaj estis distingeblaj apenaŭ la blankaj kruroj saltantaj en la nokto.

Poste mi vidis ĝin atingi la pintojn kaj mi imagis ĝian ĝojon liberan kaj senbremsan.

- Malmulte da heleco restas al vi - mi murmuris. Tie ĉio estas malhela, kien vi iras.

Paŭlo vidis min alveni kun la selaĵoj surŝultre.

- "Guanako" forkuris - mensogis mi. Ĝi forfrotis la buŝaĵon ĉe iu fosto, kaj mi perdis du horojn, serĉante la disĵetaĵon, kiun ĝi faris per la selaĵoj. Se ĝi forperdiĝos, mi pagos ĝin al vi ; se ne, mi aĉetos ĝin al vi ĝuste nun, kaj mi igos ĝin serĉi.

Mia amiko kondukis pli bone, ol mi.

- Ne estos tiel, Georgo - li diris kapmove. Tiel ne estos.

Kaj li aldonis :

- "Ĉe tri kruroj makulita, nek donita nek vendita". Mi nek vendos nek donos ĝin. Iomete malmilda ĝi estas, sed eble ĝi revenos al la hejmloko. Morgaŭ mi esplorserĉos ĝin. Sed aŭdu konsilon mian : Ne ebriiĝu, kiam vi surraĵdos fremdan ĉevalon. Por via bono mi diras tion al vi.

- (1) Majmarao (Majmara') : vilaĝeto en provinco Ĥuĥujo, Argentino, limanta kun Bolivia Respubliko.
- (2) Tilkaro (Tilcara) : same kiel (1).
- (3) "Guanako" (Lama Huanachus) : anda kameledo, kiu kutimas kraĉi al la fremdaj personoj alproksimiĝantaj al ĝi. Samrange ĝi apartenas al la familio Kameletoj, kiel la ljamo, alpako kaj vikunjo. Estontece en PIV oni devos korekti la difinon de Guanako kaj la ortografion de ljamo kaj vikunjo, kiu devos esti la formoj definitivaj, laŭ la regiona prononco.
- (4) Ĉakdevena : el provinco Ĉako, norde de Argentino.

* * *

" L A I N S U L O "

De : VILLORDO (vijordo), Oskaro
Ĉakano, 1928-
Poeto kaj novelisto.

.....

Oni nomis ĝin : "la insulo", simple, samkiel oni diras : "malbonfarto", kiam oni volas kaŝi la malsanon(1).

La unua memoro, kiun mi havis pri ĝi - post la transiro sur la kanoto - estis pri profunda marĉejo, kien oni eniris serĉante "ĉevalvostojn" t.e. ekvizetojn (2).

Sed eble kien oni iras nun, tio ne estas "la insulo", sed alia simila, kaj daŭras longe atingi ĝin.

Longe restis la vido de la palisoj apike enigitaj sur la strando por kapti la doradojn (3), kaj la ardeoj desegnitaj kvazaŭ per kretostreko, ekflugis el multaj teramasoj, tie malproksime.

La vojaĝo fariĝis longa kaj la suno komencis piki. Unu el la policianoj, la dikulo kiu maltrankviligis lin per sia korpulenteco, havis la vizaĝon kovrita de ŝvito ; kaj lia patro, senpacience, frapis siajn botojn per la rajdovipo.

Li profundigis la manon en la freŝan akvon, kaj sulko, kiel tiu kiun desegnus naĝilo de iu fiŝo aŭ tiu, kiun desegnas la motorboato, plugiĝis en la likva maso, kiu fluis rapidege direkte al ili.

Li sentis ĉe la mano la reziston de la akvo, kaj surprize, la puŝon de sia patro. Kolerete li rigardis la fingrojn gutantajn kaj ne turnante sin - li ja sciis ke estas la boto kaj ne la mano - li rigardis al la bordo, kie Paranao (4) tie vastiĝis sen randoj, sur la sabloloango profundiganta en la akvon, kaj li ekvidis malproksimen punkton postlasantan fumsignalon. Li duonfermis la okulojn kaj lasis sin luli de la balanciĝado de la motorboato.

La kamalotoj (5) estis verda rubando surkovrita de bluj makuloj, rapidaj, sinsekvaj, kiuj irize saltis tra liaj okulharoj ; la teramasoj kun sejboj (6), koloraj arbar-etoj kun ruĝaj makuloj kaskade falantaj ; la kanaoj (7), verdaj landoj falditaj - duone en ombro, duone en lumo - kun multaj kolorpecoj : la floroj.

La plenaĝuloj estis okupitaj per babiladoj, kiuj ne interesis lin. Lia patro daŭrigis gvatante, donante instrukciojn al la policianoj, krom al la dikulo, kiu vojaĝis ĉe la poupo nun kun blanka tuko ĉe la vizaĝo. Se li almenaŭ havus fiŝhokon, aŭ li povus bani en la akvo !

La rivereto tiel mallarĝiĝis, ke li povus tuŝi (se ne estus la rigardo de lia patro) la nestojn pendantajn de la branĉoj, la branĉojn kiuj proponis sin kiel nestoj.

Verda vipuro rapide malvolviĝis kaj ĝi estis kvazaŭ alia verda branĉo kune kun la frostotremo, kiun li sentis retirante la manon, senpripense etenditan.

Li subite aŭdis, ke sur la bordo oni salutas ilin. Knaboj kiel li levis la brakojn sur la kajo de lerneĵeto kaj sur la kanotoj kablofiksitaj, kiujn ili klopodis teni ekvilibre. Li restis rigardanta ilin super la ondo postlasita de la boato.

Kiam ili atingis "la insulon", la suno kaj la laceco estis devigintaj lin serĉi ŝirmon ĉe la botoj de sia patro.

La kabano, kien ili devis iri, situis malproksime de la bordo, kaj li laciĝis pro piedirado meze de la veproj. Laŭ ordono de lia patro, unu el la policianoj levis lin, surportis lin ĝis kiam la bojado de la hundoj montris la ĉirkaŭojn kaj ili alvenis.

Ĉe la pordo sidis du virinoj funebre vestitaj, plorantaj kvazaŭ ili farus tion ekde longe antaŭe, kaj estis iu knabo, kiu kaŝiĝis en la forno, kiam li ekvidis ilin veni.

Li profitis neatenton de sia patro por eniri la kabanon. En la malheleco li eltrovis amason da ladoj, da rustaj ladetoj, kiujn la policianoj esploris kaj kiuj nenion enhavis, escepte tiun odoron je malnoveco, tiun obsedon esti tiom multaj kaj rustaj.

Tiam li serĉis la knabon en la forno. Li trovis lin kaŭranta : nur liaj okuloj brilis ĉe la fundo de la kavo. Li proksimiĝis al li, tuŝis lin. En la forno estis ankaŭ

multaj ladoj kun la sama odoro de malnoveco, kaj plumboj de kokinoj, sed la planko havis cindron ; kaj al li sufiĉis konscii, ke la manplatoj blankiĝas, por lasi la fingrospurojn sur la vizaĝo de l'alia. Jam bone blankigitaj (li ankaŭ cindromarkis sin per la fingroj) ili elmontriĝis ĉe la faŭko de la forno kaj ekvidis la scenon de la korto.

Lia patro kaj la policanoj staris ĉirkaŭ la mortinto kaj ili desegnis kaj notis aĵojn sur notlibreto. De temp-al-tempo iu hundo trafita de la neerarema boto forkuris jelpante. Kaj la muŝosvarmo disflugadis kaj denove kolektiĝadis super la kadavro ŝvelinta.

La dika policano malkovris la mortinton forprenante la drelikon, kiu ĝin kovris, kaj kliniĝis super li, metante vergeton en liajn vundojn por mezuri ilin.

Kiam la viroj revenis al la kabano, li kaj la knabo proksimiĝis al la kadavro, kaj ili ripetis la manovron de la policano per la dolĉa ekstremo de iuj sovaĝaj spiketoj, kiujn ili maĉis. Unu el la virinoj ekvidis ilin ; ŝi kumprenis la knabon, forpelante la muŝojn kaj rekovrante la mortinton per la dreliko.

Je tagmezo ili revenis. Sed la suno ankoraŭ ne estis varmiginta per ĉiuj siaj fortoj.

Por mallongigi la vojon, la patro sendis ilin kun la dika policano tra la kurtvojo trairanta "la insulon", kaj kondukanta al la rivereto, kie ili devis atendi lin.

Unue aperis vastega bananujaro, kun arksimilaj folioj etenditaj de unu ekstremo al la alia en la volbo, kiun ili formis.

Li forprenis sian ĉapelon kaj desur la ŝultroj kie ili sidis, li tute turniĝis, rondirigante la policanon, por tuŝi la freŝajn foliojn per la mano desegnanta la rondon.

Poste malfermiĝis la fono de lumo, kaj estis lumkaskado kie la akvo estis pli hela ol la lumo, pli freŝa ol la bananujaro.

Tie ili devis atendi la patron. La policano forprenis siajn botojn, kiujn li apogis ĉe arbotrunko kaj, rekomendante lin ne moviĝi, li endormiĝis. Lia dormo estis tiel profunda, ke zumis super lia vizaĝo iu blua muŝo, aperinta oni ne scias de kie, sed li ne vekigis.

Li tiam elmontriĝis ĉe la kaskado, li ekvidis la rompitan ĉielarkon, kiun formis la luno, kaj vidis la viron plaudentan en la ŝlimo de la bordo, kovritan de sekaj folioj, tiel ŝrumpintan kiel la trunko, ĉe kiu ripozis lia akompananto.

La viro vokis lin, levis brakon ronĝitan kiel branĉo, kaj diris ion al li, kion li ne komprenis, ĉar la voĉo sonis kave, balbutripete. Li observis la figurojn el koto, kiujn li estis modlanta, kaj kiujn li montris al li : ĉevalon, hundon, porkon, homon. Li daŭrigis, rigardante scivoleme kaj komencis rideti al li, vidante lin okupita plaudente en la koto por modli pupon kun la okuloj kavaj kiel la siaj, sed kun flugiloj anstataŭ brakoj kaj kun gamboj de giganto.

Poste - kun nekredebla rapideco kaj kun agemo, kiu igis lin trovi birdoplumojn, orajn dornojn, kolorajn fruktojn por la ornamoj - la viro modlis al li legionon de monstroj kun rostroj, ungegoj, flugiloj, ĝiboj, vostoj, kornoj.

Ili kunridis, kaj kunpromenis laŭirante la rivereton ĝis la kaskado. La lumo estis tiel belega ĉe la akvo, kiel en la bananujaro. Li rigardis la ŝprucon, kiu falis dispecigita laŭ briloj, kaj kiam li kliniĝis por trinki, li ekvidis la svarmon de arĝentkoloraj fiŝetoj, kiujn lia movo estis fortimiginta.

Li restis rigardante ilin, disĵetitaj, ĝis la viro profundigis la manon en la akvon, lasis ĝin momente deformita sub la likvaĵo, kaj eltiris ĝin kun la tuta fiŝosvarmo algluiĝinta je la karno.

Ili denove kunridis kaj lia akompananto gestis al li, ke li loku sin sub la akvofalo, ke li forprenu siajn vestojn kaj aliru. Li obeis al li, kaj kroĉante sin al la bastono, kiun li etendis, por ke li ne falu, li eniris, lokis sin nuda sub la akvo kaj en la ĉielarko.

La akvo - pura kaj freŝa - falis sur lin kaj li ekkriis de feliĉo. Li rimarkis, ke sub la kaskado estas nesto de kolibroj, kiun la birdeto ĉirkaŭŝvebas kiel vibrado en la aero.

Kaj kiam li volis rigardi supren, okulsekvante la flugadon de la birdo, surprizis lin la ronda abelujo pendanta de alia bastono, kiun la viro subtenis ĉe la bordo. Li mal-

fermis la buŝon kaj en ĝin falis la ŝpruco de mielo raspa kaj varmeta. Li trinkis ĝis kiam li ne deziris pli, kaj kiam li klinis la kapon, la viro ludis kun li kaj banis lin per mielo. Ili estis ĉe la bordo, kolektante kamalot-florojn, kiam surprizis ilin lia patro, kaj la viro, kriegante, apenaŭ povis forkuri, kiel disfranĝita birdotimigilo, persekutata de la policanoj kaj frapata de la botoj, direkte al la leprulejo de "la insulo".

-
- (1) ... pro eufemismo.
 - (2) "ĉevalvosto" : popolnomo de la ekvizeto, herbo (lat.: "equisetus").
 - (3) doradoj : fiŝoj kun oraj rebriloj, el la hisp. : "doradō" = orkolora.
 - (4) Paranao : sudamerika riverego, 4 500 km. longa, trairas tri landojn.
 - (5) kamaloto : akvoplanto kun longa, dika tigo ; foliego telerforma, floro blua.
 - (6) sejbo : (fonetike) argentina arbo = bombako (lat. : "bombax").
 - (7) kanao : vd. PIV ("canna").

* *
*

" L A S U D O "

De : BORGES (borñes), Georgo Luizo
 Bonaerano, 1890-
 Poeto kaj novelisto. Li elstaras
 en la scienca fikcia rakontarto.
 Lastatempe multe premiita en Eŭropo
 kaj Usono.

.....

La viro, kiu elŝipiĝis en Bonaero en 1871a, nomiĝis Johannes Dahlmann kaj estis pastoro de la Evangelia Eklezio. En 1939a unu el liaj nepoj, Johano Dahlmann, estis sekretario de Komunuma Biblioteko, kaj sentis sin profunde argentina.

Lia patrinflanka avo estis Francisko Floroj, el la 2a Infanteria Regimento, kiu mortis ĉe la Bonaeria (1) landlimo, lancmortigita de la indianoj de Katrielo (2). En la malpaco de siaj du genealogioj, Johano Dahlmann, - eble pro impulso de la ĝermana sango - elektis tiun de la antaŭulo romantika aŭ kun romantika morto.

Skatolo kun la foto de senesprima kaj barba viro, malnova spado, la feliĉo kaj kuraĝigo de iuj muzikaĵoj, la kutimeco al la strofoj de Marten-Fero (3), la jaroj, la malvolo kaj la soleco, flegis tiun kreolismon iomete intencan, sed neniel vantian.

Pere de kelkaj oferoj, Dahlmann sukcesis en la Sudo forsavi la kernon de brutbieno, kiu estis de la familio Floroj. La bildo, kiu kutime fiksiĝis en lia memoro estis la balzamaj eŭkaliptoj kaj la longa rozkolora domo, kiu iam estis karmezina.

La taskoj aŭ eble la apatio, tenis lin en la urbo. Unu someron post la alia, li kontentiĝis per la abstrakta ideo pri posedo kaj pri la certeco, ke lia domo estas atendanta lin, en preciza loko de la ebenaĵo.

En la lastaj tagoj de februaro 1939a okazis io al li.

Blinda je la kulpoj, la destino povas esti senkompata pro la plej etaj neglektoj. Dahlmann ekhavis tiun vesperon ekzempleron fuŝitan de "La Mil kaj Unu Noktoj" de Vajl. Deziregante esplori tiun eltrovaĵon, li ne atendis, ke la lifto malsuprenvenu kaj li supreniris haste la ŝtuparojn. Io en la mallumo ektuŝis lian frunton (ĉu vesperto, birdo?). Sur la vizaĝo de la virino, kiu malfermis al li la pordon, li ekvidis la teruron stampita, kaj la mano per kiu li frotis sian frunton, estis sangomakulita. La eĝo de pordokadro ĵus farbita, kiun iu forgesis fermi, faris al li tiun vundon. Dahlmann sukcesis endormiĝi, sed frumatene li viglis, kaj ekde tiu horo la gusto de ĉiuj aferoj estis terurega. La febro konsumadis lin, kaj la ilustraĵoj de "La Mil kaj Unu Noktoj" taŭgis por dekoracii inkubsonĝojn. Amikoj kaj parencoj vizitis lin kaj kun troigita rideto ripetadis al li, ke ili trovas lin tre bonfarta. Li aŭdis ilin kun malforta surprizo kaj miris, ke ili ne scias, ke li estas en la infero.

Pasis ok tagoj, kvazaŭ ok jarcentoj. Iun vesperon, la kutima kuracisto aperis kun nova kuracisto kaj ili kondukis lin al sanatorio ĉe strato Ekvadoro, ĉar nepre necesis fari al li radiografion.

Dahlmann, sur la fiakro, kiu portis ilin, ekpensis ke en ĉambro, kiu ne estas ja la lia, lin finfine vizitos dormo. Li sentis sin feliĉa kaj babilema. Tuj post la alveno oni senvestigis lin, razis lian kapon, ligis lin per metallamenoj al lito, lumigis lin ĝis la blindumo kaj la sveno, esploris lin, kaj maskita viro enigis injekttil-pinglon en lian brakon. Li vekigis naŭzita, bandaĝita, en ĉelo kiu iel similis al puto, kaj dum la tagoj kaj noktoj, kiuj sekvis la operacion, li povis ekkompreni, ke ĝis tiam li estis en antaŭurbo de la infero.

La glacio lasis en lia buŝo neniun postesignon de freŝo. Dum tiuj tagoj Dahlmann detalege malamamis sin mem, sian identecon, siajn korpajn necesojn, sian humiliĝon, sian barbon, kiu hirtigas lian vizaĝon. Li stoike suferis la kuracadojn, kiuj treege doloris, sed kiam la kirurgo diris al li, ke li estis ĵus mortonta pro septemo, Dahlmann ekploris, kortuŝita pro sia destino.

La fizikaj mizeroj pro la senĉesa antaŭvido de la aĉaj noktoj ne permesis al li pensi pri io tiel abstrakta, kia la morto. Aliaj tagoj, la kirurgo diris al li, ke li estas sur la resaniĝa vojo, kaj ke baldaŭ li povos iri al la kampobieno por finsaniĝi. Nekredeble, la promesita tago alvenis.

Al la realo plaĉas la simetrioj kaj la etaj anakronismoj : Dahlmann alvenis al la sanatorio per fiakro, kaj fiakro nun portas lin al la Suda Stacio. La unua aŭtuna freŝo, post la somera premo, estis kvazaŭ la natura simbolo de lia destino savita el la morto kaj la febro. La urbo, je la sepa matene, ne estis perdinta tiun aspekton de malnova domo, kiun la nokto donas al ĝi ; la stratoj estis kvazaŭ longaj koridoroj, la placoj kvazaŭ kortoj. Dahlmann kun feliĉo kaj ekveno rekonsi ĝin. Sekundojn antaŭ ol liaj okuloj registris ilin, li memoris la stratangulojn, la afiŝojn, la modestajn diferencigilojn de Bonaero. En la flava lumo de la nova tago, ĉiuj aferoj revenis al li.

Ke la Sudo komenciĝas trans la strato Rivadavja, ĉiu scias. Dahlmann kutime ripetadis, ke tio ne estas konvencio, kaj ke kiu transiras tiun straton eniras mondon pli antikvan kaj pli firman. Desur la fiakro li serĉis sur la novaj konstruoj la kraditan fenestron, la frapilon, la arkon ĉe la pordo, la koridoron, la intiman korton.

En la halego de la stacidomo li ekrimarkis, ke mankas tridek minutoj. Li abrupte ekmemoris, ke en kafejo ĉe Brazilo strato, je malmultaj metroj disde la domo de eks-prezidento Irigojen, estas grandega kato, kiu lasas sin karesi de la personoj, kiel rikana dio. Tie kuŝas la kato, dormanta. Li mendis tason da kafo, dolĉigis ĝin malrapide, gustumis ĝin (tiun plezuron oni malpermesis al li en la kliniko) kaj pensis, dum li glatigis la nigran felon, ke tiu kontakto estas iluzia, kaj ke ili estas kvazaŭ apartigitaj de kristalo, ĉar la homo vivas en la tempo, en la sinsekvo, kaj la sorĉa animalo en la nuno, en la eterneco de la momento.

Laŭlonge de la antaŭlasta kajo la trajno atendis. Dahlmann preteriris la vagonojn kaj trafis unu preskaŭ malplenan. Sur la supran retan valizujon li metis la valizon ; kiam ekveturis la vagonoj, li malfermis ĝin kaj eltiris, post ioma hezito, la unuan volumon de "La Mil kaj Unu Noktoj".

Vojaĝi kun tiu libro, tiel ligita al la historio de lia malfeliĉo, estis aserto, ke tiu malfeliĉo estas nuligita, kaj ĝoja kaj sekreta spito al la fiaskintaj fortoj de la malbono.

Ambaŭflanke de la trajno, la urbo disŝiriĝis laŭ sub-urboj. Tiu vidaĵo kaj poste tiu de ĝardenoj kaj frukt-arboj prokrastis la komencon de la legado. Vere estas, ke Dahlmann legis malmulte ; la monto el magneto kaj la genio, kiu ĵuris mortigi sian bonfarinton estas miregindaj - kiu neas tion ? - sed ne multe pli, ol la mateno kaj la fakto ekzisti. La feliĉo distris lin for de Ŝerhazado kaj ŝiaj superflujaj mirakloj. Dahlmann fermis la libron kaj simple lasis sin vivadi. La tagmanĝo (kun la buljono prezentata en bovloj el brilega metalo, kiel dum tiuj ferioj antaŭlongaj de la infanaĝo) estis alia trankvila kaj dankinda ĝuo.

"Morgaŭ mi vekigos en la bieno", li pensis, kaj estis en li kvazaŭ samtempe vivus du homoj : unu progresanta tra la aŭtuna tago kaj la geografio de la patrio, kaj la alia, enfermita en sanatorio kaj submetita al metodaj sklavecoj. Li vidis : domojn kun brikoj neŝmiritaj, angulajn kaj longajn, senfine rigardantajn la pasadon de la trajno ; rajdantojn sur la polvoplenaj vojoj ; fosojn kaj lagunojn kaj brutarojn ; longajn nubojn, lumajn, kiuj ŝajnis el marmoro ; kaj tiuj aĵoj, ĉiuj estis hazardaj, kiel sonĝoj de la ebenaĵo. Li ankaŭ kredis rekoni arbojn kaj grenojn, kiujn li ne estus povinta nomi, ĉar lia rekta kono pri la kamparo estas treege malsupera al lia kono nostalgia kaj literatura.

Kelkfoje li dormis, kaj en liaj sonĝoj estis la impeto de la trajno. Jam la blanka suno neeltenebla de tagmezo estis la suno flava, kiu antaŭas krepuskon, kaj kiu baldaŭ estos ruĝa. Ankaŭ la kupeo estis malsama ; tiu ne estis, kiu forlasis la kajon de la Suda Stacio ; la ebenaĵo kaj la horoj estis trairintaj kaj transformintaj ĝin.

Ekstere la moviĝanta ombro de la vagono longiĝis en direkto al la horizonto. Nek loĝlokoj nek aliaj homaj signoj perturbis la elementan teron. Ĉio estis vasta, sed samtempe intima, kaj iel sekreta. Sur la kampo senmezura kelkfoje ne estis alio, ol taŭro. La soleco estis

perfekta kaj eble malamikeca, kaj Dahlmann povis konjekti, ke li vojaĝas al la pasinteco kaj ne nur al la Sudo.

El tiu fantazia konjekto fordistris lin la konduktero, kiu avertis al li - ekvidante lian bileton - ke la trajno ne lasos lin ĉe la kutima stacio sed ĉe alia, iomete antaŭa kaj apenaŭ konata de Dahlmann. La viro aldonis klarigon, kiun Dahlmann ne klopodis kompreni, eĉ nek aŭdi, ĉar la meĥanismo de la faktoj ne interesis lin.

La trajno pene haltis, preskaŭ meze en la kamparo. Trans la reloĵ staris la stacio, kiu estis malmulte pli ol kajo kun ŝedo. Neniun veturilon ili disponis, sed la estro opiniis, ke li eble povos ekhavi iun ĉe magazeno (4) situanta je dek-dekdu stratoj, laŭ lia indiko.

Dahlmann akceptis la piediradon kiel etan aventuron. Jam la suno estis sinkinta, sed fina glorbriilo ekzaltis la vivan kaj silentan ebenajon, antaŭ ol la nokto forviŝos ĝin. Malpli por ne laciĝi, ol por igi tiujn aferojn pli daŭri, Dahlmann paŝadis malrapide, flarante kun serioza feliĉo la odoronde la trifolio.

La magazeno estis iam punca, sed la jaroj por ĝia bono estis mildigintaj tiun akran koloron. Io en ĝia povra arkitekturaĵo memorigis lin pri iu ŝtalgravuro, eble el malnova eldono de "Paŭlo kaj Virginia". Estis kelkaj ĉevaloj ligitaj al la palisaro. Interne, Dahlmann kredis rekoni la mastron; li poste komprenis, ke trompis lin lia similo al unu el la oficistoj de la sanatorio. Kiam li sciigis pri la kazo, la viro diris, ke li ordonos jungi por li kaleŝon. Por aldoni alian okazon al tiu tago, kaj por plenigi tiun tempon, Dahlmann decidis vespermanĝi en la magazeno.

Ĉe iu tablo brue manĝis kaj trinkis junulegoj, kiujn Dahlmann komence ne priatentis. Sur la planko, tre maljuna viro kaŭris senmove, apogata kontraŭ la servotabulo. La amaso da jaroj estis ŝrumpiginta kaj polurinta lin kiel la akvo ŝtonon aŭ la generacioj de homoj sentencon. Malhelhanta, malalta kaj sulkoplana, li estis kvazaŭ ekster la tempo, en cetero. Dahlmann plaĉe esplorrigardis la hazonon, la ponĉon el maldensa lano, la longan ĉiripaon (5) kaj la boton el ĉevalida felo, kaj diris al si mem, memorante senutilajn diskutojn kun personoj el la nordaj distriktoj aŭ kun entreprenoj (6), ke tiaj gaŭĉoj jam restas nur en la Sudo.

Dahlmann aranĝis sin apud la fenestro. La mallumo restis en la kamparo, sed ĝiaj odoroj kaj murmuroj ankoraŭ atingis lin tra la ferkradoj. La mastro alportis al li sardelojn kaj poste rostitan viandon. Dahlmann ŝovis ilin internen per kelkaj glasoj da ruĝa vino. Li pigre frandis la akran guston kaj lasis sian rigardon, jam dormeman, erarvagi tra la ejo. La kerosenlampo pendis de unu el la traboj ; la klientoj ĉe la apuda tablo estis tri : du ŝajnis laboristoj de iu farmbieno ; alia, kun indianecaj kaj krudaj trajtoj, trinkis kun la ĉapelo surmetita. Subite Dahlmann eksentis mildan tuŝon ĉe la vizaĝo. Apud la aĉkvalita glaso el malklara vitro, sur unu el la strioj de la tablotuko, kuŝis panerbuleto. Tio estis ĉio, sed iu ja ĵetis ĝin al li.

La uloj ĉe la alia tablo ŝajnis indiferentaj je li. Surprizita, Dahlmann decidis agi, kvazaŭ nenio okazus, kaj malfermis la volumon de "La Mil kaj Unu Noktoj", celante kaŝi la realon. Alia panerbuleto trafis lin post kelkaj minutoj, kaj ĉi-foje la laboristoj ekridis. Dahlmann diris al si mem, ke li ne timas, sed estas sence ke li, resaniĝinta, lasus sin treni de nekonatoj al konfuza kverelo. Li decidis eliri ; kiam li jam staris, la mastro alproksimiĝis al li kaj admonis lin per alarmoplena voĉo :

- Sinjoro Dahlmann, ne zorgu pri tiuj junuloj, ili estas sufiĉe gajaj (7).

Dahlmann ne miris, ke la ulo nun rekonas lin, sed li sentis, ke tiuj admonaj paroloj fakte gravigis la situacion. Antaŭe la provoko de la laboristoj celis hazardan vizaĝon, preskaŭ neniun ; nun ĝi celis lin mem kaj lian nomon, kaj la najbaroj scios ĝin. Dahlmann flankenpuŝis la mastron, alfrontis la laboristojn kaj demandis al ili pri ilia intenco. La huligano kun la indianeca vizaĝo ekstaris, ŝanceliĝante. Je unupaŝa distanco de Johano Dahlmann li insultis lin krie, kvazaŭ li status tre malproksime. Li ludis la troigon de sia ebriceo, kaj tiu ludo estis kruela kaj moka. Meze de paroloj krudaj kaj malĉastaj, li ĵetis aeren longan tranĉilegon, sekvis ĝin per la okuloj, ekkaptis ĝin, kaj invitis Dahlmann batali. La mastro tremvoĉe argumentis, ke Dahlmann estas senarmila. Kaj ĉe tio, io neantaŭvidebla okazis .

Disde angulo, la maljuna senmova gaŭĉo, en kiu Dahlmann vidis simbolon de la Sudo (de tiu Sudo lia), ĵetis al li seningan ponardon, kiu falis ĉe liaj piedoj ; kvazaŭ la Sudo decidus, ke Dahlmann devas akcepti la defion.

Dahlmann kliniĝis kapti la ponardon kaj eksentis du aferojn. Unue, ke tiu preskaŭ instinkta ago kompromitas lin batali. Due, ke en lia mallerta mano la ponardo ne taŭgos por defendi lin, sed por pravigi, ke oni mortigu lin. Iam li skermis per ponardo kiel ĉiuj viroj, sed lia skermarto ne superis la nocion, ke "la frapojn oni ĵetu supren kaj la akraĵo estu ene".

Li pensis : "En la sanatorio oni ne estus devinta permesi, ke tiaj aferoj okazu al mi..."

- Ni ekiru eksteren - diris la alia.

Ili eliris, kaj se ĉe Dahlmann ne estis espero, ankaŭ ne estis timo. Transirante la sojlon, li eksentis, ke dum tiu unua punkto en la sanatorio, kiam oni enigis al li la injektilpinglon, morti en ponardbatalo sub la ĉielo kaj sturmante, estus por li liberigo, feliĉo kaj festo. Li eksentis, ke se tiam li estus povinta elekti aŭ prirevi sian morton, tiu estas la morto, kiun li estus elektinta aŭ prirevinta.

Dahlmann firme tenas la ponardon, kiun eble li ne kapablos manipuli, kaj li enpaŝas en la ebenajon.

- (1) Bonaeria : el provinco Bonaero.
- (2) Katrielo : unu el la plej bravaj tribestroj dum la milito kontraŭ la pampasaj indianoj.
- (3) "Marten-Fero" : majstroverko de la argentina literaturo; pledo soci-politika.
- (4) magazeno : eĉ se ne luksaj, en la pampo ĉiuj butikoj kaj trinkejoj estas nomataj tiel.
- (5) ĉiripao (el la araŭkana : ĉiri-pac = por la malvarmo) : tuko el drapo aŭ lano por kovri la korpon ekde la talio malsupren ; ĝi pasas inter la kruroj kaj nodiĝas ĉe la talio.
- (6) entrerianoj : el provinco Entrerio, arg. oriento (hisp. = inter riveroj).
- (7) gajaj : argentina eufemismo = ebrietaj.

" L A N I G R A K R U C O "

De : CODINA (:kodina), Iverna
Mendozanino, 1924-
Poetino kaj novelistino.

.....

La aŭtobuso kaduka kaj brua anhelis astme tra la pado meze de polvokirlo kaj fetoraj fulmonuboj de bruligita oleo. La ŝoforo metis la unuan rapidumon, kvazaŭ ĝi estus incitpikilo kaj la veturilaĉo krude skuiĝis kaj blekegis suprenirante la krutaĵojn kaj milde balanciĝis deklivmalsupren.

Oni kromnomis ĝin : "la aŭtobuso de la ebruloj", ĉar ĝi ekveturis ĉiudimanche - longe post noktomezo - ekde Kolonio T. direkte al Sanrafaelo (1). Tiam nur tri pasaĝeroj vojaĝis. Du, endormiĝintaj, faris kapmovojn, kiu scias ĉu pro la vino aŭ pro la laĉeco. La tria sendube estis ĵus forlasinta la drinkejon. Li zumkantis gurdante la notojn de l'ario per voĉo ebruala, samtempe ĉagrenita kaj kolerema :

"Nu, sinjor' Seferino, glason da vino ekverŝu jes... tute ebria iĝi, por droni en la forges'..." (2)

Li eltiris boteleton, kiun per la piedoj li zorge ŝirmis de la skuoj, kaj li enbuŝigis ĝin. Li provinvitis la aliajn pasaĝerojn, kaj ĉar ambaŭ ŝajnis tro enprofundiĝintaj en la letargion, li turnis sin al la ŝoforo :

- Ĉu vi prenas, mastro ? (3)

- Dankon, mi ne trinkas, dum mi stiras.

La viro turniĝis maltrankvile sur la sidloko. Li estis atinginta tiun stadion de ebrieco, antaŭan al la ekdormo, kiu bezonas la eŭforian komunkiĝon, la babiladon kaj la bruadon. Li pluinsistis kun la ŝoforo.

- Ĝuste, nu... Oni forpelas la homojn el Malnova Sitelo (4). Granda pelmelo, ĉar vidu... mia kunpatro

Felisiano - bona homo, nu - aĉetis sian terparcelon :
iu doktora moŝto vendis ĝin al li eĉ kun koncerna plano.

Li vendis al multaj homoj teron, kiu estis el la vastegaj kampoj de maljunulo TABANERA (5)... kaj nun, ke la tero ne estas ilia !... ke ĝi estas registara, ke ĝi estas tero de la Ŝtato, ke neniu havas dokumentojn, kaj oni forpelas ilin... nu, diru al mi... Oni diras, ke la registaro disparcelos la teron... Kiel oni komprenu ĝin ; disparcelition, kio havas mastron, aĥ !?

La ŝoforo senresponde okulumis lin je la spegulo.

La alia daŭrigis nevarie.

- Ke oni trompis ilin, ke neniu povas vendi ŝtatan teron... kaj la polico forpelas ilin. Nu, kial vi malŝaltas la lumon, mastreto ?

- Por ke la pasaĝeroj dormu.

La viro, kiu kapbalancis sur la dekstra sidloko rektiĝis kaj atente elrigardis tra la malfermita fenestreto, kvazaŭ rekonante la lokon.

- Prenu, sinjoro - sturmis la ebriulo.

- Ne, dankon.

- Nu, nekredeble - kaj li aranĝis sin apud la viro, decida ĉiarimede ekhavi kunparolanton por sia vino.

Tute fremda al la malmulta bonvolo de la alia, li daŭrigis la senordan babilon :

- Mi ja kredas, ke mi konas vin... sed nu ; vidu... la Delegito pri Kolonioj mem diris al mia kunpatro Felisiano :

"...vi estas trompitaĵ, neniu havas dokumentojn...". Mi ja kredas, ke mi konas vin. Sed oni konsilis bone al mia kunpatro, kaj li ne elmigros el sia tero, nek li nek iu ajn... ili havas la helpon de... nu, ni vidos kiu povas venki lin, aĥ ! la brava gaŭĉo TALKENKA (5)... mi ja kredas, ke mi konas vin - kaj li apudmetis la vizagon por ekkoni lin en la duonombro de la veturilo, dum li alblovis al li odoraĉon de elruktita vino.

- Nu, amiko, aranĝu vin sur via sidloko, kaj ne tedu.

La ŝoforo denove ŝaltis la lumon, konjektante kverelon.

"Neniam mankas ebriulo en tiu damninda aŭtobuso, por plitedigi la veturon" - pensis malbonhumore la stiristo.

- Nu, ne necesas, ke vi rifuzu... ĉar mi... laŭ mi aspektas...

- Haltu, ŝoforo !

- Ne gravas tro ; tiu homo nur ebrietas - intervenis la ŝoforo.

- Neniu ĉifonulo ja ofendas min - kaj li furioze ekstaris.

- Haltu, haltu, mi diras ! Mi malsupreniros ĉi tie !
- forpuŝante la ebriulon, li paŝis preskaŭ surtretante lin, kaj li decidis alproksimiĝis al la pordo.
- Vi pravas - apogis la tria pasaĝero abrupte ŝirita el la dormo kaj la ebrieco, eĉ ne konsciante pri tio, kio okazas.

La ŝoforo krude bremsegis.

- Mi malsupreniras ĉi tie... Pluiru, ŝoforo... okazis ja nenio, kamarado - kaj la viro, kun gesto celanta ĝentilecon, elsaltis sur la vojon.

La aŭtobuso ekstartis. La ŝoforo restis pensema : "Stranga ja tiu ulo ; mi konjektas, ke li ion kaŝas."

Jam ektagiĝis. Sed la nokto ankoraŭ ŝvebis ĉe la krutaĵoj ; nur la freŝeco de la nokto ; ĉar la unuaj lumoj anticipis varmegan tagon.

La viro, certa pri la direkto, kurtigis vojon tra la kamparo.

Subite la suno intensigis sian impeton, kaj sufoka varmo bruligis la arbaron malaltan, sunrostatan, kaj ardis sur la tero senŝela, fendetita de la malsekeco.

La viro ne malrapidigis la kadencon de la paŝado. Li tre bone konis tiujn polvoplenajn padojn, kie prosperis nur lacertoj. Ĉirkaŭ tagmezo li ekvidis la kabanon.

Ĉe tufo de ĥariljo (6) li ekkuŝis por ripozeti dum li rigardadis la vojeton al la kabano. Poste li antaŭeniris malrapide. Iu hundo kun la ripoj apenaŭ subtenataj de la haŭto, ekflaris lin kaj ekbojis senentuziasme.

Malantaŭ la besto ekaperis la maljunulo. Per la manoj super la okuloj li ŝirmis ilin de la sunbrilo, por distingi la vizitanton. Kaj tiel akceptis lin la saluto de l'alia.

- Kiel traktas vin la sekeco, sinjor' AGILERA (7) ?

- Jen vi ĉi tie, ja nekredeble ! Eniru, mi estis sorbanta mateon ; ĝi efikas bone kontraŭ la varmo.

AGILERA apudiĝis al la fajro, kaj la alia falsidiĝis sur la seĝon kun sidloko el tifao (8).

- Prenu - kaj li enmanigis al li la mateujon.

Per sorbegoj li malplenigis ĝin ĝis la lasta murmuro. Nur tiam la vizitanto diris kvazaŭ enkonduke :

- Malĝoja fariĝis la situacio.

Kaj poste li klarigis :

- Mi intencis per la aŭtobuso atingi Diamanto-Riveron (9), sed ebruiulo komencis tedi... kaj mi decidis prefere envojiĝi ĉi tien.

AGILERA, siavice, flegme sorbadis, kaj silentis. Sur lia vizaĝo la emocioj estis tiel nedeĉifreblaj kiel lia aĝo.

- Kaj ĉi tie, kion oni rakontas ?

- Vidu, jen malbona konsilo mia : forlasu Felisianon... mi scias ja, vi estas kunpatro de mia filo, kaj li promesis al vi helpon por ke oni ne forprenu vian teron... sed vidu, ili estas multaj en Malnova Sitelo, kaj vi estas sola kaj persekutata. Prenu - li enmanigis la mateujon al li - ĉi tie jam la policanoj traserĉis la domon.

La vizitanto ekstremitis pro surprizo, sed lia voĉo sonis trankvile :

- Kion ili serĉis ?

- Homojn por la balotoj - ili diris, sed mi opinias, ke ili traserĉas vian spuron.

- Certe... Malĝojiga afero... sed mi kovros miajn spurojn, mi misgvidos ilin. Iu raportis, ke oni ekvidis min en Malargue (10).

- Pli bone, ne konfidu : oni komisiis patrolojn ĉie kaj onidire ili eĉ havas spurhundojn.

- Mi donos al vi kelkajn pesojn por la ĉevalo ; mi bezonas ĝin, kaj ĉi tion transdonu al Lusia (11). Se mi ne revenos - li tranĉis la frazon, kaj lasis sur la malpura tablo ĉifitan koverton kaj kelkajn biletojn eĉ pli ĉifitajn...

- Do, mi iros serĉi sur la kamparo la makulgrizan hufulon...
- kaj eliris AGILERA kun la kaprimeno sursultre.

La vizitanto restis penseme ĉe la kabanpordo : "Jes, oni eksieĝas lin. Oni kulpigis lin pri la rabo je la Banko kaj pri la murdo je la gardisto ; ĉio tial ke li ekribeligis la kolonianojn ĉe Malnova Sitelo kaj li eĉ provizis ilin per armiloj por rezisti la elloĝigon, kaj nun oni ĉasas lin kiel vulgaran murdinton. Ne. Li estis brutoŝtelisto kaj kontra-bandisto. Jes, ja. Sed li neniam elmondigis iun, se tio ne estis pro memdefendo. Kontraŭe, li ĉiam helpis al la malriĉuloj, ĉar "ni, la senhavuloj ĉiam devas favori unu la alian, manke de justeco", kiel ĉiam ripetadis lia mortinta patrino."

AGILERA ekaperis tirante la hufulon, kaj li surmetis al ĝi la selaĵojn. Sen plia interparolo surĉevaliĝis la vizit-

anto, kun nura lakona saluto :

- Ĝis revido, sinjor' AGILERA.

- Ke Dio helpu al vi - respondis la alparolito.

Li ekrajdis suden. Li denove ŝanĝis la direkton. Se ili traserĉis la kabanon, tio estas certa indico, ke oni atentis liajn movojn ĉie tra la sudo. Kaj certe oni baris eĉ lian lastan forkureblon. Ja nun li estas persekutata forkuranto.

- Malĝojiga fariĝis la afero - li ripetadis al si sub fajra suno, tra dunaroj kaj ĉanjararoj (12).

Malsato kaj soifo ankaŭ eksieĝis lin. Precipe soifo. AKVON, li pensis laŭte.

Kaj la voĉo surprizis lin, kvazaŭ ĝi ne estus la propra. Li forte vipis la hufulon, por elŝiri al ĝi viklecon. La besto kapskuis incitite, sen rapidigi la iradon. Ĝi ŝmacis la enbuŝaĵon, skuis la kapon. La SOIFO. Estas la soifo ; ĝi ne atingos la celon, se mi tro vipas ĝin ; sed se mi atingos la novan fervojbranĉon... frumatene preterpasas la fruktotrajno ; kiel bona estas la skvomelono dum la siesto : ruĝa, freŝeta ; maljunulo Agilera avizos al Lusio ; ĉi-lasto kun la buŝo ĉiam ridanta, kies dentoj blankas kiel maizospadiko senŝeligita ; lastafoje ŝi estis timigita... sed oni ja ne kaptos min! Kiam okazis tio ? aĥ, kiam, se Franĉjo estis bebo, kaj nun li estos baldaŭ sepjara ; kiel mi volas vidi lin ! la akvon ! Se nun la ĉevalaĉo forfalas de laco... kaj mi direktiĝos al la Malnova Vilaĝo, kiu serĉos min ĉe Dominiko ? Ja neniam oni suspektos tion... sed nu, kiel do ? mi devas reveni kaj transiri la riveron, la solan ĉe la nova fervojbranĉo... kaj ĉi pado, kien ĝi kondukas ?!

La bojado de la hundoj ŝiris lin el la cerbumado.

Iu knabeto forkuris laŭtvoĉe, kaj tuj la virino jam gapis al li terurite.

- Akvon, donu al mi akvon !

La ĉevalo estis flarinta la akvofonteton ; pro tio ĝi laŭiris tiun vojon kaj nun ĝi tiregis por alproksimiĝi. La knabeto ŝteliris malantaŭ la kabanon, kun la evidenta intenco peti helpon. Li tiam devis eltiri la pafarmilon kaj ordoni al la virino, alnajlita ĉe la loko pro la ektimo :

- Voku la knabon ! - dum li deĉevaliĝis.

Stuporanta pro la timego, la virino obeis al la urĝaj indikoj de tiu viro kun vizaĝo de frenezulo kaj vestaĵo disŝirita de la dornarbaro. Por la ĉevalo metalvazon da akvo alportis la knabo, dum ŝi enmanigis al la viro kruĉon kaj kunvolvaĵon kun kaprinfromaĝo kaj pano.

Li denove surseliĝis antaŭ ol la bruto tute kontentigis la soifon, kaj li minace avertis :

- Neniu ekmovu sin de ĉi tie, aŭ la aferoj iros malbone al vi.

Jam malproksime de la kabano li pensis, ke li estis aginta riske. Estis malprudente montri la pafilon ; li devus esti trankviliginta la virinon. Okazas, ke malsato kaj soifo igas la homon kiel beston. Nun li devas pensi klare. Malpliigis la furiozo de la suno. Estas pli bone rapidi, atingi la fervojon, ĉar se ne... diable ! ĉi ĉevalaĉo ne ekpaŝas vikle... damne, ĝi estas vundita, ĝi perdis hufumon, ĝi eklamos, nur tio mankis !

Tiel okazis : je vesperiĝo la besto ne plu paŝis ; ĝi restis senmova, malgraŭ la brutala vipado. La viro por la unua fojo sentis ion kvazaŭ aflikton aŭ senpovecon. Li pendigis de la ŝultro la sakon el ledo, kaj ekiris kun la fiksideo atingi la fervojon kvazaŭ tie koncentriĝus lia tuta forkureblo.

Vesperiĝis. Novluno pendiĝis ĉe la montoj kaj la ĉirpado de cikadoj, simila al mekanikaj ludiloj, superverŝis la ombrojn.

Kaj tie subite aperis la reloj. Li ekkuŝis preskaŭ sur la ŝpaloj, kun sia koro bateganta.

Li certe endormiĝis, ĉar pro la obtuza bruo, kiun aŭdigis la reloj, li vekigiĝis timtremanta.

Malproksime antaŭeniris luma ronda okulo. Ne estis vartrajno. Fervoja ŝarĝoĉaro kun skipo de laboristoj. Se ĝi estus vartrajno... sed jam ne estis rimedo.

Nun li kuŝis sur la paŝtejo. De luzerno verda, freŝa, kun la aromo vinberdolĉa de ĝiaj lilak-koloraj floretoj, kiun li trete platigis, dum li rampis por atingi tiun malproksiman remparon de popoloj.

La kanalo. Tie fluis la kanalo, bona vojo por pluiiri. Ĉar la laboristoj jam devis raporti al la polico pri la nekonoato, kiu meze de la reloj perarmile postulis al ili

transporti lin ĝis la riverkruciĝo.

Estis eraro. Sed tio jam ne havis rimedon.

La suno sidis alte, devis esti matenmeze. Tiel longe li rampis, ke lia kostumo estis verde makulita kaj lia pantalono ŝirita ĉe la genuoj. Li sidiĝis por ekfajrigi cigaredon. La paketon li perforte ŝiris al unu el la laboristoj.

"Tre malkuraĝa la triopo ; kaj mi ? rampanta kiel naŭza kolubro ; tio estas nekredebla ; ĉu timi ? Jes, mi timis ankaŭ tiam, sed por alfronti la aferon, ĉar estis tre malfeliĉa tiu batalo, kiam mi kondukis gregeton en P. ; kaj kiam ni estis trankvile tranoktantaj, la doganpolico ekatakis nin pafe : kuglo trafis mian kruron, kaj mi konsideris min bonŝanca, ĉar mia kamarado V. falis kun spino rompita ; sed mi forpafis policanon kaj ankaŭ li ne travivis la okazon ; tiuj estis agoj de bravuloj ; sed nun ... rampi tra paŝtejo... Mi jam estas malproksime de la ĉefvojo ; mi prefere kuros klinite ĝis la remparo." Li ekkonsciis, ke oni parolas mallaŭte, kaj li surpriziĝis suspektoplene.

Li elmontris la kapon kaj esploris rigarde super la lilaka maro de la floranta luzerno. Nenio nova. Li kuris kun dorso fleksita.

"Diable, miaj genuoj estas skrapvunditaj ; kvazaŭ mi estus bigotino pentofaranta ; nu, kaj tio ? heno, kamparaj bestoj ; oni devas esti komencinta la falĉadon ; certe, bona fojno pli ol unu metron alta ; mi nun senĉevala kaj por kio, do ? ĉevaloj, kaj se tio estus la polico... ne, ankoraŭ ne !"

Li atingis la remparon kun la koro rompanta la parieton de la brusto. Tra la kanalo ne fluis akvo, kaj la lito profunda kaj freŝa el malseka sablo estis bonega irejo. Li energie paŝegis mordetante molajn tigojn de fenkolo, ĉar eĉ ne salivo restis en lia buŝo.

Li tiam nete ekaŭdis malproksiman bojadon. Li aŭskultis. Tiuj ne estas hundoj el la kabanjoj ; ilin li konas tre bone. Tiuj estas alispecaj hundoj. Oni ĉasas lin per hundoj !

"Se oni flaris lian spuron, li estas perdita. Malbenitoj, kontraŭ brava viro inciti hundojn, kvazaŭ li estus perdriko aŭ vulpo ; sed ja tigro rezultos al vi, damne !"

Li tiam ekaŭdis la piedfrapadon de la ĉevaloj kaj kuglo siblis meze de la popoloj. "Ili celas, ke mi malkaŝu min ; krevu, la kuglojn mi gardas por bone uzi ilin ĉe la haŭto de la policianoj."

Pro la indigniĝo kreskis lia kuraĝo. Decidoplene li kuris ; li estis ekvidinta la kluzon de la akvoprenejo.

La ideo estas sava, se la bonŝanco lin favorus. Kaj ĝi favoris lin : ĝi ne perdis pendoseruron. Li rapide rotaciigis la brakon el fero kaj la kluzo levigis ĝis kiam lavango de argiloza akvo enfluis la kanalon, kiun li ĵus transiris. Neniu postesigno restis por orienti la hundojn. Ankaŭ ne la ĉifonaj vestoj, kiujn englutis la akvoŭluego. Kun la pura vestokompleto - antaŭvideme li agis, metinte ĝin en la sakon - li estis ja alia homo. Kaj alia la bonŝanco.

Neniu mortas la antaŭtagon, kamarado mia ; longe ili strebos en la ĉasado. Li kuŝis ĉe la malantaŭa parto de platĉaro, sur fojnamaso.

Posttagmeze li estis proksime de la Malnova Vilaĝo. Li piediris, senlace tra la dezerta vojo. Ĉe Dominiko li certe estos sendanĝere. "Al kiu venus la ideo elserĉi lin tie ? Li estis vigla : la bonŝanco favoris lin. Ĉiumaniere, li plibone estu singarda ; li jam faris sufiĉe da eraroj."

Pro tio, li preferis atendi ĝis vesperiĝo por eniri la Vilaĝon. Li rondiris, serĉante iun trankvilan lokon, ĝis kiam li ekvidis la ĉirkaŭmurojn. Li alproksimiĝis. Ĝi estis antikva, ruina domo, el kiu restis nur la muroj el adobegoj, indikantaj ĝiajn malnovajn ĉambrojn. Li eniris singarde. Subite murmuro alarmis lin.

Li ekprenis la armilon kaj elmontriĝis el malnova linto. La infanoj restis senmovaj dum la pantomimo de la ludado. Unu el ili - la plej aĝa - eble dekdujara, kun la manoj ligitaj ĉe la dorso, staris fiere, defie. Kontraŭ li la du ceteraj - apenaŭ sep- aŭ okjaraj - celis al li per improvizitaj karabenoj el ligno.

- Ba, mi ŝupozis, ke vi estas vulpoj (13) - la viro emis ŝajniĝi. "Jen la bandito, kiujn fiagojn li faris, nu, ni vidu..."

Sed la knaboj estis timigitaj. Efektive timigitaj de la armilo, kiun la viro intencis kaŝi. Senutila estis lia klopodo distri ilin kaj forigi malbonan impreson, kiun ili sendube portos hejmen. La infanoj respondis per unusilabajoj.

Ili ne povis retranskribi.

"Li devas perforte reteni ilin ĝis la vesperiĝo."

Tiam la plej juna rigardis lin fikse, kaj diris :
- Ni foriras ; panjo ne volas, ke ni venu ĉi tie, al la ĉirkaŭmuroj.

Kio estis en la dolĉa rigardo de la bubo, kio malhelpis al li haltigi ilin ? Skurĝo de sentemo moligis lin. Ĉar, dum eta momento, ekrigardis lin la okuloj de Franĉjo, lia filo.

Konsternis lin, eĉ pli, neniigis lin neinvertigebla fatalismo. Li sidiĝis sur adobego, unu el la pluraj, kiujn la infanoj utiligis por siaj ludoj. Li tiam ekrigardis la krucon. Li ne estis antaŭtima.

Tial li estis depreninta ĝin de tiu niĉo, kiun li trovis en tiu perdita vojo. Kiu scias, kiu homo mortis tie perforte kaj por ke tiu animo ne estu turmentata, oni ekflamigis al li kandelojn ĉe la loko mem. Tia estis la moro : kun la kruco surŝultre li eldiris sian promeson porti ĝin ĝis la tombo de sia patrino, kaj neniu rifuzis veturigi lin por mallongigi la vojon al tiu tiel pia celo. La nigra kruco el fero, alta, nigra kruco, estis lia nesuspektinda paspermeso.

Sed nun... tio ne estas, ke li antaŭtimas, ke li kredas je la animoj... finfine ĝi estis ia helpo en tiel malfacila situacio... Sed nun ne plaĉas al li rigardi ĝin, havi ĝin fronte al li. Li ekstaris kaj apartigis ĝin el sia rigardo. Poste, denove sidanta, li reviziis zorge siajn armilojn : du bonajn pistolojn.

Li palpe serĉis la kuglojn en la sakego, kaj kalkulis ilin. Kvardek-du, ĝuste lia aĝo : po unu kuglo por ĉiu jaro. Por defendi ĉiun jaron el sia vivo. Li zorge distribuis ilin en siaj poŝoj. Li apogis la dorson ĉe la muro. Kia laceco, kiel bone estus dormi !

Certe li tradormis tempospacon, ĉar li vekigis timigite. Lia instinkto sufloris al li, ke io moviĝas ekstere. Li aŭskultis ; ĉu tio ne ŝajnas spiregado de ĉevaloj ? Kaj voĉoj, tre mallautaj aŭ malproksimaj. Ĉu estas ili ? Li eksaltis por eliri. Li ekhaltis.

"Kaj se oni sieĝas lin ?"

Li elturniĝis por esplori. Nur unu selita ĉevalo. Ne, la rajdanto devas esti sube, kaŝita en la arbetaro.

Kompreneble, polica selaĵo. Kaj tie, alia ĉevalo ; nur la postajon li ekvidis.

"Kaj ĉu tiuj ne estus ili ?" Estis nur unu maniero sciigi, montri sin. Sed ne, diable ! "Ili eble mortigus min je la unua pafo."

Klinite li proksimiĝis al iu ĉirkaŭmuro kaj malrapide li montris la ĉapelon pendantan de stango, el tiuj postlasitaj de la knaboj. Jam li pensis kun kontento, ke ĉio estas imago lia, kiam kuglo siblis super lia kapo kaj faligis la ĉapelon.

- "Alvenis la horo, kamarado ; estas batita via horo ! Po unu kuglo por ĉiu jaro. Tre kare kostos al ili mia haŭto."

Li esploris kun diligenta zorgemo la plej strategiajn angulojn, por ofensivo kun minimuma risko, kaj li ekpafis, sed li ne povis konstati, ĉu la pafoj trafis. Tio koleregigis lin. Sed pli koleregigis lin, ke oni ne respondis al lia defio.

"Kion ili celas ? Ĉu eluzi lian kuraĝon per la kolero, ĉu igi lin timigita kuniklo ?"

Li malŝargis malrapide la du pistolojn, klopodante linie forpafi supozatan tranĉeon. Nenio nova. Li ripetis la operacion ĉe alia angulo, pli riske. Ekhenis ĉevalo. "Li trafis lin, sendube, kompatinda bruto ! mortigi ĝin, noblan beston; neniu kiel ĝi, oni devas scii, kia ĝi estas en la montaro ; ankaŭ la makulgriza ĉevalo de Sinjor' Agilera falis sur la kamparo ; bonkora maljunulo, pro io mi transdonis al li kelkajn pesojn ; li scias, ke mi amas Lusian, ke se ne estus pro ĉi fekumita vivaĉo ; li ankaŭ amas ŝin, nu kompreneble, temas pri lia filino ; li ja ne povis pensi, ke mi venis por intervjui Dominikon ; tre bone, mi konsentas, ke Dominiko estas... sed iel oni devas perlabori sian vivon kaj doni manĝon al la infanoj ; se mi estus pluirinta rekte al lia domo, anstataŭ enretiĝi ĉi tie."

Tiam el ĉiuj flankoj sonis pafoj, kiuj eĥis multoblige ĉe la montoj.

- Nun ja varmiĝas ! - interrompis siajn pripensojn la sieĝito.

Li kuris por pafi el alia muro. La pafado ekzaltis denove lian kuraĝon. Li stumblis je io ; tio estis la nigra kruco. Li piedfrapis ĝin rabie. Li palposerĉis en la poŝoj la kuglojn, kiujn li forpafadis kun ĝuemo. Ĝis kiam li subite

ekkonsciis, ke al li restas nur unu.

Li abrupte haltis, kiel iu frapita. Ekstere malfermiĝis paŭzo de atendo - plena silento. Li tiam ekaŭdis torditan voĉon, urĝanta :

- Kapitulu! Kapitulu, ĉar vi estas sieĝita.

Li meditis pri la celo de tiu lasta kuglo.

La voĉo ripetadis laŭ etaj intervaloj :

- Kapitulu! Vi ne havas forkureblon.

"Estas vere, oni mortigos lin kiel raton. Ili tenas lin en la kaptilo. Kaj la voĉo, tiu voĉo deformita kaj laŭtega furiozigis lin anstataŭ timigi lin." Alkrii lin per laŭtparolilo, kiel tiuj uzataj de la fruktovendistoj por reklami : "mi vendas entranĉitajn akvomelonojn kaj melonojn por dekduo !"

- Kapitulu! El tie vi ne eliros vivanta, vi estas sieĝita !

- La putino kiu... (14). Jen tiu bugrato reklamas mian vivon, kaŝite kaj malproksime !

Kaj en impeto de furiozo li ekstaris malkaŝe. Ekstere, sur la gruzo, fronte al la ruinoj, la figuro kontraŭlume prenis konturojn de drameca kaj senutila aŭdaco.

- Nu, tiu alkrianta min kaŝe per tiu lado, eliru kaj pafu fronte al mi ! Viron kun la ĉurovoj ĉe la ĝusta loko oni ne mortigas sieĝita kiel raton.

Kaj li restis defie staranta, altigita de la kuraĝo.

Neniu respondis. Nur la malproksima murmuro de la rivero invadis la vesperon, kiel la neestingebla pulso de la tero.

- Se ne estas iu viro kun la ĉurovoj ĝuste lokitaj, por mortigi fronte, al mi ankoraŭ restas unu kuglo !

Paŭzoplene li turnis sin kaj iris du paŝojn. Je la tria li falis, kun la nuko traborita de trafa pafado.

Alta, nigra kruco el fero kronis la niĉon, kiun oni starigis ĉe la sama loko, kie falis TALKENKA. Neniam mankis floroj, nek flamantaj kandeloj dumnokte, ĉar pri tiu kruco oni rakontis strangan historion.

Mistere ĝi aperis ĉe la ĉirkaŭmuroj, la saman tagon kiam oni mortigis TALKENKAn. Pli precize, la vesperon kiam Dominiko Agilera, policagento, eliris kun la komisararo kaj aliaj kvar homoj por kapti armitan nekonaton,

kiu minacis iliajn proprajn infanojn, dum ili ludadis ĉe la ruinoj.

Dominiko estis frato de Felisiano kaj Lusia, vidvino de TALKENKA.

-
- (1) Sanrafaelo : grava mendoza urbo.
 - (2) "nu, sinjor'..." : popolkanzono de Mendoza, vinprodukta provinco.
 - (3) "...mastro..." : popolesprimo, egalvaloras al : moŝto.
 - (4) Malnova Sitelo : tradukita nomo de vilaĝeto.
 - (5) Tabanera, Talkenka : arg. familinomoj.
 - (6) ĥariljo : rezinriĉa fibreca arbusto (hisp.: "jarilla").
 - (7) Agilera (fonetike) : argentina familinomo.
 - (8) tifaŝo : planto (botanike : "typha").
 - (9) Diamanto : grava mendoza rivero.
 - (10) Malargue : mendoza urbeto, mineralaj kuŝejoj.
 - (11) Lusia (fonetike) : argentina virinomo.
 - (12) ĉanĵaro : iuspeca arg. arbo simila al olivarbo laŭ alto kaj foliaro, frukto dolĉa, manĝebla ("Gourliea decorticans" ; hisp. : "chañar").
 - (13) Arg. insultnomo por policanoj.
 - (14) "...vin naskis" : en Arg. = la plej granda insulto.

* *
*

" L A M O R T I N T O "

De : BORGES (borĝes), Georgo Luizoz
 vd. "La Sudo".

.....

Ke viro el la Bonaera suburbo, ke malgrava fanfaronulo sen ia virto, krom la orgojlo pro sia kuraĝo, penetras la dezertojn trakuritajn de rajdantoj en la brazila landlimo kaj fariĝas eĉ kapitano de kontrabandistoj, ŝajnas jam antaŭe nebla.

Al la personoj tiel opiniantaj mi volas rakonti la destinon de Benjamenoz Otaloro, pri kiu eble eĉ neĥiu memoro transdaŭras en Balvanera Kvartalo (1), kaj kiu mortis laŭ sia leĝo, pafita, en fora angulo de Ŝtato Riogrando Suda (2).

Mi ne konas la detalojn de lia aventuro : kiam ili estos malkaŝitaj al mi, tiam mi korektos kaj ampleksigos ĉi paĝojn. Momente, ĉi resumo povas esti utila.

Benjamenoz Otaloro estas deknaŭ-jara ĉirkaŭ 1891a. Li estas junulo kun mallarĝa frunto, sinceraj helaj okuloj, vasta fortikeco. Bonŝanca ponardfrapo malkaŝis al li, ke li estas kuraĝa homo ; ne maltrankviligas lin la morto de sia kontraŭulo, ankaŭ ne la neceso forkuri tuj el la Respubliko. La paroĥa Lokestro donas al li rekomendleteron por iu nomata Asevedo-Bandejra, el Urugvajo. Otaloro enŝipiĝas : la vojaĝo estas knara kaj ŝtorma. La sekvintan tagon li travagas la stratojn de Montevideo kun nekonesata kaj eble nekonata malĝojo.

Li ne renkontas Asevedo-Bandejran. En drinkejo, ĉirkaŭ noktomezo, li ĉeestas kverelon de kelkaj bovĝardistoj. Ekbrilas tranĉilego ; Otaloro ne scias ĉe kiu flanko regas la pravo, sed allogas lin la nura gusto je la danĝero, kiel aliajn kartludoj aŭ muziko. Li haltigas en la malpaco malaltan ponardfrapon, kiun kampulo ĵetas al iu viro kun malhelkolora ĉapelo kaj ponĉo. Poste rezultas, ke ĉi-lasta estas Asevedo-Bandejra. (Eksciante

tion Otaloro disŝiras la leteron, ĉar li preferas ŝuldi ĉion al si mem). Asevedo-Bandejra nepravigeble impresas kiel kriplulo, kvankam li estas fortika : en lia vizaĝo vidiĝas la proksimaj spuroj de la judo, la negro kaj la indiano. En lia mieno, la simio kaj la tigro ; la cikatro kiu traas lian vizaĝon estas ornamo plia, samkiel la nigraj hirtaj lipharoj.

Ĉu sekvo, ĉu eraro de la alkoholaĵoj, la malpaco ĉesas same rapide, kiel ĝi komenciĝis. Otaloro drinkas kune kun la bovgardistoj kaj poste akompanas ilin al festo kaj poste al domo en la MALNOVA URBO, jam en plena taglumo.

En la plej malantaŭa korto, sur la muda tero, la viroj sternas siajn seltukojn por dormi. Otaloro konfuze komparas tiun nokton kun la antaŭa : nun li jam surpaŝas firman grundon, inter amikoj. Sed ja mordas lin iu konsciencia riproĉo : ne sopiri pri Bonaero.

Li dormas ĝis vespero, kiam vekas lin la kampulo, kiu agresis ebrie Bandejran. Otaloro memoras, ke tiu homo partoprenis kun la aliaj la nokton tumultan kaj gajegan, kaj ke Bandejra sidigis lin ĉe sia dekstra flanko kaj devigis lin daŭrigi la drinkadon.

La viro diras al li, ke la mastro ordonas konduki lin. En iuspeca oficejo frontanta al la vestiblo - Otaloro neniam vidis vestiblon kun flankpordoj - atendas lin Asevedo-Bandejra, al kiu kompanias helhaŭta kaj malŝatema virino kun ruĝaj haroj. Bandejra laŭdas lin, regalas lin per glaso da brando, ripetas al li, ke li aspektas kiel kuraĝa homo, proponas al li iri al la Nordo kun la ceteraj por hejmenpeli gregon. Otaloro akceptas : ĉirkaŭ la matenkrepusko ili estas jam sur la vojo, en direkto al Takuarembó' (3).

Tiam komenciĝas por Otaloro nova vivo, kun vastaj aŭroroj kaj tagoj odorantaj ĉevale. Tiu vivo estas nova por li kaj foje terura, sed ĝi estas jam en lia sango, ĉar samkiel la homoj el aliaj nacioj adoras la maron kaj antaŭsentas ĝin, tiel ni - ankaŭ la homo interplektanta ĉi simbolojn - sopiras al la senfina ebenaĵo kiu sonoras je huftretadoj.

Otaloro elkreskis en la kvartaloj de la ĉaristoj : antaŭ ol pasis unu jaro li fariĝas gaŭĉo. Li lernas rajdi, engregigi la brutaron, buĉi, manipuli la lazon ligantan

kaj la bulojn renversantajn, rezisti la dormemon, la tempestojn, la frostojn kaj la sunon, pelkonduki per la krioj kaj la fajfoj.

Dum tiu tempo de lernado, nur unufoje li vidas Asevedo-Bandejran, sed li tenas lin en konsidero, ĉar "esti viro de Bandejra" signifas esti priatentata kaj timata, kaj ĉar ĉe kiu ajn virago la gaŭĉoj diras, ke Bandejra faras tion pli bone.

Unu el ili opinias, ke Bandejra naskiĝis trans Kuarejm-Rivero, en la Ŝtato Riogrando Suda, kaj tiu fakto, kiu devus malaltigi lin, nebule riĉigas lin je multloĝataj arbaroj, marĉoj, kaj distancoj implikitaj kaj preskaŭ senfinaj.

Iom post iom Otaloro komprenas, ke la negocoj de Bandejra estas multoblaj kaj ke la ĉefa estas kontra-bandado. Bovgardisto egalas al servisto : Otaloro decidas mem promociiĝi je kontrabandisto.

Du el la kamaradoj iun nokton transiris la landlimon por reveni kun kelkaj provizoj da brando ; Otaloro provokas unu el ili, vundas lin kaj prenas lian postenon. Motivigas lin la ambicio kaj ankaŭ malluma fidelo. "Ke tiu homo (= Asevedo-Bandejra) - li pensas - fine komprenu, ke mi valoras pli, ol ĉiuj liaj orientanoj (4) kune".

Pasas plia jaro, antaŭ ol Otaloro revenas al Montevideo. Ili trakuras la ĉirkaŭojn, kaj la urbon - kiu al Otaloro ŝajnas tre vasta ; ili atingas la domon de la mastro, kaj la viroj sternas la seltukojn sur la plej malantaŭa korto.

Pasas la tagoj kaj Otaloro ne vidis ankoraŭ Bandejran. Ili diras, tiĉeme, ke li estas malsana ; nigrulo kutimas supreniri al lia dormoĉambro kun la kaldrono kaj la mateujo. Iun vesperon, oni komisias al Otaloro tiun taskon. Li sentas sin nebule humiligita sed ankaŭ kontenta. En la dormoĉambro, senmebla kaj malluma, estas balkono rigardanta al Okcidento, longa tablo kun brila malordo de vipoj, rimenoj, zonoj, pulvarmiloj kaj glavoj ; malproksima spegulo kun la kristalo malbrila. Bandejra kuŝas surdorse ; li songas kaj plendas ; karakterizas lin ardo de sunsubiro. La ampleksa blanka lito ŝajnas malgrandigi kaj mallumigi lin. Otaloro rimarkas liajn grizharojn, lian lacecon, lian malforton, la faltojn de

la jaroj. Lin ekribeligas tio, ke tiu aĝulo komandas ilin. Li ekpensas, ke nura bato sufiĉus por neniigi lin. Li vidas tiam per la spegulo, ke iu ĵus eniris. Estas la virino ruĝhara, duonvestita kaj nudpieda, kiu rigardadas lin kun malvarma scivolemo. Bandejra duonleviĝas : dum li parolas pri aferoj de la kamparo kaj elsorbas mateon post mateo, liaj fingroj ludas per la harplektaĵoj de la virino. Finfine, li donas al Otaloro permeson foriri.

Kelkajn tagojn poste, trafas ilin la ordono ekiri al la Nordo. Ili alvenas al brutbieno, kiu situas ie ajn en perdita loko de la senfina ebenaĵo. Nek arboj nek rivereto gajigas ĝin ; de l'leviĝo ĝis subiro la suno vipas ĝin. Por la brutaro, kiu estas grandkorna kaj malgrasa, estas kortoj kun ŝtonbariloj. "La Vespiro" nomiĝas tiu malriĉa stablo.

Otaloro aŭdas en rondo de laboristoj, ke Bandejra baldaŭ alvenos el Montevideo. Li demandas kial ; iu klarigas, ke fremdulo gaŭĉiĝinta intencas estri tro multe. Otaloro komprenas, ke estas blago, sed flatas lin, ke jam eblas tia blago. Li poste sciigas, ke Bandejra malamikiĝis al iu el la politikaj ĉefoj, kaj ke ĉi-lasta deprenis al li sian apogon. Al li plaĉas tia sciigo.

Alvenas kestoj kun longaj armiloj ; alvenas kruĉo kaj baseno el arĝento por la alkovo de l'virino ; alvenas kurtenoj el implika damaskenaĵo ; alvenas iun matenon el la montetoj ponĉkovrita melankolia rajdanto kun vepra barbo. Li nomiĝas Ulpjano-Suares, kaj li estas la "kapango" (5) aŭ dorsŝirmanto de Bandejra. Li parolas tre malmulte kaj laŭ maniero brazileca. Otaloro ne scias, ĉu atribui lian silentemon al la malamikeco, al la malŝato aŭ al la nura barbareco. Li ja certe scias, ke por la plano, kiun li estas cerbumanta, li devas konkeri lian amikecon.

Poste eniras la destinton de Otaloro ruĝa ĉevalo nigra-krura, kiun el la Sudo kondukas Bandejra, kaj kiu surportas selon garnitan per metalplatoj kaj ĉabrakon borderitan per tigra felo. Tiu rapida ĉevalo estas simbolo de la regpovo de la mastro, kaj pro tio ĝin avidas la junulo, kiu eĉ avidas ankaŭ, kun malpardona dezirego, la virinon kun brila hararo. La virino, la rajdilaro kaj la ruĝa ĉevalo estas simboloj aŭ atributoj de la viro, kiun li aspiras

detrui.

Tie ĉi la historio komplikiĝas kaj profundigas. Bandejra estas lerta pri la arto de la grada timigo, pri la satana manovro humiligi iom post iom la interparolanton, kombinante seriozon kaj ŝercon. Otaloro decidis apliki tiun metodon dubesencan al la streboplena tasko, kiun li proponas al si.

Li decidis anstataŭi, malrapide, Asevedo-Bandejran. Li konkeras, dum tagoj de komuna danĝero, la amikecon de Suares. Li konfidas al li sian planon; Suares promesas al li sian helpon. Multaj aferoj okazas poste, el kiuj mi scias malmultajn. Otaloro ne obeas Bandejran; li tendencas forgesi, korekti, inversigi liajn ordonojn. La universo ŝajnas konspiri kun li kaj rapidigas la faktojn.

Iun posttagmezon, en kampo apud Takùarembó, okazas interpafado kun personoj Riograndaj. Otaloro uzurpas la postenon de Bandejra kaj ekkomandas la orientanojn. Lian ŝultron tratrauas kuglo, sed tiun vesperon Otaloro revenas al "La Vespéro" rajde sur la ruĝa hufulo de la ĉefo, kaj tiun vesperon kelkaj gutoj el lia sango makulas la tigrofelon, kaj tiun nokton li tradormas kun la virino brilhara. Aliaj versioj ŝanĝas la ordon de tiuj faktoj kaj neas, ke ili okazas en nur unu tago.

Bandejra tamen estas ĉiam nominale la ĉefo. Li eldiras ordonojn, kiuj ne estas plenumitaj. Otaloro ne tuŝas lin, pro mikso de rutino kaj kompatato. La lasta sceno el la historio konformiĝas al la tumulto de la lasta nokto de 1894a. Tiun nokton, la viroj de "La Vespéro" manĝas viandon el ĵus buĉita bruto kaj trinkas kvereleman alkoholaĵon. Iu senfine pinĉas sur kordoj lamentan milongon (6). Ĉe la tablokapo Otaloro ebrie, amasigas ĝojkrion sur ĝojkrio, jubilon sur jubilo; tiu turo sveniga estas la simbolo de lia nerezistebla destino. Bandejra malgaje silenta meze de la kriantoj, lasas la nokton forflui laŭte. Kiam la dekdu sonorilbatoj sonoras, li ekstaras kvazaŭ iu ekmemoranta devigon, kaj li milde frapas la pardonon de la virino. Tiu ĉi lasta malfermas al li, kvazaŭ ŝi atendus la vokon. Duonvestita kaj nudpieda ŝi eliras.

Per voĉo, kiu femaliĝas kaj treniĝas la ĉefo ordonas

al ŝi :

- Ĉar vi kaj la Bonaerano tiel multe amas unu la alian, ĝuste nun vi donos al li kison je la vido de ĉiuj.

Li aldonas brutalan cirkonstancon. La virino emas rezisti, sed du viroj kaptas ŝian brakon kaj ĵetas ŝin sur Otaloron. Larmoplena, ŝi kisas liajn vizaĝon kaj bruston.

Ulpjano-Suares ekkaptis la revolveron. Otaloro ekkomprenas, antaŭ ol morti, ke ekde la komenco oni perfidis lin, ke li estis kondamnita je morto ; ke oni permesis al li la amon, la regadon kaj la venkon, ĉar oni jam prenis lin kiel mortinton, ĉar por Bandejera li jam estis mortinta.

Suares, preskaŭ malŝateme, ekpafas.

- (1) Komence de la jarcento oni dividis la kvartalojn laŭ paroĥoj.
- (2) Riogrando Suda : Brazila ŝtato, limanta al Urugvajo.
- (3) Takuarembó' : norda urugvaj urbo, samnoma departemento.
- (4) Orientano = urugvajano. ORIENTA BORDO = Urugvajo.
- (5) Kapango : en la gvaranilingvaj regionoj = ĉefo, mastro, dorsŝirmanto, ktp.
- (6) Milongo : muzika speco kaj danco en Argentino kaj Urugvajo. Populare oni ankaŭ nomas tiel la dancejojn ĝenerale, pro sinekdoko.

* * *

ARGENTINA NOVELARO

en tri serioj

Unua serio

(1978)

- * E. Gutiérrez : La fritkukoj
- * L. Gudiño Kramer : Ora Mezo
- * H. Quiroga : Van Houten
- * M. Booz : La inunduloj
- * L. Gudiño Kramer : La Verda Lando
- * L. Lugones : Repago

Dua serio

(1980)

- * V. Ayala Gauna : La virino
- * V. Ayala Gauna : Soleco
- * V. Batista : La maljunuloj
- * S. Cernadas : La sankta promeso
- * A. Gerchunoff : La revolucio
- * H. Rozenmacher : Bananoj

Tria kaj lasta serio

(1982)

- * G. Estrella : Forkuris la rato
- * G. Calvetti : La senmorta timo
- * O. Villordo : La insulo
- * G.L. Borges : La sudo
- * I. Codina : La nigra kruco
- * G.L. Borges : La mortinto

^
Ciu serio estas mendebla al la Broŝurservo de SAT :
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut. Poŝtkonto: 3 371 74 M
Bordeaux.

Directeur de publication et imprimeur : Baudé 47340 Laroque